

Ellen G. White Estate

A photograph of a white lighthouse on a cliff overlooking the ocean at dusk. The lighthouse is illuminated from within, and the sky is a mix of blue and purple. Palm trees are visible in the foreground. The title 'FELIÇÃO ESTAS' is overlaid in large white letters.

FELIÇÃO ESTAS

ELLEN G. WHITE

Feliço Estas (Paŝoj al Kristo)

Ellen G. White

**Copyright © 2012
Ellen G. White Estate, Inc.**

Information about this Book

Overview

This eBook is provided by the [Ellen G. White Estate](#). It is included in the larger free [Online Books](#) collection on the Ellen G. White Estate Web site.

About the Author

Ellen G. White (1827-1915) is considered the most widely translated American author, her works having been published in more than 160 languages. She wrote more than 100,000 pages on a wide variety of spiritual and practical topics. Guided by the Holy Spirit, she exalted Jesus and pointed to the Scriptures as the basis of one's faith.

Further Links

[A Brief Biography of Ellen G. White](#)
[About the Ellen G. White Estate](#)

End User License Agreement

The viewing, printing or downloading of this book grants you only a limited, nonexclusive and nontransferable license for use solely by you for your own personal use. This license does not permit republication, distribution, assignment, sublicense, sale, preparation of derivative works, or other use. Any unauthorized use of this book terminates the license granted hereby.

Further Information

For more information about the author, publishers, or how you can support this service, please contact the Ellen G. White Estate at mail@whiteestate.org. We are thankful for your interest and feedback and wish you God's blessing as you read.

Enhavo

Information about this Book	i
LA AMO DE DIO POR LA HOMARO	4
LA BEZONO DE LA PEKANTO POR KRISTO	9
PENTO	13
KONFESO	22
KONSEKRO	26
FIDO KAJ AKCEPTO	31
LA PROVO DE DISCIPLECO	36
KRESKADU EN KRISTON	43
LA LABORO KAJ LA VIVO	49
SCIO DE DIO	55
LA PRIVILEGIO DE PREĜO	60
KION FARI KUN DUBO	68
ĜOJANTE EN LA SINJORO	74

LA AMO DE DIO POR LA HOMARO

NATURO kaj revelacio egale atestas la amon de Dio. Nia Patro en la Ĉielo estas la fonto de vivo, de saĝeco, kaj de ĝojo. Rigardu la mirindaĵojn kaj belaĵojn de la naturo. Pensu pri ilia mirinda adapto al la bezonoj kaj feliĉo, ne nur de la homaro sed de ĉiuj vivantaj kreaĵoj. La sunlumo kaj la pluvo, kiuj ĝojigas kaj refreŝigas la teron, la montetoj kaj maroj kaj ebenaĵoj, ĉiuj parolas al ni pri la amo de la Kreinto. Estas Dio kiu provizas la ĉiutagajn bezonojn de ĉiuj Siaj kreaĵoj. En la belaj vortoj de la psalmisto,

“Ĉies okuloj estas turnitaj al Vi,
Kaj Vi donas al ili ilian manĝon en ĝia tempo.
Vi malfermas Vian manon
Kaj satigas favore ĉion vivantan.”

La Psalmaro 145:15,16

Dio kreis la homon perfekte sankta kaj feliĉa; kaj la bela tero, kiel ĝi venis el la mano de la Kreinto, portis neniun velkiĝon de putrigo aŭ ombron de la malbeno. Estas malobeo de la leĝo de Dio — la leĝo de amo — kiu venigis malĝojon kaj morton. Tamen ĉe meze de la sufero kiu rezultas pro peko, la amo de Dio malkaŝiĝas. Estas skribite ke Dio malbenis la grundon pro la ago sed por la bono de la homaro (Genezo 3:17). La dorno kaj kardo — la malfacilaĵoj kaj afliktoj kiuj igas lian vivon vivo de laborego kaj zorgo stariĝis por lia bono, kiel parto de la eduko necesa en la Dia plano. Tio estas por lia suprenlevo el la ruiniĝo kaj malnobleco kiujn kaŭzis peko. La mondo kvankam falinta, ne estas tute malĝoja kaj mizera. En la naturo mem estas komunikaĵoj de espero kaj konsolo. Estas floroj [2] sur la kardoj, kaj dornoj estas kovritaj per rozoj.

“Dio estas amo” estas skribita sur ĉiu malfermanta burĝono, sur ĉiu pintaĵo de saltanta herbo. La belaj birdoj kiuj voĉigis la aeron per siaj ĝojaj kantoj, la delikate koloretaj floroj en sia perfekteco parfumante la aeron, la altaj arboj de la arbaro kun sia riĉa foliaro el

vivanta verdo — ĉiuj atestas pri la sentema, patra zorgo de nia Dio, kaj pri Lia deziro feliĉigi Liajn infanojn.

La Vorto de Dio malkaŝas Lian karakteron. Li Mem deklaris Siajn senlimajn amon kaj kompaton. Kiam Moseo preĝis, “Montru al mi Vian gloron,” la Sinjoro respondis, “Mi preterpasigos antaŭ vi Mian tutan bonecon.” Eliro 33:18,19. Jen Lia gloro. La Sinjoro preterpasis antaŭ Moseo, kaj proklamis, “Eternulo, Eternulo, Dio indulgema kaj kompatema, multepacienca, favorkora, kaj verema; kiu konservas favorkorecon por miloj, pardonas kulpon kaj krimon kaj pekon.” Eliro 34:6,7. Li estas “longepacienca kaj tre favorkora” (Jona 4:2), “ĉar Li amas bonfari” (Miĥa 7:18).

Dio ligis niajn korojn al Si per sennombraj signoj en la Ĉielo kaj sur la Tero. Per la aĵoj de la naturo, kaj la plej profundaj kaj plej sentemaj teraj ligaĵoj kiujn homaj koroj povas koni, Li serĉis malkaŝi sin al ni. Tamen ĉi tiuj nur neperfekte preparolas Lian amon. Spite ke ĉiuj ci atestaĵoj estis donataj; la malamiko de bono blindigis la mensojn de la homoj, ĝis ili surrigardis Dion kun timo; ili pensis pri Li kiel severa kaj nepardonema. Satano kondukis homojn koncepti pri Dio kiel estulo kies ĉefa atributo estas rigida justeco — iu kiu estas severa juĝisto, kruela, postulema kreditoro. Li bildigis la Kreinton kiel estulon kiu rigardas per ĵaluza okulo por percepti la erarojn kaj maltrafaĵojn de homoj, por ke Li povos inflikti juĝojn sur ilin. Estas forpreni ĉi tiun malhelan ombron, per malkaŝo al la mondo de la senlima amo de Dio, ke Jesuo venis por vivi inter homoj.

La Filo de Dio venis de la Ĉielo montrigi la Patron. “Neniu iam vidis Dion; la solenaskita Filo, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris.” Johano 1:18. “Nek iu konas la Patron krom la Filo, kaj tiu, al kiu la Filo volas malkaŝi Lin.” Mateo 11:27. Kiam unu el la disĉiploj faris la enketon, “Montru al ni la Patron,” Jesuo respondis, “Ĉu mi estas kun vi tiel longan tempon, kaj vi min ne konas, Filipino? tiu, kiu vidis min, vidis ankaŭ la Patron; kiel vi diras: Montru al ni la Patron?” Johano 14:8,9.

Priparolante Sian teran mision, Jesuo diris, La Sinjoro “Min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj; Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj kaj vidpovon al blinduloj, por meti la vunditojn en liberecon.” Luko 4:18. Ĉi tiu estis Lia laboro. Li iris de loko al loko farante bonon, kaj sanigante ĉiujn kiujn subpremis Satano. Estis tutaj vilaĝoj kie ne estis ĝemo de malsano en iu ajn domo; pro la fakto

[3]

ke Li trapasis ilin, kaj sanigis iliajn malsanulojn entute. La laboro donis atestaĵon de Lia dia sanktoleado. Amo, favorkoro, kaj kompato malkaŝiĝis en ĉiu ago de Lia vivo; Lia koro pleniĝis de sentema simpatio al la infanoj de la homoj. Li prenis la homan naturon, por ke Li povos atingi la dezirojn de homaro. La plej malriĉa kaj plej humila ne timis alproksimiĝi al Li. Eĉ malgrandaj infanoj estis altiritaj al Li. Ili amis grimpi sur Liajn genuojn kaj rigardadi en la penseman vizaĝon, bonvola per amo.

Jesuo ne subpremis eĉ unu vorton de vero, sed Li eligis ĝin ĉiam kun amo. Li uzis la plej grandan takton, kaj prizorgan bonkoran atenton, dum Siaj interrilatoj kun la popolo. Li estis neniam malĝentila, neniam senbezone diris severan vorton, neniam donis senbezonan doloron al sentema animo. Li ne cenzuris homan malforton. Li parolis la veron, sed ĉiam kun amo. Li denunciis hipokritecon, malkredon, kaj abomenaĵon; sed larmoj estis en Sia voĉo kiam Li eligis Siajn velkigajn riproĉojn. Li ploris pro Jerusalemo, la urbego kiun Li amis, kiu rifuzis ricevi Lin, la Vojon, la Veron, kaj la Vivon. Ili estis reĵetitaj Lin, la Savanto, sed Li rigardis ilin kun kompatanta sentemo. Lia vivo estis vivo de abnegacio kaj pensema zorgo por aliaj. Ĉiu animo estis karega en Liaj okuloj. Kvankam Li ĉiam portis sin kun dia digno, Li kliniĝis kun la plej sentema respekto al ĉiu ano de la familio de Dio. En ĉiuj homoj Li vidis falintajn animojn kiujn estis Lia misio savi.

Tiel estas la karaktero de Kristo kiel malkaŝita en Lia vivo. Ĉi tio estas la karaktero de Dio. Estas de la koro de la Patro ke la riveretoj de dia kompato, montritaj en Kristo, elfluas al la infanoj de homoj. Jesuo, la sentema, kompata Savanto, estis Dio, “kiu elmontriĝis en la karno” (1 Timoteo 3:16).

Estas reaĉeti nin ke Jesuo vivis kaj suferis kaj mortis. Li fariĝis “viro suferanta,” ke ni povos fariĝi partoprenantoj de eterna ĝojo. Dio permesis ke Lia amata Filo, plena de graco kaj vero povis veni de mondo de nepriskribebla gloro, al mondo difektita kaj velkigita per peko, malheligita per la ombro de morto kaj la malbeno. Li permesis ke Tiu povis lasi la sinon de Lia amo, la adoron de la anĝeloj, suferi honton, insulton, humilecon, malamadon, kaj morton. “Puno por nia bono estis sur Li, kaj per Lia vundo ni saniĝis.” Jesaja 53:5. Jen Li en la dezerto, en Getsemane, sur la kruco! La senmakula Filo de Dio prenis sur Sin la ŝarĝo de peko. Tiu, kiu estis unu kun Dio, sentis en Sia animo la teruran disigon ke peko faras inter Dio kaj homaro. Ĉi

tiu premegis de Liaj lipoj la doloregan krion, “Mia Dio, Mia Dio, kial Vi forlasis Min?” Mateo 27:46. Estas la ŝarĝo de peko, la sento de ĝia terura abomeneco, de ĝia disigo de la animo for Dio — estis ĉi tio kio rompis la koron de la Filo de Dio.

Sed ĉi tiu granda ofero estis ne farita por krei en la koro de la Patro amon por homaro, ne fari Lin volonta savi. Ne, ne! “Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon.” Johano 3:16. La Patro amas nin, ne pro la granda pacigo, sed Li provizis la pacigon pro la fakto ke Li amas nin. Kristo estis perilo tra kiu Li povis elverŝi Sian senliman amon sur falintan mondon. “Dio estis en Kristo, repacigante la mondon al Si.” 2 Korintanoj 5:19. Dio suferis kun Sia Filo. En la dolorego de Getsemane, la morto de Kalvario la koro de Senlima Amo pagis la prezon de nia reaĉeto.

Jesuo diris, “Pro tio la Patro Min amas, ke Mi demetas Mian vivon, por ke Mi ĝin reprenu.” Johano 10:17. Tio estas, “Mia Patro tiel amis vin ke Li amis Min eĉ pli pro donante Mian vivon por reaĉeti vin. Farigante vian Anstataŭulon kaj Garantianto, cedante Mian vivon, prenante viajn respondecojn, viajn pekojn, Mi kariĝas al Mia Patro; ĉar per Mia Ofero, Dio povas esti justa kaj ankoraŭ la praviganto de tiu kiu kredas en Jesuo.

Neniu krom la Filo de Dio povis efektiviĝi nian reaĉeton; pro la fakto ke nur Tiu kiu estis en la sino de la Patro povis deklari Lin. Nur Tiu kiu sciis la alton kaj profundon de la amo de Dio povis elmontri ĝin. Nenio malpli ol la senlima ofero farita per Kristo por falinta homaro povis esprimi la amon de la Patro al perdita homaro.

[5]

“Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon.” Li donis Lin ne nur por vivi inter homoj por porti iliajn pekojn, kaj morti kiel ilia ofero. Li donis Lin al la falinta raso. Kristo estis identigi sin kun la interesoj kaj bezonoj de homaro. Tiu kiu estis unu kun Dio ligis sin kun la infanoj de la homoj per ligaĵoj kiuj neniam estos rompitaĵoj. Jesuo “ne hontas nomi ilin fratoj” (Hebreoj 2:11); Li estas nia Ofero, nia Pledanto, nia Frato, portante nian homan formon antaŭ la trono de la Patro, kaj tra eternaj epokoj unu kun la raso kiun Li reaĉetis — la Filo de homo. Kaj ĉio ĉi ke la homo povas esti suprenlevita el la ruiniĝo kaj malnobleco de peko ke li povas reflekti la amon de Dio, kaj partopreni en la ĝojo de sankteco.

La prezo pagita por nia reaĉeto, la senlima ofero de nia ĉiela Patro donante Lian Filon por morti por ni devas doni al ni altajn

konceptojn de kio ni povas fariĝi per Kristo. Dum la inspirita apostolo Johano vidis la altecon, la profundon, la larĝon de la amo de la Patro al la pereantan rason, li pleniĝis de adoro kaj respektego; kaj, malsukcesante trovi taŭgan lingvon per kio esprimi la grandecon kaj sentemon de ĉi tiu amo, li vokis la mondon vidi ĝin. “Rigardu, kian amon la Patro donis al ni, ke ni estas nomataj infanoj de Dio.” 1 Johano 3:1. Kia valoro ĉi tio metas sur homon! Per peko, la filoj de homo fariĝis regatoj de Satano. Per fido en la kompensa ofero de Kristo, la filoj de Adam povis fariĝi la filoj de Dio. Alprenante homan naturon, Kristo altigas homaron. Falintaj homoj metiĝas kie, per ligo kun Kristo, ili ja povas fariĝi indaj je la nomo “filoj de Dio.”

Tia amo estas sen paralelo. Infanoj de la Ĉiela Reĝo! Karega promeso! Temo por la plej profunda medito! La senkompara amo de Dio por mondo kiu ne amis Lin! La penso havas subigan povon sur la animo, kaj alvenigas la menson en kaptitecon de la volo de Dio.

- [6] Ju pli ni studas la dian karakteron en la lumo de la kruco, des pli ni vidas indulgon, sentemon, kaj pardonemon miksitaj kun egaleco kaj justeco, kaj des pli klare ni perceptas sennombrajn atestaĵojn de amo kio estas senlima, kaj sentema kompato superregante la sopirantan simpation de patrino por ŝia kapricema infano.

LA BEZONO DE LA PEKANTO POR KRISTO

LA HOMO unue dotiĝis per noblaj povoj kaj bonekvilibriga menso. Li estis perfekta en sia korpo, kaj en harmonio kun Dio. Liaj pensoj estis puraj, liaj celoj sanktaj. Sed pro malobeo liaj povoj pervertiĝis kaj egoismo prenis la lokon de amo. Lia karaktero tiel malfortiĝis pro peko ke estis neeble por li, en lia propra forto rezisti la forton de malbono. Li kaptiĝis per Satano, kaj restus tiel ĉiam se Dio ne aparte intervenis. Estas la celo de la tentanto malhelpi la dian planon en la kreo de homo, kaj plenigi per malĝojo kaj ruiniĝo la teron. Kaj li almontrus al la tuto da ĉi tiu malbono kvazaŭ ĝi estus la rezulto de la laboro de Dio kreante la homon.

En sia senpeka stato, la homo partoprenis ĝojan komunikon kun Tiu “en kiu estas kaŝitaj ĉiuj trezoroj de saĝeco kaj de scio.” Kolo-seanoj 2:3. Sed post sia peko, li ĉesis trovi ĝojon en sankteco, kaj li serĉis malkaŝi de la ĉeesto de Dio. Tio estas ankoraŭ la stato de la nerenovigita koro. Ĝi ne estas en harmonio kun Dio, kaj trovas neniun ĝojon en komuniko kun Li. La pekanto ne povas esti feliĉa en la ĉeesto de Dio kaj li retiriĝas de la kuniĝo de sanktaj estuloj. Se li estus permesita enveni la Ĉielon, ĝi havus neniun ĝojon por li. La atmosfero de malegoisma amo kio regas tie — ĉiu koro respondante al la koro de Senlima Amo — tuŝus neniun respondantan akordon en lia animo. Liaj pensoj, liaj intereso, liaj motivoj, estus fremdaj al tiuj kiuj instigas la senpekajn loĝantojn tie. Li estus malakorda tonon en la melodio de la Cielo. La Ĉielo estus al li loko de torturo; li sopirus kaŝigi de Tiu, kiu estas ĝia lumo, kaj la centro de ĝia ĝojo. Estas nenia arbitra dekreto sur la parto de Dio kio eksterbaras la malbonularojn el la Ĉielo: ili malfermiĝas ekstere per sia propra netaŭgeco por ĝia kuniĝeco. La gloro de Dio estus al ili konsumanta fajro. Ili bonvenigus detruon, ke ili povas kaŝiĝi de la vizago de Tiu kiu mortis regajni ilin.

Estas neebla por ni, per ni mem, liberiĝi el la truo de peko en kion ni fundeniĝis. Niaj koroj estas malbonaj kaj ni ne povas ŝanĝi ilin. “Ĉu povas purulo deveni de malpurulo? Neniu.” Ijob 14:4. “La

[7]

intereso de la karno estas malamikeco kontraŭ Dio, car ĝi ne obeas al la lego de Dio, kaj ĝi ja ne povas obei.” Romanoj 8:7. Klereco, kulturo, la uzo de la volo, homa peno, ĉiu havas sian propran sferon sed ĉi tie ili estas senpovaj. Ili povas aperigi eksteran pravecon de konduto, sed ili ne povas ŝangi la koron; ili ne povas purigi la fontojn de vivo. Devas esti potenco laboranta de interne, nova vivo de supro antaŭ ol homoj povas ŝanĝiĝi de peko al sankteco. Tiu potenco estas Kristo. Lia graco sola povas vivigi la senvivajn kapablojn de la animo, kaj altiri ĝin al Dio, al sankteco.

La Savanto diris, “Se homo ne estas denove naskita,” se li ne ricevos novan koron, novajn dezirojn, celojn kaj motivojn kondukante al nova vivo, “li ne povas vidi la regnon de Dio.” Johano 3:3. La ideo ke estas necese nur evoluigi la bonon kiu nature ekzistas en homaro, estas pereiga trompo. “La natura homo ne akceptas la aferojn de la Spirito de Dio; ĉar ili estas por li malsaĝeco; kaj li ne povas ilin scii, pro tio, ke ili estas juĝataj spirite.” 1 Korintanoj 2:14. “Ne miru, ke mi diris al vi: Vi devas esti denove naskitaj.” Johano 3:7. Pri Kristo estas skribite, “En Li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj,” (Johano 1:4) — la sola nomo sub la Ĉielo, “donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj.” La Agoj 4:12.

Ne sufiĉas ekvidi la indulgecon de Dio, vidi la bonvolon, la patran sentemon de Lia karaktero. Ne sufiĉas percepti la saĝon kaj justecon de Lia lego, percepti ke ĝi estas bazita sur la eterna principo de amo. Paŭlo la apostolo komprenis ĉion ci kiam li ekkriis, “Mi konsentas al la leĝo, ke ĝi estas bona.” “La ordono estas sankta kaj justa kaj bona.” Romanoj 7:16,12. Sed li aldiris, en la amareco de sia animodolorego kaj malespero, “Mi estas karna, vendite sub pekon.” Romanoj 7:14. Li sopiris la purecon, la virton, al kiuj per si mem, li estis senpova atingi kaj ekkriis, “Ho ve, mi malfeliĉulo! kiu min liberigos el la korpo de ĉi tiu morto?” Romanoj 7:24. Tiel estas la krio kio supreniris de ŝarĝitaj koroj en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj epokoj . Al ĉio, estas nur unu solvo “Jen la Safido de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo!” Johano 1:29.

Multaj estas la figuroj per kiuj la Spirito de Dio serĉis ilustru ĉi tiun veron kaj klarigi ĝin al animoj kiuj sopiras liberiĝi de la ŝarĝo de kulpeco. Kiam, post sia peko de trompante Esavon, Jakobo forkuris el la hejmo de sia patro li estis pezata malsupren per sento de kulpeco. Soleca kaj elpelita kiel li estis, disigita de ĉio kio karigis vivon, la

sola penso kiu super ĉiuj aliaj premis sur lian animon, estis la timo ke lia peko sekcis lin de Dio, ke li estis forlasita de la Ĉielo. Li malgaje kuŝiĝis ripozi sur la senkovra tero, ĉirkaŭ li nur la solecaj montetoj, kaj super li, la Ĉielo helaj kun steloj. Dum li dormis, stranga lumo rompita trans lia vido; kaj jen, de la ebenaĵo sur kio li kuŝis, grandegaj ombraj ŝtupoj ŝajnis konduki supren ĝis la pordegoj mem de la Ĉielo kaj sur ĝi anĝeloj de Dio preterpasis supren kaj malsupren; dum, el la gloro supra, la dia voĉo estis aŭdigita en komunikaĵo de konsolo kaj espero. Tiel sciiĝis al Jakobo tio kio satigis la bezonon kaj sopiron de lia animo — Savanto. Kun ĝojo kaj dankeco li vidis vojon malkaŝitan per kio li, pekanto, povis restariĝi al komuniko kun Dio. La mistika ŝtupetaro de lia sonĝo reprezentis Jesuon, la sola perilo de komuniko inter Dio kaj la homo.

Ĉi tio estis la sama figuro al kio Kristo aludis en Lia interparolado kun Natanael, kiam Li diris, “Vi vidis la ĉielon malfermita kaj la anĝelojn de Dio suprenirantaj kaj malsupreniranta sur la Filon de homo.” Johano 1:51. En la apostatiĝo, la homo fremdigis sin de Dio; la tero estis sekciata de la Ĉielo. Trans la abismo kio kuŝis inter ili, povis esti neniu komuniko. Sed per Kristo, la tero denove ligas kun la Ĉielo. Per Siaj propraj meritoj, Kristo pontumis la abismon kion peko faris, por ke la servantaj anĝeloj povas teni komunikon kun la homo. Kristo kunigis falintan homaron en ĝiaj malforteco kaj senpovo per la Fonto de senlima forto.

Sed estas vanaj la homaj revoj de progreso, vanaj ĉiuj penoj por la altiĝo de homaro, se ili malatentas la solan fonton de espero kaj helpo por la falinta raso. “Ĉiu bona donaĵo kaj perfekta donaco” (Jakobo 1:17) estas de Dio. Estas nenio vera bonegeco de karaktero krom Li. Kaj la sola vojo al Dio estas Kristo. Li diris, “Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi” Johano 14:6.

La koro de Dio sopiras al Liaj teraj infanoj kun amo pli forta ol morto. Cedante Sian Filon, Li elverŝis al ni la tutan ĉielon en unu donaco. La vivo kaj morto kaj pledado de la Savanto, la servo de la anĝeloj, la petado de la Spirito, la Patro laborante super kaj tra ĉio, la senĉesa intereso de ĉielaj estuloj — ĉiuj estas varbataj por la regajno de la homo.

Ja, ni meditu la mirigan oferon, kio fariĝis por ni! Ni penu ŝati la laboron kaj energion kion la Ĉielo elspezas regajni la perdulojn,

kaj realvenigi ilin al la domo de la Patro. Motivoj pli fortaj, kaj periloj pli potencaj, ne povas veniĝi en funkciadon; la superaj premioj por bonfarado, la ĝuo de la Cielo, la kuniĝo de la anĝeloj, la komuniko kaj amo de Dio kaj Lia Filo, la altiĝo kaj etendo de ĉiuj niaj kapabloj tute tra eternaj epokoj — ĉu ĉi tiuj ne estas grandegaj stimuloj kaj kuraĝiĝoj por urĝigi nin doni la servon de la amanta koro al nia Kreinto kaj Regajnanto?

Kaj sur la alia flanko, la juĝoj de Dio deklaritaj kontraŭ peko, la neevitebla puno, la malnobleco de nia karaktero, kaj la fina detruo, estas prezentitaj en la Vorto de Dio por averti nin kontraŭ la servo de Satano.

Ĉu ni ne rigardu la indulgon de Dio? Kion pluan Li povas fari? Ni metu nin en la pravan rilaton al Tiu kiu amis nin per mirigega amo. Ni profitu la perilojn kiuj provizis por ni ke ni povas aliiĝi en Lian similecon, kaj restariĝi al kuniĝo kun la servantaj anĝeloj, al akordo kaj komuniko kun la Patro kaj la Filo.

[10]

PENTO

KIEL povos homo esti justa kun Dio? Kiel pekanto povos fariĝi virta? Estas nur per Kristo ke ni povas veni en harmonion kun Dio, kun sankteco; sed kiel ni povas veni al Kristo? Multaj demandas la saman demandon same kiel la amaso je la tago de Pentekosto, kiam kulpigita de peko, ili elkriis, “Kion ni faru?” La unua vorto de la respondo de Petro estis, “Ekpentu.” La Agoj 2.37,38. Je alia fojo, baldaŭ poste, li diris, “Pentu,... kaj konvertiĝu, por ke viaj pekoj estu forviŝitaj.” La Agoj 3:19.

Pento enhavas malĝojon por peko, kaj fortunante de ĝi. Ni ne malkonfesos pekon krom se ni vidas ĝian pekecon; ĝis ni fortunatas de ĝi en koro, estos nenia reala ŝanĝo en la vivo.

Estas multaj kiuj mankas la komprenon de la vera karaktero de pento. Amasoj bedaŭras ke ili pekis, kaj eĉ faris eksteran reformadon ĉar ili timas ke ilia malpravagado alvenigos suferon sur ilin. Sed ĉi tio ne estas pento laŭ la biblia senco. Ili lamentas la suferon prefere ol la peko. Tio estis la malĝojo de Esavo kiam li komprenis ke la naskrajto estis perdita de li eterne. Balaam, terurita de la anĝelo starinta en lia vojo kun eltirita glavo, konfesis sian kulpon pro timo ke li perdus sian vivon; sed estis nenia reala pento por peko, nenia ŝanĝo de celo, nenia abomeno de malbono. Judas Iscariot, post perfidinte sian Sinjoron, ekkriis, “Mi pekis, perfidante senkulpan sangon.” Mateo 27:4.

La konfeso estis premita de lia kulpa animo per terura sento de malaprobego kaj tima rigardado de juĝo. La sekvoj kiuj rezultos al li plenigis lin de teruro, sed estis nenia profunda, korrompanta malĝojo en lia animo ke li estis perfidinta la senmakulan Filon de Dio, kaj malkonfesinta la Sanktulon de Izraelo. Faraono, kiam li suferadis sub la juĝoj de Dio, konfesis sian pekon por eviti pluan punon, sed reiris al sia spito de la Ĉielo tuj post la plagoj haltiĝis. Ĉi ĉiuj lamentis la rezultojn de peko sed ne malĝojis por la peko mem. [11]

Sed kiam la koro cedis al la influo de la Spirito de Dio, la konscienco viviĝos kaj la pekanto perceptos ion de la profundo kaj sankteco de la sankta leĝo de Dio, la bazo de Lia regado en la Ĉielo kaj sur la

tero. La “lumo, kiu lumas al ĉiu homo, venanta en la mondon” (Johano 1:9) lumigas la sekretajn kamerojn de la animo, kaj la kaŝaĵoj de mallumo estas elmontrataj. Kulpiĝo ekprenas la menson, kaj koron. La pekulo havas senton de la virto de Jehovo, kaj sentas la teruron de aperante kun sia propra kulpo kaj malpureco, antaŭ la Serĉanto de koroj. Li vidas la amon de Dio, la belecon de sankteco, la ĝojon de pureco; li sopiras esti purigata kaj esti restarata al kuniĝo de la Ĉielo.

La prego de Davido post lia falo ilustras la karakteron de vera malĝojo pro peko. Lia pento estis sincera kaj profunda. Estis nenia peno moderigi lian kulpon; nenia deziro eviti la juĝon menacitan, inspiris lian preĝon. Davido vidis la abomenecon de sia peko; li vidis la malpuriĝon de sia animo; li abomenis sian pekon. Ne estas pardono por kio li preĝis, sed por pureco de koro. Li sopiris al la ĝojo de sankteco esti restarigata al harmonio kaj kuniĝo kun Dio. Ĉi tio estis la lingvo de lia animo:—

“Feliĉa estas tiu, kies krimo estas pardonita, kies peko estas kovrita.

Feliĉa estas la homo, al kiu la Eternulo ne kalkulas lian kulpon.

Kaj en kies spirito estas nenia malvero.”

La Psalmaro 32:1,2

[12]

“Korfavoru min, ho Dio, laŭ Via boneco,
 Lau Via granda kompatemeco elstreku miajn pekojn...
 Ĉar Mian kulpojn mi konsciadas;
 Kaj mia peko estas ĉiam antaŭ mi...
 Senpekigu min per hisopo, kaj mi fariĝos pura;
 Lavu min, kaj mi estos pli blanka ol neĝo...
 Koron puran kreu al mi, ho Dio,
 Kaj spiriton fidelan novigu en mi.
 Ne forpuŝu min de Via vizaĝo,
 Kaj Vian sanktan spiriton ne forprenu de mi.
 Redonu al mi la ĝojon de Via helpo;
 Kaj spirito bonfara fortikigu min...”

Liberigu min de sango, ho Dio, Dio de mia savo;
Mia lango kantos Vian justecon.”

La Psalmaro 51:1-14

Pento kiel ĉi tio, estas ekster la atingo de nia propra povo de efektivigo; ĝi estas akirata de nur Kristo, kiu supreniris alten kaj donis donacojn al homojn.

Ĝuste ĉi tie estas punkto pri kio multaj eraris, kaj tial ili malsukcesis ricevi la helpon kion Kristo deziras doni al ili. Ili opinias ke ili ne povas veni al Kristo krom se ili unue pentis kaj ke pento preparas por la pardono de iliaj pekoj. Estas vero ke pento ja antaŭiras la pardo non de pekoj; ĉar estas nur la rompita kaj penta koro kiu sentas la bezonon de Savanto. Sed ĉu la pekulo devas atendi ĝis li estas entinta antaŭ ol li povas veni al Jesuo? Ĉu pento fariĝos baro inter la pekulo kaj la Savanto?

La Biblio ne instruas ke la pekulo devas penti antaŭ ol li povas atenti la inviton de Kristo, “Venu al Mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj Mi vin ripozigos.” Mateo 11:28. Estas la Vito dio foreras de Kristo, dio honduras al vera pento. Petro klarigis la aferon en sia aserto al la Izraelidoj, kiam li diris, “Lin altigis Dio per Sia dekstra mano, por esti Estro kaj Savanto, por doni al Izrael penton kaj pardonadon de pekoj.” La Agoj 5:31. Ni ne pli povas penti sen la Spirito de Kristo veki la konsciencon, ol ni povas pardoniĝi sen Kristo.

[13]

Kristo estas la fonto de ĉiu prava impulso. Li estas la sola persono kiu povas enplanti en la koro malainon kontraŭ peko. Ĉiu deziro por vero kaj pureco, ĉiu kulpiĝo de nia propra pekeco, estas atestaĵo ke Lia Spirito kortuŝas niajn korojn.

Jesuo diris, “Kaj mi, se mi estos suprenlevita de sur la tero, altiros al mi ĉiujn homojn.” Johano 12:32. Kristo devas malkaŝiĝi al la pekanto kiel la Savanto moriante por la pekoj de la mondo; kaj dum ni rigardas la Ŝafidon de Dio sur la kruco de Kalvario, la mistero de regajno komencas malkovriĝi al niaj mensoj, kaj la boneco de Dio kondukas nin al pento. Mortante por pekuloj Kristo elmontris amon kio estas nekomprenebla; kaj dum la pekulo rigardas ĉi tiun amon, ĝi moligas la koron, impresas la menson, kaj inspiras penton en la animo.

Estas vero ke homoj iam hontiĝas de siaj pekantaj kutimoj, kaj forlasas iom de siaj malbonaj kutimoj, antaŭ ol ili konscias ke ili eltiradas al Kristo. Sed kiam ajn ili faras penon reformi, de sincera deziro prave agi estas la potenco de Kristo kio tiras ilin. Influo, de kio ili estas senkonsciaj, laboras sur la animo, kaj la konscienco estas vivigata, kaj la ekstera vivo pliboniĝas. Kaj dum Kristo altiras ilin rigardi sur Sian krucon, vidi Tiun kiun iliaj pekoj trapikis, la ordono hejme venas al la konscienco. La malboneco de ilia vivo, la profunde sidanta peko de la animo, estas malkaŝata al ili. Ili komencas kompreni ion de la virto de Kristo, kaj ekkrias, “Kia estas peko, ke ĝi postulas tian oferon por la regajno de ĝia viktimo? Ĉu ĉiu ĉi amo, ĉiu ĉi suferado, ĉiu ĉi honto postuliĝis ke ni ne pereos, sed havos eternan vivon?”

[14] La pekanto povas rezisti ĉi tiun amon, povas rifuzi tiriĝi al Kristo; sed se li ne rezistas, li tiriĝos al Jesuo; scio de la plano de savo kondukos lin al la piedo de la kruco pentantan por liaj pekoj, kiuj kaŭzis la suferojn de la kara Filo de Dio.

La sama dia menso, kiu prilaboras la naturaĵojn, parolas al la koroj de la homoj, kaj kreas neesprimeblan avidon por io kion ili ne havas. La mondaĵoj ne povas satigi ilian sopiron. La Spirito de Dio pledas kun ili serĉi por tiuj aĵoj kiuj solaj povas doni pacon kaj ripozon — la graco de Kristo, la ĝojo de sankteco. Per influoj vidataj kaj nevidataj, nia Savanto konstante laboras tiri la mensojn de homoj de la nesatigaj plezuroj de peko al la senlimaj benoj kiuj povas aparteni al ili per Li. Al ĉiuj ĉi animoj, kiuj vane serĉas trinki de la rompitaĵoj de ci tiu mondo la dia komunikaĵo estas alskribita, “La soifanto venu; kiu volas, tiu prenu donace la akvon de vivo.” Apokalipso 22:17.

Vi, kiu en koro sopiras al io pli bona ol ĉi tiu mondo povas doni, rekonu ĉi tiun sopiron kiel la voĉo de Dio al via animo. Petu de Li ke Li donu al vi penton, kaj ke Li malkaŝu Kriston al vi en Sia senlima amo, en Sia perfekta pureco. En la vivo de la Savanto la principoj de la leĝo de Dio — amo al Dio kaj homo — perfekte ekzempliĝis. Bonvolo, malegoista amo, estis la vivo de Lia animo. Estas dum ni vidas Lin, dum la lumo de nia Savanto falas sur ni, ke ni vidas la pekecon de niaj propraj koroj.

Ni eble flatis nin, kiel Nicodemus flatis sin, ke nia vivo estas virta ke nia morala karaktero estas prava, kaj opinias ke ni ne bezonas

humiligi la koron antaŭ Dio, kiel la vulgara pekanto; sed kiam la lumo de Kristo lumas en niajn animojn, ni vidos kiel malpuraj ni estas; ni perceptos la egoismon de motivo, la malamon kontraŭ Dio, kio malpurigis ĉiun agon de vivo. Tiam ni scios ke nia propra virto ja estas kiel malpuregaj ĉifonoj kaj ke la sango de Kristo sola povas purigi nin de la malpuriĝo de peko kaj renovigi niajn korojn en Sian propran similecon.

Unu radio de la gloro de Dio, unu brilo de la pureco de Kristo penetrante la animon, faras ĉiun makulon de malpuriĝo dolore klara, kaj senkovrigas la malbonformecon kaj difektojn de la homa karaktero. Ĝi faras la malsanktajn dezirojn, la malkredon de la koro, la malpurecon de la lipoj esti videblaj. La mallojalaj agoj de la pekanto farante la leĝon de Dio esti nuligata, estas malkovritaj al lia vido, kaj lia spirito estas frapita kaj afliktita sub la serĉanta influo de la Spirito de Dio. Li aboinenas sin dum li rigardas la puran senmakulan karakteron de Kristo. [15]

Kiam la profeto Daniel vidis la gloron ĉirkaŭ la ĉiela komunikanto kiu estis sendita al li, li subiĝis pro sento de sia propra malforteco kaj neperfekteco. Priskribante la efikon de la mirinda vidaĵo, li diras, “Ne restis en mi forto, mia vizaĝaspekto ŝanĝiĝis terure, kaj mi ne povis rekolekti miajn fortojn.” Daniel 10:8. La animo tiel tuŝita malamos ĝian egoismon, abomenos ĝian mem-amon, kaj serĉos per la virto de Kristo, por la pureco de koro kiu estas en harmonio kun la leĝo de Dio kaj la karaktero de Kristo.

Paŭlo diras ke “rilate la justecon, kiu fariĝas per la leĝo,” — rilate eksterajn agojn — li estis “senkulpa”; (Filipianoj 3:6) sed kiam la spiritan karakteron de la leĝo li perceptis, li vidis sin kiel pekulon! Juĝita per la litero de la lego kiel homoj aplikas ĝin al la ekstera vivo li abstinis de peko; sed kiam li rigardis la profundojn de ĝiaj sanktaj maksimumoj, kaj vidis sin kiel Dio vidis lin, li kliniĝis en humiliĝo, kaj konfesis sian kulpon. Li diras “Iam mi vivadis ekster la leĝo; sed kiam la ordono venis, la peko viviĝis, kaj mi mortis.” Romanoj 7:9. Kiam li vidis la spiritan naturon de la leĝo, peko aperis kun sia vera malbelegeco, kaj lia memestimo estis irinta.

Dio ne rigardas ĉiujn pekojn kiel de egala grandeco; estas gradoj de kulpeco en Lia opinio krom gradoj de kulpeco en la opinio de homo; sed kiel ajn bagatela ĉi tiu aŭ tiu malprava ago povas ŝajni en la okuloj de homoj, neniu peko estas malgranda en la vido de Dio. La

jugo de la homo estas partia, neperfekta; sed Dio taksas ĉiujn aĵojn kiel ili vere estas. La ebrianto estas malestimita kaj estas dirita ke lia peko eksterbaros lin de la ĉielo; dum fiero, egoismo, kaj avideco tro ofte pasas neriproĉitaj Sed ĉi tiuj estas pekoj, kiuj estas aparte [16] malplaĉaj al Dio; ĉar ili estas kontraŭ la bonvolo de Lia karaktero, de tiu neegoisma amo kio estas la ĝusta atmosfero de la nefalinta universo. Tiu kiu falas en iujn el la pli egaj pekoj eble sentas senton de sia honto kaj malriĉego kaj sia bezono de la graco de Kristo; sed la fiero sentas nenian bezonon, kaj do ĝi fermas la koron kontraŭ Kristo, kaj la senlimaj benoj kiujn Li venis por donaci.

La malfeliĉa impostisto kiu preĝis, “lio Dio, estu favora al mi pekulo” (Luko 18:13) rigardis sin kiel tre malbona viro, kaj aliaj rigardis lin same, sed li sentis sian bezonon, kaj kun sia ŝarĝo de kulpo kaj honto li venis antaŭ Dio, petante por Lia favoro. Lia koro estis malferma por la Spirito de Dio fari ĝian afablan laboron, kaj liberigi lin de la forto de peko. La fanfarona, memvirta preĝo de la fariseo montris ke lia koro estis ferma kontraŭ la influo de la Sankta Spirito Pro sia distanco de Dio li havis nenian senton de sia propra malpurigo, kontraste kun la perfekteco de la dia sankteco. Li sentis nenian bezonon, kaj li ricevis nenion.

Se vi vidas vian pekecon, ne atendu plibonigi vin. Kiom da personoj opinias ke ili ne estas sufiĉe bonaj por veni al Kristo. Ĉu vi esperas pliboniĝi per viaj propraj penoj? “Ĉu negro povas ŝanĝi sian haŭton aŭ leopardo siajn makulojn? tiel ankaŭ vi, ĉu vi povas fari bonon, al kutimiĝinte al malbono?” Jeremia 13:23. Estas helpo por ni nur en Dio. Ni devas ne atendi por pli fortaj persvadoj, por pli bonaj ŝancoj au por pli sanktaj humoroj. Ni povas fari nenion per ni. Ni devas veni al Kristo ĝuste kiel ni estas.

Sed neniu trompu sin kun la penso ke Dio, en Lia granda amo kaj favoro ankoraŭ savos eĉ la reĵetantoj de Lia graco. La treega pekeco de peko povas esti taksata nur en la lumo de la kruco. Kiam homoj urĝigas ke Dio estas tro bona elĵeti la pekulon, ili rigardu al Kalvario. Estas pro la fakto ke estas nenia alia vojo en kio homaro povos esti savata, ĉar sen ĉi tiu ofero estas neeble por la homa raso liberiĝi de la malpuriga forto de peko, kaj restariĝi al komuniko kun sanktuloj — neeble por ili renove fariĝi partoprenantoj de spirita vivo — estas [17] pro la fakto de ĉi tio ke Kristo prenis la kulpon de la malobeantoj sur Sin, kaj suferis anstataŭ la pekulo. La amo kaj sufero kaj morto de la

Filo de Dio ĉiuj atestas al la terura grandego de peko, kaj deklaras ke estas nenia libereco de ĝia forto, nenia espero de eterna vivo, sed per la cedo de la animo al Kristo.

La senpentuloj i am senkulpigas sin dirante de pretendantaj Kristanoj, “Mi estas tiel bona kiel ili estas. Ili estas ne pli abnegaciaj, sobraj aŭ singardaj en ilia konduto ol mi estas. Ili amas plezuron kaj memindulgon tiel multe kiel mi amas tiujn.” Tiel ili faras In difektojn de aliaj, preteksto por sia propra malatento de devo. Sed la pekoj kaj difektoj de aliaj ne senkulpigas iun ajn; ĉar la Sinjoro ne donis al ni eraradan homan modelon. La senmakula Filo de Dio donaciĝis kiel nia ekzemplero, kaj tiuj kiuj plendas pri la malprava direkto de pretendantaj kristanoj estas la personoj kiuj devus montri pli bonajn vivojn kaj pli noblajn ekzemplerojn. Se ili posedas tiel altnivelan koncepton de kia devus esti kristano, ĉu ne ilia propra peko estas tiom pli granda? Ili scias tion kio estas prava, sed rifuzas fari ĝin.

Singardu kontraŭ prokrastado. Ne prokrastu la taskon de forlasante viajn pekojn, kaj elserĉante purecon de koro per Jesuo. Ĉi tie estas kie miloj da miloj eraris, ĝis ilia eterna perdo. Mi ne tie ĉi longe traktados pri la mallongo kaj necerto de vivo; sed estas terura danĝero — danĝero ne sufiĉe komprenata — prokrastante cedi al la peteganta voĉo de la Sankta Spirito de Dio, elektante vivi en peko; ĉar ĉi tiu prokrasto efektive estas tia. Oni povas sin indulgi per peko kiel ajn malgrande taksita, nur riski pereon de senlima perdo. Kion ni ne venkas tio venkos nin, kaj elfaros nian detruon.

Adamo kaj F.va konvinkis sin ke pri tiel malgranda afero kiel mangante de la nepermesata frukto, ke ne rezultos tiaj teruraj sekvaĵoj kiaj Dio estis deklarintaj. Sed ĉi tiu malgranda afero estis la malobeo de la neŝanĝebla kaj sankta leĝo de Dio, kaj ĝi disigis la homon de Dio, kaj malfermis la kluzojn de morto kaj netaksebla malgajo sur nian mondon. Epoko post epoko daŭranta krio de funebro supreniris de nia tero, kaj la tuta kreitaro kune ĝemas kaj naskodoloras, pro la rezulto de la malobeo de la homo. La Ĉielo mem sentis la efikojn de lia ribelo kontraŭ Dio. Kalvario staras kiel memoraĵo de la mirega ofero bezonita por kompensi por la malobeo de dia leĝo. Ni ne rigardu pekon kiel bagatelaĵon.

Ĉiu ago de peko, ĉiu malatento aŭ reĵeto de la korfavoro de Kristo reagas sur vi mem; nuntempe ĝi obstinigas la koron, malvirtigas la volon, sensentigas la komprenon, kaj faras vin ne nur malpli inkлина

cedi, sed malpli kapabla de cedo, al la sentema petego de la Sankta Spirito de Dio.

Multaj nuntempe trankviligas agitatan konsciencan per la penso ke ili povas ŝanĝi vojon de malbono kiam ili volas ŝanĝi; ke ili povas petoli ĉirkaŭ la invitoj de indulgo, kaj ankoraŭ ree kaj renove estu impresitaj. Ili opinias ke post farante ofendon kontraŭ la Spirito de korfavoro, post ĵetante sian influon sur la flankon de Satano, en momento de terura bezonego ili povas ŝanĝi sian direkton. Sed ĉi tio estas ne tiel facile farita. La travivo, la eduko, de vivdaŭro, tiel plene estis muldinta la karakteron ke malmultaj tiam deziras ricevi la figuron de Jesuo.

Eĉ unu malprava trajto de karaktero, unu peka deziro, persiste ŝatigita, fine nuligos la tutan forton de la evangelio. Ĉiu peka sinindulgo fortigas la malinklinon de la animo kontraŭ Dio. La homo kiu elmontras malkredan maltimecon, aŭ flegman indiferenton pri la dia vero, nur rikoltas tion, kion li mem semis. En la tuta Biblio ne estas pli timiga averto kontraŭ ludante kun malbono ol la vortoj de la saĝulo, ke la pekulon “liaj propraj malbonfaroj enkaptos” (La Sentencoj de Salomono 5:22).

Kristo estas preta liberigi nin de peko, sed Li ne devigas la volon, kaj se per persista peko la volo mem nepre tute volas malbonon, kaj ni ne havas deziron esti liberigataj, se ni rifuzas akcepti Lian gracon, kion plian Li povas fari? Ni detruis nin per nia firma reĵeto de Lia amo. “Jen nun la tempo de favoro; jen nun la tago de savo.” 2 [19] Korintanoj 6:2. “Hodiaŭ, se vi aŭskultas Lian voĉon, ne obstinigu vian koron.” Hebreoj 3:7,8.

“Homo vidas tion, kio estas antaŭ Ja okuloj, sed la Eternulo rigardas en la koron” (1 Samuel 16:7) — la homa koro, kun ĝiaj konfliktaĵoj de ĝojo kaj malĝojo; la vaga, kapricema koro, kiu estas la loĝejo de tiom da malpuro kaj trompo. Li konas ĝiajn motivojn, ĝiajn verajn intencojn kaj celojn. Iru al Li kun via animo tute makulata kiel ĝi estas. Kiel la psalmisto ĵetu ĝiajn kamerojn malfermitaj al la okuloj kiuj vidas ĉion, ekkriante, “Esploru min, ho Dio, kaj konu mian koron; provu min kaj sciu miajn pensojn. Kaj rigardu, ĉu mi estas sur malbona vojo, kaj gvidu min sur la vojo de eterneco.” La Psalmaro 139:23,24.

Multaj akceptas intelektan religion, formon de dieco, dum la koro ne puriĝas. Estu via preĝo, “Koron puran kreu al mi, ho Dio, kaj

spiriton fidelan novigu en mi.” La Psalmaro 51:10. Vere traktu vian propran animon. Estu tiel serioza, tiel persista, kiel vi estus se via mortema vivo estas riskita. Tio ĉi estas afero kiu devas esti decidita inter Dio kaj la propra animo, decidita por eterneco. Supoza espero, kaj nenio alia montriĝos via ruiniĝo.

Studu la Vorton de Dio preĝante. Tiu Vorto prezentas antaŭ vi, en la leĝo de Dio kaj la vivo de Kristo, la grandajn principojn de sankto, “sen kiu neniu vidus la Sinjoron” (Hebreoj 12:14). Ĝi konvinkas pri peko; ĝi klare malkaŝas la vojon de savo. Atentu ĝin, kiel la voĉo de Dio parolante al via animo.

Dum vi vidas la abomenon de peko, dum vi vidas vin kiel vi vere estas, ne cedu al malespero. Estis pekuloj kiujn Kristo venis savi. Ni ne bezonas repacigi Dion al ni sed — ho mirinda amo! — Dio per Kristo estas “repacigante la mondon al Si.” (2 Korintanoj 5:19). Li amindumas per Sia sentema amo la korojn de Siaj erarantaj infanoj. Nenia tera gepatro povis esti tiel pacienca al la difektoj kaj eraroj de siaj infanoj kiel Dio estas al tiuj kiujn Li penas savi. Neniu povus petegi pli senteme kun la pekulo. Neniaj homaj lipoj iam ajn elverŝis pli sentemajn petegojn al la vaganto ol Li elverŝas. Ĉiuj Liaj promesoj, Liaj avertoj, estas nur la spirado de nedirebla amo. [20]

Kiam Satano venis diri al vi ke vi estas granda pekulo, suprenrigardu vian Reaĉetanton, kaj parolu pri Liaj meritoj. Tio kio helpas vin estas fidi al Lia lumo. Konfesu vian pekon, sed diru al la malamiko ke “Kristo Jesuo envenis en la mondon, por savi pekantojn” (1 Timoteo 1:15), kaj ke vi povas esti savata per Lia, senkompara amo. Jesuo demandis de Simon demandon pri du ŝuldantoj. Unu ŝuldis al sia sinjoro malgrandan sumon, kaj la alia ŝuldis al li tre grandan sumon; sed li pardonis al ambaŭ kaj Kristo demandis de Simon kiu ŝuldanto amos sian sinjoron pli. Simon respondis, “Tiu, mi supozas, al kiu li pardonis la pli grandan ŝuldon.” Luko 7:43. Ni estis grandaj pekuloj, sed Kristo mortis ke ni povas esti pardonitaj. La meritoj de Lia ofero estas ŝuficaj prezenti al la Patro por ni. Tiuj al kiuj Li pardonis plej multon plej amos Lin kaj staros plej proksime al Lia trono laŭdi Lin pro Lia granda amo kaj senlima ofero. Estas kiam ni plej tute komprenas la amon de Dio ke ni plej bone elkomprenas la pekecon de peko. Kiam ni vidas la longon de la ĉeno kiu malleviĝis por ni, kiam ni komprenas ion de la senlima ofero kiun Kristo faris por ni, la koro fandiĝas kun sentemo kaj penton. [21]

KONFESO

“KIU KAŜAS siajn pekojn, tiu ne estos feliĉa; Sed kiu ilin konfesas kaj forlasas, tiu estos pardonita.” I,a Sentencoj de Salomono 28:13.

La kondiĉoj por akirante indulgon de Dio estas simplaj kaj justaj kaj raciaj. La Sinjoro ne postulas ke ni faru iun gravegan aĵon por ke ni povos akiri pardonon de peko. Ni ne bezonas fari longajn kaj tedajn pilgrimojn aŭ suferi doloran pentpunon, por rekomendi niajn animojn al la Dio de la Ĉielo aŭ elpagi niajn pekojn; sed tiu kiu konfesas kaj forlasas sian pekon estos pardonita.

La apostolo diras, “Konfesu do viajn pekojn unu al la alia, kaj preĝu unu por la alia, por ke vi resaniĝu.” Jakobo 5:16. Konfesu viajn pekojn al Dio, ĉar nur Tiu povas pardoni ilin, kaj viajn difektojn unu al la alia. Se vi ofendas vian amikon aŭ proksimulon, vi konfesu vian malpravon, kaj estas lia devo volonte pardoni al vi. Tiam vi serĉu la pardonon de Dio, pro la fakto ke la frato kiun vi vundis estas posedo de Dio, kaj vundante lin vi pekis kontraŭ lia Kreinto kaj Reaĉetanto. La proceso alveniĝas antaŭ la sole vera Interulo, nia granda Alta Pastro, kiu estis “tentita en ĉio tiel same, tamen sen peko,” kiu “povas simpatii kun niaj malfortaĵoj” (Hebreoj 4:15), kaj povas purigi de peko ĉiun makulon de abomeneco.

Tiuj kiuj ne humiligis siajn animojn antaŭ Dio konfesante sian kulpon ankoraŭ ne plenumas la unuan kondicon de akcepto. Se ni ne travivis tiun penton kiun oni ne bedaŭras, kaj ne kun vera humilo de animo kaj rompeco de spirito konfesis niajn pekojn, abomenante nian abomenecon, ni neniam vere serĉis la pardonon de peko; kaj se ni neniam serĉis, ni neniam trovis la pacon de Dio. La sola rezono kial ni ne havas forigon de pekoj kiuj estas estintaj estas ke ni ne estas volontaj humiligi niajn korojn kaj konsenti pri la kondiĉoj de la vorto de vero. Preciza instruo doniĝis pri ĉi tiu afero. Konfeso de peko, ĉu publika ĉu privata, devus esti korsenta, kaj volonte esprimita. Tio devus ne esti urĝita el la pekulo. Ĝi devus ne fariĝi frivola kaj senzorga, aŭ devigata el tiuj kiuj havas nenian elkomprenantan senton

[22]

de la abomena karaktero de peko. La konfeso kiu estas la elverŝado de la plej interna animo trovas ĝian vojon al la Dio de senlima kompatato. La psalmisto diras, “Proksima estas la Eternulo al tiuj, kies koro estas rompita; Kaj la spirite suferantaj Li helpas.” La Psalmaro 34:18.

Vera konfeso ĉiam estas de preciza karaktero, kaj konfesas apartajn pekojn. Ili eble estas de tia naturo kia estas veniĝi antaŭ nur Dio; ili eble estas malpravaĵoj kiuj devas esti konfesataj al individuoj kiuj suferis vundon per ili; aŭ ili eble estas de publika karaktero kaj devas esti publike konfesataj. Sed ĉiu konfeso devas esti preciza kaj trafa, konfesante la pekojn mem pri kiuj vi kulpas.

En la tagoj de Samuelo, la Izraelidoj vagis for de la Dio. Ili suferis la sekvaĵojn de peko; pro la fakto ke ili perdis sian fidon sur Dio, perdis sian percepton de Lia povo kaj saĝeco regi la nacion, perdis sian konfidon en Lia kapablo defendi kaj pravigi Lian aferon. Ili forturnis de la granda Reganto de la universo, kaj deziris esti regataj kiel la nacioj ĉirkaŭ ili. Antaŭ ol ili trovis pacon ili faris ĉi tiun precizan konfeson: “Al ĉiuj niaj pekoj ni aldonis ankoraŭ malbonagon per tio, ke ni petis por ni reĝon.” 1 Samuel 12:19. La sama peko de kiu ili kulpiĝis devis esti konfesata. Ilia maldankeco subpremis iliajn animojn, kaj sekis ilin for de la Dio!

Konfeso ne estos akceptinda al Dio sen sincera pento kaj reformo. Devas esti sendubeblaj ŝanĝoj en la vivo; ĉio malplaĉa al Dio devas esti forprenata. Ĉi tiu estos la rezulto de vera malĝojo por peko. La laboro kion ni devas fari flanke ĉe ni klare elmetiĝas antaŭ ni: “Lavu vin, purigu vin; forigu la malbonon de viaj faroj antaŭ Miaj okuloj, ĉesu malbonagi. Lernu agi bone, celu justecon, helpu prematon, havigu juston al orfo, defendu aferon de vidvino.” Jesaja 1:16,17. “Se la malvirtulo redonos la garantiaĵon, repagos la rabitaĵon, agados laŭ la leĝoj de la vivo, ne farante malbonagojn: tiam li restos vivanta kaj ne mortos.” Jeĥezkel 33:15. Paŭlo diras parolante de la laboro de pento: “Jen kian zorgemon tiu sama malĝojo laŭ Dio elfaris en vi, plue kian senkulpigon, plue kian indignon, plue kian timon, plue kian sopiron, plue kian fervoron, plue kian venĝon! En ĉio vi elmontris vin puraj pri la afero.” 2 Korintanoj 7:11.

Kiam peko nuligis la moralajn perceptojn, la malbonagulo nek perceptas la difektojn de sia karaktero, nek elkomprenas la abomenon de la malbono kiun li faris; kaj krom se li cedas al la konvinka potenco de la Sankta Spirito, tiam li restas en parta blindeco al sia peko. Liaj

konfesoj ne estas sinceraj kaj fervoraj. Al ĉiu konfeso de sia kulpo aldonas apologion por senkulpigi sian vojon, deklarante ke se ne okazis iuj cirkonstancoj li ne farus ĉi tion aŭ tion, pro kiu li estis riproĉita.

Post Adam kaj Eva manĝis de la nepermesata frukto, ili pleniĝis de sento de honto kaj timo. Unue ilia sola penso estis kiel senkulpigi sian pekon, kaj eviti la time — gitan kondamnon al morto. Kiam la Sinjoro enketis pri ilia peko, Adam respondis, metante la kulpon parte sur Dion kaj parte sur sian kunulon: “La edzino, kiun Vi donis al mi kiel kunulinon, ŝi donis al mi de la arbo, kaj mi manĝis.” La virino metis la kulpon sur la serpenton, dirante, “La serpento tromplogis min, kaj mi manĝis.” Genezo 3:12,13. Kial vi kreis la serpenton? Kial vi permesis ke li eniru Eden? Ĉi tiuj demandoj estis implikataj en ŝia senkulpigo por ŝia peko, tiel debetante Dion per la respondo de ilia falo. La spirito de memjustigo estiĝis en la patro de mensogoj, kaj tion ĉiuj el la filoj kaj filinoj de Adam elmontris. Konfesojn de ĉi tiu klaso ne inspiris la dia Spirito, kaj tiuj ne estas akceptitaj al Dio. Vera pento kondukos la homon mem porti sian kulpon kaj konfesi ĝin sen trompo aŭ hipokriteco. Kiel la malfeliĉa impostisto, ne levante tiom kiel siajn okulojn ĝis la Ĉielo, li krios, [24] “Ho Dio, estu favora al mi pekulo,” kaj tiuj kiuj ja konfesas sian kulpon estos justigitaj; pro la fakto ke Jesuo pledos Sian sangon pro la penta animo.

La ekzempleroj en la Vorto de Dio de vera pento kaj humilo malkaŝas spiriton de konfeso en kiu estas nenia senkulpigo por peko, aŭ peno de memjustigo. Paŭlo ne serĉis ŝirmi sin; li koloris la pekon en ĝia plej malpala koloro, ne penante malpliigi sian kulpon. Li diras “Multajn el la sanktuloj en karcerojn mi enŝlosis, ricevinte de la ĉefpastroj la aŭtoritaton, kaj ĉe ilia mortigado mi ilin per voĉdono kondamnis. Kaj punante ilin tre ofte en ĉiuj sinagogoj, mi penis devigi ilin blasfemi; kaj forte furiozante kontraŭ ili, mi persekutis ilin eĉ ĝis fremdaj urboj.” La Agoj 26:10,11. Li ne hezitas deklari ke “Kristo Jesuo envenis en la mondon, por savi pekantojn, el kiuj mi estas la ĉefa.” 1 Timoteo 1:15.

La humila kaj rompita koro, subigita per vera pento, ŝatos ion de la amo de Dio kaj de la kosto de Kalvario; kaj kiel filo konfesas al amanta patro, tiel la vere penta homo venigos ĉiujn siajn pekojn antaŭ Dio. Kaj estas skribite, “Se ni konfesas niajn pekojn, Li estas

fidela kaj justa por pardoni al ni niajn pekojn kaj nin purigu de ĉia maljusteco.” Johano 1:9.

LA AMIKO TROVITA

Amikon karan trovis mi!
 Li amis min fremdulon;
 Per aminfluo tiris min,
 Volontan katenulon!
 Kaj tiu ĉeno ĉe la kor'
 Rompiĝos ja neniam,
 Ĉar mi al li, kaj li al mi,
 Ligiĝas nun kaj ĉiam.

Amikon karan trovis mi!
 Por mi li suferadis;
 Eternan vivon donis li,
 Sin mem li oferadis.
 Nenion propra nomas mi,
 Nenio estas mia;
 Per koro, forto, vivo, mi
 Por ĉiam estos lia.

[25]

Amikon karan trovis mi!
 Fidinda Konsilanto,
 Eterne sama restas li,
 Potenca Defendanto.
 Per kia malamiko nun
 Disiĝos amo nia?
 Per vivo, mort', infero? Ne!
 Mi restos ĉiam lia.

W.A. Leach

[26]

KONSEKRO

LA PROMESO de Dio estas, “Vi serĉos Min, kaj trovos, se vi serĉos Min per via tuta koro”. Jeremia 29:13.

La tuta koro devas cediĝi al Dio, aŭ tiu ŝanĝo neniam povas esti farita en ni per kiu ni restariĝos al Lia simileco. Per naturo ni forpeliĝis de Dio. La Sankta Spirito priskribas nian kondiĉon en tiaj vortoj kiaj ĉi tiuj: “Malvivaj per eraroj kaj pekoj” (Efesanoj 2:1); “la tuta kapo estas malsana kaj la tuta koro estas senforta” (Jesaja 1:5); “estas en ĝi nenio sendifekta” (Jesaja 1:6). Ni estas firme tenitaj en la kaptilo de Satano; “kaptite de li, por plenumi lian volon” 2 Timoteo 2:26. Dio deziras sanigi nin, nin liberigi. Sed pro la fakto ke ĉi tio postulas tutan aliĝon, renovigon de nia tuta naturo, ni devas cedi nin tute al Li.

La militado kontraŭ mem estas la plej granda batalo kio iam ajn estis batalita. La cedado de mem, cedante ĉion al la volo de Dio, postulas barakton; sed la animo devas submetigi sin al Dio antaŭ ol ĝi povas renoviĝi de sankto.

La regado de Dio ne estas, kiel Satano deziras ke ĝi aspektu, starigita sur blinda subeco, senrezona regado. Ĝi allogas la intelekton kaj la konsciencon. “Venu, kaj ni faru inter ni juĝan disputon,” (Jesaja 1:18) estas la invito de la Kreinto al la estuloj kiujn Li kreis. Dio ne devigas la volon de Siaj kreaĵoj. Li ne povas akcepti omaĝon kiu ne estas volonte kaj intelegera donata. Nura deviga subeco malebligas ĉiun veran disvolviĝon de menso aŭ karaktero; ĝi farus homon nura aŭtomato. Tia ne estas la celo de la Kreinto. Li deziras ke homo, la krona verko de Lia krea potenco, atingos la plej altan disvolviĝon ebla. Li metas antaŭ ni la alton de beno al kiu Li deziras venigi nin per Sia korfavoro. Li invitas ke ni donu nin al Li, por ke ni povas ellabori Lian volon en ni. Restas por ni elekti ĉu ni liberiĝos de la servuto de peko, por partopreni la gloran liberon de la filoj de Dio.

[27]

Donante nin mem al Dio, ni devas necese cedi ĉion kio disigus nin de Li. Tial la Savanto diras, “Kiu do el vi ne forlasas ĉiujn siajn posedaĵojn tiu ne povas esti mia disĉiplo.” Luko 14:33. Kio ajn tiros

la koron for de Dio tio devas cediĝi. Mamono estas la idolo de multaj. La amo de mono, la deziro por riĉeco, estas la ora ĉeno kio ligas ilin al Satano. Reputacio kaj monda honoro estas adorataj per alia klaso. La vivo de egoista komforto kaj libereco de respondeco estas la idolo de aliaj. Sed ĉi tiuj sklavaj ligiloj devas esti rompitaĵoj. Ni ne povas duone aparteni al Dio kaj duone aparteni al la mondo. Ni ne estas la infanoj de Dio krom se ni estas tia tute.

Estas tiuj kiuj pretendas servi Dion, dum ili fidas al siaj propraj penoj obei Lian leĝon formigi pravan karakteron kaj certigi savon. Iliaj koroj ne estas tuŝitaj per ia profunda sento de la amo de Kristo, sed ili serĉas elfari la devojn de la kristana vivo kiel tiujn kiujn Dio postulas de ili por gajni la Ĉielon. Tia religio estas inda je nenio. Kiam Kristo loĝas en la koro, la animo tiel pleniĝos de Lia amo, de la ĝojo de komuniko kun Li, ke ĝi aliĝos al Li; kaj en la medito de Li, memo forgesiĝos. Amo al Kriston estos la fonto de ago. Tiuj kiuj sentas la detenan amon de Dio, ne demandas kiom malmulte povas esti donita plenumi la postulojn de Dio; ili ne demandas por la plej malalta nivelo, sed celas ĉe perfekta konformeco al la volo de sia Reaĉetanto. Kun fervora deziro ili cedas ĉion, kaj elmontras intereson proporcie al la valoro de la objekto kion ili serĉis. Pretendo de Kristo sen ĉi tiu profunda amo, estas nur parolo, teda formalajaĵo, peza sklavlaborado.

Ĉu vi opinias ke tio estas tro granda ofero cedi ĉion al Kristo? Demandu de vi, la demandon “Kion Kristo donis al mi?” La Filo de Dio donis ĉion — vivon kaj amon kaj suferon — por nia regajno. Kaj ĉu povas esti ke ni, la neindaj objektoj de tiel granda amo, detenos [28] niajn korojn de Li? Ĉiu momento de niaj vivoj ni estas partoprenantoj de la benoj de Lia graco, kaj por ĉi tiu rezono mem ni ne povas tute elkompreni la profundojn de nescio kaj mizero el kiuj ni estis savataj. Ĉu ni povas rigardi Tiun kiun niaj pekoj trapikis, kaj ankoraŭ volonte fari spiton al Lia tuta amo kaj ofero? Konsiderante la senliman humilon de la Sinjoro de gloro, ĉu ni murmuros pro la fakto ke ni povas eniri vivon nur per konflikto kaj mem-humiliĝo?

La enketo de unu fiera koro el multaj estas, “Kial bezonas mi iri pente kaj humile antaŭ ol mi povas havi certigon de mia akcepto per Dio? Mi fingromontras vin al Kristo. Li estis senpeka, kaj, pli ol ĉi tio, Li estis la Reĝido de la Ĉielo; sed pro la homo Li fariĝis peko

por la raso. Li “estis alkalkulita al krimuloj, dum Li portis sur Si la pekon de multaj kaj petis por la krimuloj” Jesaja 53:12.

Sed kion ni cedu, kiam ni cedas ĉion — koron malpurigitan de peko, por Jesuo purigi, lavi per Lia propra sango, kaj savi per Lia senkompara amo. Kaj ankoraŭ la homoj opinias ke estas malfacile cedi ĉion! Mi hontas aŭdi ĝin priparolata, hontas skribi ĝin.

Dio ne postulas ke ni cedu ion ajn kio estas por nia plej bona profito deteni. En ĉio Li faras Li havas la bonstaton de Siaj infanoj en vido. Estu ke ĉiu kiu ne elektis Kriston povas elkompreni ke Li havas ion vaste pli bonan oferi al ili ol tio kion ili serĉas por si. La homo faras la plej grandan vundon kaj maljustecon al sia propra animo kiam li pensas kaj agas kontraŭe al la volo de Dio. Nenia vera ĝojo povas esti sur la vojo nepermesita per Tiu kiu scias kio estas plej bona, kaj tiu planas por la bono de Liaj kreaĵoj. La vojo de peko estas la vojo de mizero kaj detruo.

[29] Estas eraro gastigi la penson ke Dio ĝojas vidi Siajn infanojn suferantajn. La tuta Ĉielo estas interesita en la feliĉo de la homo. Nia ĉiela Patro ne fermas la alirojn de ĝojo al iu ajn de Siaj kreaĵoj. La diaj postuloj vokis nin eviti tiujn ĉi indulgojn kiuj alvenus suferon kaj malkontentiĝon, kiuj fermus kontraŭ ni la pordon de feliĉo kaj la ĉielo. La Regajnanto de la mondo akceptas homojn kiel ili estas, kun iliaj deziroj, neperfektoj kaj malfortoj; kaj Li ne nur purigos de peko kaj permesos regajnon per Sia sango, sed satigos la sopiron de la koro de ĉiu kiu konsentas porti Lian jugon, porti Lian ŝarĝon. Estas Sia celo partodoni pacon kaj ripozon al ĉiu kiu venas al Li por la pano de vivo. Li postulas ke ni elfaru nur tiujn ĉi devojn kiuj kondukos niajn paŝojn al altojn de feliĉego al kiu la malobeaj povas neniam atingi. La vera ĝoja vivo de la animo estas havi Kriston formigitan interne, la espero de gloro.

Multaj enketas, “Mi faras la cedon de memo al Dio kiel?” Vi deziras doni vin al Li, sed vi estas malforta en morala povo, estas en sklaveco al dubo, kaj regita per la kutimoj de via vivo de peko. Viaj promesoj kaj decidoj estas kiel ŝnuroj de sabio. Vi ne povas regi viajn pensojn, viajn impulsojn, viajn afekciojn. La scio de viaj rompitaĵoj kaj forŝulditaj garantioj malfortigas vian konfidon en via propra sincero, kaj kaŭzas vin senti ke Dio ne povas akcepti vin; sed vi bezonas ne malesperi. Kion vi bezonas kompreni estas la vera forto de la volo. Ĉi tiu estas la rega povo en la naturo de la

homo, la povo de decido, aŭ de elekto. Ĉio dependas de la prava ago de la volo. La povon de elekto Dio donis al homoj; ĝi estas la ilia por uzi. Vi ne povas ŝanĝi vian koron, vi ne povas de vi doni al Dio ĝiajn afekciojn; sed fari elekton servi Lin estas eblo por vi. Vi povas doni al Li vian volon; Li tiam elfaras en vi la volon kaj la energion laŭ Sia bonvolo. Tiel via tuta naturo venigos sub la regado de la Spirito de Kristo; viaj afekcioj centrigos sur Li, viaj pensoj estos en harmonio kun Li.

Deziroj por bono kaj sankto estas pravaj ĝis siaj limoj; sed se vi haltas ĉi tie, ili utilas por nenio. Multaj estos perditaj dum esperante kaj dezirante esti Kristanoj. Ili ne venas al la stadio de cedante la volon al Dio. Elekton esti kristanoj ili ne faras nun. [30]

Per la prava uzo de la volo tuta ŝanĝo povas esti farita en via vivo. Cedante vian volon al Kristo, vi kunligas vin kun la potenco kiu estas super ĉiuj mondpotenculoj kaj aŭtoritatoj. Vi havos forton de supro teni vin firme kaj tiel per oftega cedo al Dio vi ebligos vivi la novan vivon, eĉ la vivo de fido.

La Krucon rigardante, mi
 Miregon sentas en la kor',
 Ĉar tie en mort-agoni'
 Oferis sin la Princ' de Glor'.

Senvaloriĝas monda gajn',
 Kaj pri fiero hontas mi;
 Ne fanfaronas iam ajn,
 Krom pri la mort' sur Kalvari'.

Vanaĵoj logis min kun ĉarm',
 Nun ilin faras mi ofer';
 Humile kaj kun penta larm'
 Mi ĝojas en la sav-mister'.

Rigardu! Sangas vundoj plu-
 Malĝojo kun la amo mem!
 Ĉu iam estis tia flu'?
 El dornoj tia diadem'?

Se tutan mondon donus mi,

Tro eta estus la donac'.
Postulas amo tia çi
Tutcedon al la Dia grac'.

W.J. Downes

[31]

FIDO KAJ AKCEPTO

KIEL via konscienco viviĝis per la Sankta Spirito, vi vidis ion de la malbono de peko, de ĝia potenco, ĝia kulpo, ĝia malĝojo; kaj vi rigardas ĝin kun abomeno. Vi sentas ke peko sekcis vin de Dio, ke vi estas en servuto al la forto de malbono. Ju pli vi baraktas liberiĝi, des pli vi elkomprenas vian senpovecon. Viaj motivoj estas nepuraj; via koro estas malpura. Vi komprenas ke via vivo estis plenigita de egoismo kaj peko. Vi sopiras esti pardonata, esti purigata, liberigita. Harmonio kun Dio, simileco al Li - kion vi povas fari por akiri ĝin?

Estas paco kion vi bezonas - la pardono kaj paco kaj amo de la Ĉielo en la animo. Mono ne povas aĉeti ĝin, intelekto ne povas havigi ĝin, saĝeco ne povas atingi ĝin; vi ne povas esperi, per via propra peno, certigi ĝin. Sed Dio oferas ĝin al vi kiel donaco, “sen mono kaj sen pago.” Jesaja 55:1. Estas la via se vi nur elstreĉas vian manon kaj tenas ĝin. La Sinjoro diras, “Se viaj pekoj estas sangoruĝaj, ili fariĝos blankaj kiel neĝo; kaj se ili estas kiel skarlatato, ili fariĝos kiel lano” Jesaja 1:18. “Mi donos al vi koron novan, kaj spiriton novan Mi metos en vin.” Jeĥezkel 36:26.

Vi konfesis viajn pekojn, kaj en koro formetis ilin. Vi decidis doni vin al Dio. Nun iru al Li, kaj petu ke Li forlavos viajn pekojn, kaj donu al vi novan koron. Tiam kredu ke Li faras ĉi tiun pro la fakto ke Li promesis. Ĉi tiu estas la leciono kiun Jesuo instruis dum Li estis sur la tero, ke la donacon kion Dio promesas al ni, ni devas kredi ke ni ja ricevas, kaj ĝi estas la nia. Jesuo sanigis la personojn de iliaj malsanoj kiam ili fidis al Lia potenco; Li helpis ilin pri la aĵoj kiujn ili povas vidi, tiel inspirante ilin de konfido en Li pri aĵoj kiujn ili ne povas vidi kondukante ilin kredi al Lia potenco pardoni pekojn. Ĉi tiu Li klare deklaris kiam Li sanigis la viron kiu estis malsana de paralizo: “Por ke vi sciu, ke la Filo de homo havas aŭtoritaton sur la tero pardoni pekojn (tiam li diris al la paralizulo): Leviĝu, prenu vian liton kaj iru al via domo.” Mateo 9:6. Tiel ankaŭ Johano la evangelisto diras, parolante de la mirakloj de Kristo, “Ĉi tiuj estas

[32]

skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo estas la Kristo, la Filo de Dio, kaj ke kredante, vi havu vivon en Lia nomo.” Johano 20:31.

De la simpla biblia rakonto de kiel Jesuo sanigis la malsanulojn, ni povas lerni ion pri kiel kredi al Li por la pardono de pekoj. Ni turnu al la rakonto de la paralizulo ĉe Bethesda. La malfeliĉa suferulo estis senpova, li estis ne uzinta siajn membrojn dum tridek ok jaroj. Tamen Jesuo ordonis al li, “Leviĝu, prenu vian liton, kaj piediru.” La malsanulo povus diri, “Sinjoro, se vi faros min sanulo, tiam mi obeos Vian vorton.” Sed ne, li kredis la vorton de Kristo, kredis ke li fariĝis sanulo, kaj li faris la penon tuj; li voldevigis sin piediri kaj li ja piediris. Li agis ĉe la vorto de Kristo, kaj Dio donis la povon. Li fariĝis sanulo.

En simila maniero vi estas pekulo. Vi ne povas rekompensi por viaj estintaj pekoj, vi ne povas ŝanĝi vian koron, kaj farigi vin sankta. Sed Dio promesas fari ĉion ci por vi per Kristo. Vi kredu tiun promeson. Vi konfesu viajn pekojn, kaj donu vin al Dio. Vi voldevigu vin servu Lin. Ĝuste tiel certe Dio plenumos Sian vorton al vi. Se vi kredas la promeson — kredas ke vi estas pardonita kaj purigita — Dio provizas la fakton; vi fariĝas sanulo ĝuste kiel Kristo donis al la paralizulo la povon piediri kiam la viro kredis ke li estis sanigita. Fariĝas tiel se vi kredas ĝin.

Ne atendu senti ke vi fariĝas sanulo, sed diru, “Mi kredas ĝin. Fariĝas tiel, ne ĉar mi sentas ĝin, sed ĉar Dio promesis.”

Jesuo diras, “Kion ajn vi petos, preĝante, kredu, ke vi tion jam ricevis, kaj vi ĝin havos.” Marko 11:24. Estas kondiĉo metita al ĉi tiu promeso mdash ke ni preĝas laŭ la volo de Dio. Sed estas la volo de Dio purigi nin de peko, farigi nin Liaj infanoj, kaj ebligi nin vivi sanktan vivon. Tial ni povas peti por ĉu tiuj benoj, kaj kredi ke ni ricevas ilin, kaj danki Dion ke ni jam ricevis ilin. Estas nia privilegio iri al Jesuo kaj esti purigitaj, kaj stari antaŭ la leĝo sen honto aŭ bedaŭro. “Ekzistas do jam nenia kondamno kontraŭ tiuj, kiuj estas en Kristo Jesuo,” “kiuj iradas ne laŭ la karno, sed laŭ la spirito.” Romanoj 8:1,4.

De nun vi ne apartenas al vi mem, ĉar vi estas aĉetita per prezo. “Ne per pereemaj objektoj, oro aŭ arĝento, vi elaçetiĝis ... sed per multekosta sango, kiel de ŝafido senmakula kaj sendifekta, la sango de Kristo.” 1 Petro 1:18,19. Per ĉi tiu simpla ago de kredante Dion, la Sankta Spirito naskiĝas novan vivon en via koro. Vi estas kiel

infano naskita en la familion ne Dio, kaj Li amas vin kiel Li amas Sian Filon.

Nuntempe ĵus kiam vi jam donis vin al Jesuo, ne retiri, ne forpreni vin de Li, sed de tago al tago diru, “Mi apartenas al Kristo; mi donis min al Li”; kaj petu ke Li donu al vi Sian Spiriton, kaj gardu vin per Sia korfavoro. Kiel estas ke donante vin mem al Dio, kaj kredante Lin, vi fariĝas Lia infano, tiel vi estas vivi en Li. La apostolo diras, “Kiel do vi ricevis Kriston Jesuon, la Sinjoron, tiel vi iradu en Li.” Koloseanoj 2:6.

Iuj ŝajnas senti ke ili devas fari provon, kaj devas pruvi al la Sinjoro ke ili estas reformitaj, antaŭ ol ili povas postuli Lian benon. Sed ili povas postuli la benon de Dio eĉ nun. Ili devas havi Lian korfavoron, la Spiriton de Kristo, por helpi iliajn malfortecojn aŭ ili ne povas rezisti malbonon. Nia venado al Jesuo ĝuste kiel ni estas, pekaj, senpovaj, dependaj tre plaĉas al Li. Ni povas veni kun nia tuta malforto, nia malsaĝeco, nia pekeco kaj fali ĉe Liaj piedoj en pento. Fstas Lia gloro ĉirkaŭi nin per la brakoj de Lia amo, kaj bandaĝi niajn vundojn, purigi nin de ĉiu malpureco.

Ĉi tie estas kie miloj malsukcesas: ili ne kredas ke Jesuo pardonas ilin persone, individue. Ili ne agas supozante ke Dio intencis agi laŭ kio Li diris. Estas la privilegio de ĉiuj kiuj agas laŭ la kondiĉoj scii por si ke pardono volonte estas etendita por ĉiu peko. Formetu la suspekton ke la promesoj de Dio ne estas intencitaj por vi. Ili estas por ĉiu penta pekulo. Forto kaj korfavoro proviziĝis per Kristo esti alvenigitaj per servantaj anĝeloj al ĉiu kredanta animo. Neniu estas tiel pekaj ke ili ne povas trovi forton, purecon, kaj virton per Jesuo, kiu mortis por ili. Li atendas senvestigi ilin de iliaj vestoj makulitaj kaj malpurigitaj per peko, kaj surmeti sur ilin la blankajn robojn de virto; Li ordonas al ili vivi kaj ne morti.

Dio ne traktas nin kiel limita homo traktas unu la alian. Liaj pensoj estas pensoj de favoro, amo, kaj sentema kompatato. Li diras, “Malpiulo forlasu sian vojon, kaj krimulo siajn intencojn, kaj li returnu sin al la Eternulo, kaj ĉi Tiu lin kompatos, kaj al nia Dio, ĉar Li multe pardonas”. (Jesaja 55:7) “Mi forviŝos viajn kulpojn kiel nubon, kaj viajn pekajn kiel nebulon” Jesaja 44:22.

“Ĉar Mi ne deziras la morton de mortanto, diras la Sinjoro, la Eternulo; konvertu vin kaj vivu.” Jeĥezkel 18:32. Satano estas preta forŝteli la feliĉegajn certigojn de Dio. Li deziras preni ĉiun brileton

de espero kaj ĉiun radion de lumo for de la animo; sed vi devas ne permesi, ke li faru ĉi tiun. Do ne donu orelon al la tentanto, sed diru: “Jesuo mortis ke mi povas vivi. Li amas min, kaj voldevigas ke mi ne devus pereii. Mi havas kompatan ĉielan Patron; kaj kvankam mi misuzis Lian amon, kvankam la benojn kiujn Li donis al mi mi malŝparegis, mi leviĝos, kaj iros al mia Patro, kaj diros, “Mi pekis kontraŭ la Ĉielo kaj antaŭ vi; mi jam ne meritas esti nomata via filo; faru min kiel unu el viaj dungitoj.” La parabolo diras al vi kiel la vaganto estos ricevata: “Kiam li estis ankoraŭ malproksime, lia patro lin vidis kaj kortuŝiĝis, kaj kurinte, falis sur lian kolon kaj lin kisadis.” Luko 15:18-20.

Sed eĉ tiu ĉi parabolo, sentema kaj kortuŝanta kiel ĝi estas, ne-sufiĉe esprimas la senliman kompaton de la ĉiela Patro. La Sinjoro deklaras per Sia profeto, “Mi ekamis vin per amo eterna, tial Mi altiris vin favorkore.” Jeremia 31:3. Dum la pekulo ankoraŭ estas malproksima de la domo de la Patro, malŝparante sian vivrimedon en fremda lando, la koro de la Patro sopiras al li; kaj ĉiu sopiro vekigita en la animo reveni al Dio, estas sole la sentema petegado de Lia Spirito, amindumante, petegante, tirante la vaganton al la koro de amo de la Patro.

[35]

Kun la abundaj promesoj de la Biblio antaŭ vi, ĉu vi povas cedi al dubo? Ĉu vi povas kredi ke kiam la malfeliĉa pekulo sopiras forlasi siajn pekojn, ke la Sinjoro severe detenas lin de venante al Siaj piedoj en pento? Forigu tiajn pensojn! Nenio povas malutili vian propran animon pli ol gastigi tian koncepton de nia ĉiela Patro. Li malamas pekon sed Li amas la pekulon, kaj Li donis Sin en la persono de Kristo, ke ĉiu kiu permesas povas esti savata, kaj posedi eternan feliĉegon en la regno de gloro. Kia pli forta aŭ pli sentema lingvo povas esti uzita ol tio kion Li elektis esprimi Sian amon de ni? Li deklaras, “Ĉu povas virino forgesi sian infaneton kaj ne kompati la idon de sia ventro? eĉ se ili forgesos, Mi vin ne forgesos.” Jesaja 49:15.

Plibonigu vian mienon, vi kiu dubas kaj tremas; ĉar Jesuo vivas por fari propeton por ni. Danku Dion por la donaco de Lia kara Filo, kaj preĝu ke Li ne devis morti por vi vane. La Spirito invitas vin hodiaŭ. Venu kun via tuta koro al Jesuo, kaj vi povas postuli Lian benon.

Dum vi legas la promesojn, memoru ke ili estas la esprimoj de nedireblaj amo kaj kompatato. La granda koro de Senlima Amo estas tirata en direkto al la pekulo kun abunda kompatato. “Ni havas la elaçeton per Lia sango, la pardonon de niaj pekoj.” Efesanoj 1:7. Jes, nur kreu ke Dio estas via helpanto. Li volas renovigi Sian moralan bildon en la homo. Dum vi tiras proksimen al Li kun konfeso kaj pentado, Li tiros proksimen al vi kun favoro kaj pardonado.

[36]

LA PROVO DE DISĈIPLECO

“SE IU homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo; la malnovaĵoj forpasis, jen ili jam estiĝis novaj.” Korintanoj 5:17.

Persono eble ne povas determini la ĝustan tempon aŭ lokon, aŭ sekvi la tutan vicon de cirkonstancoj de la procedo de konverto; sed ĉi tio ne pruvas ke li estas nekonvertita. Kristo diras al Nicodeinus, “La vento blovas, kie ĝi volas, kaj ĝian voĉon vi aŭdas, sed vi ne scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras; tia estas ĉiu, kiu estas naskita de la Spirito.” Johano 3:8. Kiel la vento, kio estas nevidebla, tamen la rezultoj de tio estas klare viditaj kaj sentitaj, tiel estas la Spirito de Dio en ĝia prilaborado de la homa koro. Tiu regeneranta povo, kiun neniam homa okulo povas vidi, naskigas novan vivon en la animo; ĝi kreas novan estulon en la bildo de Dio. Kvankam la laboro de la Spirito estas silenta kaj nepercepta, ĝiaj rezultoj estas montritaj. Se la koro estis renovigita per la Spirito de Dio, la vivo portos ateston de la fakto. Kvankam ni ne povas fari ion ajn sanĝi niajn korojn, aŭ venigi nin en harmonion kun Dio; kvankam ni devas ne fidi eĉ iomete al ni aŭ niaj bonaj agoj niaj vivoj malkaŝos ĉu la graco de Dio loĝas en ni. Ŝanĝo estos vidita en la karaktero, la kutimoj, la okupoj. La kontrasto estos klara kaj difinita inter kio ili estis kaj kio ili estas. La karaktero malkaŝiĝas, ne per kelkfojaj bonaj faroj kaj kelkfojaj malbonaj faroj, sed per la tendenco de la kutimaj vortoj kaj agoj.

Estas vere ke povas esti ekstera praveco de sintenado sen la renoviga povo de Kristo. La amo de influo kaj la deziro por la estimo de aliaj povas produkti bone aranĝitan vivon. Mem-respekto povas konduki nin eviti la aspekton de malbono. Egoista koro povas fari malavarajn agojn. Per kiujn metodojn, do, ni determinu sur kies flanko, ni estas?

Kiu havas la koron? Kun kiu estas viaj pensoj? Al kiu ni amas interparoli? Kiu havas niajn plej varmajn afekciojn kaj niajn plej bonajn energiojn? Se ni apartenas al Kristo, niaj pensoj estas kun Li, kaj niaj plej dolĉaj pensoj estas pri Li. Ĉio kion ni havas kaj estas

dediĉiĝis al Li. Ni sopiras porti Lian bildon, spiri Lian spiriton, fari Lian volon, kaj esti plaĉaj al Li en ĉio.

Tiuj kiuj fariĝas novajn kreitulojn per Kristo Jesuo elvenigos la fruktojn de la Spirito, “amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco, mildeco, sinregado.” Galatoj 5:22,23. Ili ne plu formigos sin laŭ la antaŭaj voluptoj; sed per la fido de la Filo de Dio ili sekvos en Liaj paŝoj, reflektos Lian karakteron, kaj purigos sin eĉ kiel Li estas pura. La objektojn, kiujn ili je unu fojo malamis, ili nun amas; kaj la objektojn, kiujn ili je unu fojo amis, ili malamas. La fierulo kaj sintrudemulo fariĝas miĉda kaj korhumila en koro. La vanulo kaj malestimulo fariĝas serioza kaj netruda. La ebrulo fariĝas sobra, kaj la diboĉulo pura. La vanaj moroj kaj modoj de la mondo estas formetitaj. Kristanoj ne serĉos la “eksteran ornamon,” sed “la kaŝitan homon de la koro en la nedifektebla vesto de spirito milda kaj trankvila.” 1 Petro 3:3,4.

Estas nenia atestaĵo de vera pento krom se ĝi ellaboras reformon. Se li plenumos la promeson, redonos kion li rabis, konfesos siajn pekojn, kaj amos Dion kaj siajn kunajn homojn, la pekulo povas esti certa ke li jam pasis de morto al vivo.

Kiam, kiel erarantaj pekaj estuloj, ni venas al Kristo kaj fariĝas partoprenantoj de Lia pardonanta favoro, amo ekkreskas en la koro. Ĉiu ŝarĝo estas malpeza; ĉar la jugo kiu Kristo altrudas estas facila. Devo fariĝas plaĉo, ofero plezuro. La vojo kiu antaŭe ŝajnis kiel vualita per mallumo, fariĝas hela per radioj de la Suno de Justeco. [38]

La beleco de la karaktero de Kristo estos vidita en Liaj sekvantoj. Estis Lia plezuro fari la volon de Dio. Amo al Dio, fervoro por Lia gloro, estis la reganta povo en la vivo de nia Savanto. Amo beligis kaj nobligis ĉiujn Liajn agojn. Amo estas de Dio. La nedediĉita koro ne povas estigi aŭ produkti ĝin. Ĝi troviĝas nur en la koro kie Jesuo regas. “Ni amas, ĉar Li unue nin amis.” 1 Johano 4:19. En la koro renovigita per Lia korfavoro, amo estas la principo de ago. Ĝi modifas la karakteron, regas la impulsojn, kontrolas la pasiojn, subigas malamon, kaj nobligas la afekciojn. Ĉi tiu amo, konservita en la animo, dolĉigas la vivon, kaj verŝas rafinantajn influojn sur ĉiun ĉirkaŭe de ĝi.

Estas du eraroj kontraŭ kiuj la infanoj de Dio — precipe tiuj kiuj ĵus komencis fidi al Lia korfavoro — bezonas precipe antaŭgardi. La unua, jam longe traktita, estas tiu de fidante al iliaj propraj agoj,

fidante al io kion ili povas fari por venigi ilin en harmonion kun Dio. Li kiu penas sanktiĝi per siaj propraj agoj de obeante la leĝon, penas neeblecon. Ĉio kion la homo povas fari sen Kristo estas malpurigita per egoismo kaj peko. Estas la difavoro de Kristo sola, per fido, kiu povas sanktigi nin.

La malo kaj ne malpli danĝera eraro estas, ke kredo al Kristo liberigas la homojn de obeante la leĝon de Dio; ke ĉar per fido sola, ni fariĝas partoprenantoj de la difavoro de Kristo, niaj agoj neniel rilatas al nia reaĉeto.

Sed rimarku ĉi tie ke obeo ne estas nur ekstera konsento, sed la servo de amo. La leĝo de Dio estas esprimo de Lia naturo mem; ĝi estas enkorpiĝo de la granda principo de amo, kaj tial estas la fundamento de Lia regado en la Ĉielo kaj la Tero. Se niaj koroj estas renovigitaj en la simileco de Dio, se la dia amo estas enplantita en la animo, ĉu ne la leĝo de Dio estos plenumita en la vivo? Kiam la principo de amo enplantiĝas en la koro kiam la homo renoviĝas laŭ la formo de Tiu, kiu kreis lin, la nova interligo plenumiĝas, “Mi metos Miajn leĝojn en ilian internon, kaj sur ilia koro Mi ilin skribos.” Hebreoj 10:16. Kaj se la leĝo estas skribita en la koio, ĉu ĝi ne formigos la vivon? Obeo - la servo kaj lojaleco de amo — estas la vera signo de disĉipleco. Tial la Skribaĵo diras, “Jen estas la amo al Dio: ke ni observas Liajn ordonojn.” “Kiu diras: Mi lin konas, kaj ne observas Liajn ordonojn, tiu estas mensoganto, kaj la vero ne estas en li.” 1 Johano 5:3; 2:4. Anstataŭ liberigante la homon de obeo, estas fido, kaj fido sola, kiu igas ke ni estu partoprenantoj de la difavoro de Kristo, kiu ebligas ke ni faru obeon.

Ni ne gajnas savon per nia obeo; ĉar savo estas senpaga donaco de Dio, esti ricevita per fido. Sed obeo estas la frukto de fido. “Vi scias, ke Li elmontriĝis, por forigi pekojn; kaj peko ne estas en Li. Ĉiu, kiu restas en Li, ne pekas; ĉiu pekanto Lin ne vidis, nek Lin konas.” 1 Johano 3:5,6. Jen estas la vera provo. Se ni restas en Kristo, se la amo de Dio loĝas en ni, niaj sentoj, niaj pensoj, niaj celoj, niaj agoj, estos en harmonio kun la volo de Dio kiel esprimita en la maksimumoj de Lia sankta leĝo. “Infanetoj, neniu vin forlogu; kiu faras justecon, tiu estas justa tiel same, kiel Li estas justa.” 1 Johano 3:7. Justeco estas difinita per la normo de la sankta leĝo de Dio, kiel esprimita en la dek maksimumoj donitaj sur Sinai.

Tiu tiel-nomita fido en Kristo kiu pretendas liberigi la homojn de la devigo de oboe al Dio, ne estas fido, sed supozo. “Per graco vi saviĝis per fido.” Sed “fido, ne havante farojn, estas en si mem malviva.” Efesanoj 2:8; Jakobo 2:17. Jesuo diris pri Si antaŭ ol Li venis al la tero “Plenumi Vian volon, Mia Dio, Mi deziras, Kaj Viaj ordonoj estas en Mia koro.” La Psalmaro 40:8. Kaj ĵus antaŭ ol Li resuprenleviĝis al la Ĉielo Li deklaris, “Mi observis la ordonojn de Mia Patro kaj restadas en Lia amo”. Johano 15:10. La Skribaĵo diras: “Per ĉi tio ni scias, ke ni konas Lin: se ni observas Liajn ordonojn... Kiu diras, ke li restas en Li, tiu mem devus tiel iradi, kiel Li iradis.” 1 Johano 2:3-6. “Pro tio, ke Kristo ankaŭ suferis pro vi, postlasante por vi ekzemplon, por ke vi sekvu Liajn postesignojn.” 1 Petro 2:21. [40]

La kondiĉo de eterna vivo estas nun ĝuste kio ĝi ĉiam estis — ĝuste kio ĝi estis en paradizo antaŭ la falo de niaj unuaj gepatroj — perfekta oboe al la leĝo de Dio, perfekta virto. Se eterna vivo estus donita por iu kondiĉo neatingante ĉi tion, tiam la feliĉo de la tuta universo estus endanĝerigita La vojo estos malfermita por peko, kun ĉio de ĝia trajno de malĝojo kaj mizero, esti senmortigita.

Estas eble por Adamo, antaŭ la falo, formigi virtan karakteron per oboe al la leĝo de Dio. Sed ĉi tion li lasis ne-faritan kaj pro lia peko niaj naturoj estas faligitaj, kaj ni ne povas virtigi nin. Pro la fakto ke ni estas pekaj, nesanktaj, ni ne povas perfekte obei sanktan legon. Ni havas nenian virton memstara per kiu atingi la postulojn de la leĝo de Dio. Sed Kristo faris elirejon por ni. Li vivis sur la Tero meze de afliktoj kaj tentoj tiaj, kiajn ni devas renkonti. Li vivis senpekan vivon. Li mortis por ni, kaj nun Li proponas preni niajn pekojn kaj doni al ni Sian virton. Se vi donas vin al Li, kaj akceptas Lin kiel vian Savanton, tiam, tiel peka kiel via vivo eble estis, pro Li vi estis kalkulita virta. La karaktero de Kristo anstataŭas vian karakteron, kaj vi estas akceptita antaŭ Dio kvazaŭ vi ne pekis

Pli ol ĉi tio, Kristo ŝanĝas la koron. Li loĝas en via koro per fido. Vi devas konservadi ĉi tiun kunigon kun Kristo per fido kaj la daŭra cedo de via volo al Li; kaj tiel longe kiel vi faras ĉi tion, Li eĵfaros en ni la volon kaj la energion laŭ Sia bonvolo. Tial vi povas diri, “Tiun vivon, kiun mi vivas en karno, mi vivas en fido al la Filo de Dio, kiu min amis kaj Sin donis pro mi.” Galatoj 2:20. Tial Jesuo diris al Siaj disĉiploj, “Parolas ne vi, sed la Spirito de via Patro parolas en

vi.” Mateo 10:20. Tial kun Kristo energiante en vi, vi elmontros la saman spiriton kaj faros la samajn agojn — agoj de virto, obeo.

[41] Tial ni havas nenion en ni pri kio fanfaroni. Ni havas nenian bazon por memekzaltiĝo. Nia sola bazo de espero estas en la virto de Kristo kalkulita al ni kaj en tio farita per Lia Spirito laborante en kaj pere de ni.

Kiam ni parolas pri fido estas distingo kiu devus esti memorita. Estas tipo de kredo kio estas tute aparta de fido. La ekzisto kaj potenco de Dio, la vero de Lia Vorto, estas faktoj kiujn eĉ Satano kaj siaj aregoj ne povas ĉe koro nei. La Biblio diras ke, “La demonoj ankaŭ kredas kaj tremas;” sed ĉi tio ne estas fido. Jakobo 2:19. Kie estas ne nur kredo al la Dia Vorto, sed cedo de la volo al Li; kie la koro estas cedita al Li, la afekcioj fiksitaj sur Li, tie estas fido — fido kiu havas agojn per amo kaj purigas la animon. Per ĉi tiu fido la koro renoviĝas laŭ la formo de Dio. Kaj la koro kiu en ĝia nerenovigita stato ne estas obeema al la leĝo de Dio, nek ja povas esti, nun plezuriĝas je ĝiaj sanktaj maksimumoj, ekkriante kun la Psalmisto, “Kiel mi amas Vian instruon! La tutan tagon mi meditas pri ĝi.” La Psalmaro 119:97. Kaj la postulo de la leĝo plenumiĝas en ni, “Kiu iradas ne laŭ la karno, sed laŭ la Spirito.” Romanoj 8:4.

[42] Estas tiuj kiuj estas konintaj la pardonantan amon de Kristo, kaj kiuj vere deziras esti infanoj de Dio, sed ili elkomprenas ke ilia karaktero estas neperfekta, ilia vivo difektita, kaj ili estas pretaj dubi ĉu la Sankta Spirito renovigis iliajn korojn. Al tiuj mi diras, Ne fortiru en malespero. Ni ofte devas kliniĝi kaj plori ĉe la piedoj de Jesuo pro niaj nesufiĉaĵoj kaj eraroj; sed ni ne estu senkuraĝiĝaj. Eĉ se nin venkos la malamiko, ni ne estas forigitaj, ne forlasitaj kaj reĵetitaj de Dio. Ne; Kristo estas ĉe la dekstra mano de Dio, kiu ankaŭ propetas por ni. Diris la amata Johano: “Ĉi tion mi skribas al vi, por ke vi ne peku. Kaj se iu pekas, ni havas Advokaton ĉe la Patro, Jesuon Kriston, la justan.” 1 Johano 2:1. Kaj ne forgesu la vortojn de Kristo, “La Patro mem vin amas.” Johano 16:27. Li deziras restarigi vin al Si, vidi Sian propran purecon kaj sanktecon reflektitaj en vi. Kaj se vi nur cedu vin al Li, Li, kiu komencis bonan laboron en vi, daŭrigos ĝin ĝis la tago de Jesuo Kristo. Preĝu pli fervore; kreu pli plene. Kiel ni ekmalfidis al nia propra povo, ni fidu al la povo de nia Regajnanto, kaj ni laŭdos Tiun, kiu estas la savanto de nia vizaĝo. (La Psalmaro 42:11)

Ju pli proksima vi venas al Jesuo, des pli difektita vi aperiĝos al viaj propraj okuloj; ĉar via vido estos pli klara kaj viaj neperfektaĵoj estos viditaj en plena kaj klara kontrasto al Lia perfekta naturo. Ĉi tiu estas atesto ke la trompiĝoj de Satano perdis sian forton; ke la viviganta influo de la Spirito de Dio vekas vin.

Nenia profunde kuŝanta amo de Jesuo povas loĝi en tiu koro kiu ne elkomprenas sian propran pekecon. La animo, kiu estas aligita per la difavoro de Kristo, admiros Lian dian karakteron; sed se ni ne vidas nian propran moralan malbonformaĵon, estas nemiskomprenebla atesto ke ni ne havis vidon de la beleco kaj bonegeco de Kristo.

Ju malpli ni vidas por estimi en ni, des pli ni vidos por estimi en la senlimaj pureco kaj beleco de nia Savanto. Vido de nia pekeco pelas nin al Tiu, kiu povas pardoni; kaj kiam la animo, elkomprenante ĝian senhelpecon, etendiĝas al Kristo, Li malkaŝos sin kun potenco. Ju pli nia sento de bezono pelas nin al Li kaj al la Vorto de Dio, des pli ekzaltitajn vidojn ni havos de Lia karaktero, kaj des pli plene ni reflektos Lian bildon.

Ĉiela Lumo, tra la noktnebulon
 Gvidu antaŭen;
 Min, de la patra hejmo forvagulon,
 Gvidu antaŭen.
 Ne sopirante malproksiman vidon,
 Mi petas nur por ĉiu paŝo gvidon.

Ne ĉiam faris preĝon mi ĉi tian:
 “Gvidu antaŭen”!
 Sed nun elektu vi la vojon mian,
 Gvidu antaŭen.

Iam la koron regis fieremo:
 Fardonu pri tiama forvagemo!
 Vi, dum la estinteco min gvidinte,
 Sendube gvidos,
 Ĝis mi, barilon ĉian transpasinte,
 Matenon vidos,

Kaj rerenkontos kun ĝojplena koro
Amaton ĉiun en anĝela ĥoro.

M.C. Butler

KRESKADU EN KRISTON

LA ŜANĜO de koro per kiu ni iĝas infanoj de Dio estas en la Biblio preparolita kiel naskiĝo. Denove, ĝi estas komparita al la ĝermado de la bona semo semita per la kulturisto. Tiel same tiuj, kiuj ĵus konvertiĝis al Kristo estas, kiel “ĵusnaskitaj suĉinfanoj;” “kreskadi” (1 Petro 2:2; Efesanoj 4:15) al la staturo de la geviroj en Kristo Jesuo. Aŭ kiel la bona semo semita en la kampo, ili estas kreskadi kaj porti frukton. Jesaja diras ke, “oni nomu ilin kverkoj de justeco, plantaĵo de la Eternulo por Lia gloro.” Jesaja 61:3. Tial de la natura vivo, ilustraĵoj preniĝas, por helpi nin pli bone kompreni la misterajn verojn de la spirita vivo.

Ne eĉ ĉio de la saĝeco kaj lerteco de la homo povas produkti vivon en la malplej granda objekto en la naturo. Estas sole per la vivo kiun Dio mem partodonis, ke aŭ plantaĵo aŭ besto povas vivi. Tial estas sole per la vivo de Dio ke la spirita vivo naskiĝas en la koroj de la homoj. Krom se homo estas “naskita de supro,” (Johano 3:3 King James Version margin) li ne povas esti partoprenanto de la vivo kiun Kristo venis por doni.

[44]

Kiel kun vivo, tiel kun kresko. Estas Dio kiu igas la burĝonon flori kaj la floron frukti. Estas per Lia potenco ke la semoj evoluas, “unue folio, poste spiko, poste plena greno en spiko.” Marko 4:28. Kaj la profeto Hoŝea diras pri Izrael, ke “Li ekfloros kiel rozo.” “Ili reviviĝos kiel greno, ili floros kiel vinberbranĉo.” Hoŝea 14:5,7. Kaj Jesuo invitas nin “Pripensu la liliojn, kiel ili kreskas.” Luko 12:27. La plantoj kaj floroj kreskas ne per sia propra zorgo aŭ dezirego aŭ peno, sed per ricevo de tio kion Dio provizis por plenumi ilian vivon. La infano ne povas, per ia dezirego aŭ potenco memstare, aldoni al sia staturo. Ne pli povas vi, per dezirego aŭ peno memstare, akiri spiritan kreskon. La planto, la infano, kreskas per ricevo el siaj ĉirkaŭaĵoj de tio kio servas ĝian vivon — aero, sunlumo, kaj nutraĵo. Kio ĉi tiuj donacoj de la naturo estas al la besto kaj la planto, tio estas Kristo al tiuj kiuj fidis al Li. Li estas iliaj “lumo eterna,” “suno kaj ŝildo.” Jesaja 60:19; La Psalmaro 84:11. Li estos “por Izrael kiel

roso.” “Li malleviĝu, kiel pluvo sur falĉitan herbejon.” Hoŝea 14:5; La Psalmaro 72:6. Li estas la vivanta akvo, “La pano de Dio ... kiu malsupreniras de la Ĉielo kaj donas vivon al la mondo” Johano 6:33.

En la senkompara donaco de Lia Filo, Dio ĉirkaŭis la tutan mondon per atmosfero de korfavoro, tiel reala kiel la aero kiu cirkulas ĉirkaŭ la globo. Ĉiuj kiuj elektas spiri ĉi tiun viv-donantan atmosferon vivos, kaj kreskados ĝis la staturo de la geviroj en Kristo Jesuo.

Kiel la floro turnas al la suno, ke la helaj radioj povas helpi en la perfektigo de ĝiaj beleco kaj simetrio, tiel ni devas turni al la Suno de Justeco, ke la lumo de la Ĉielo povas lumi sur nin, ke nia karaktero povas evolui en la similecon de Kristo.

[45] Jesuo instruas la saman aferon kiam Li diras, “Restadu en Mi, kaj Mi en vi. Kiel la branĉo ne povas de si mem doni frukton, se ĝi ne restas en la vinberarbo, tiel ankaŭ vi ne povas, se vi ne restas en Mi ... Sen Mi vi nenion povas fari.” Johano 15.4,5. Vi estas ĝuste tiel dependa sur Kristo, por vivi sanktan vivon, kiel estas la branĉo stir la gepatro radikaĵo por kresko kaj fruktpleneco. Krom Li vi havas nenian vivon. Vi havas nenian forton rezisti tenton aŭ kreski en korfavoro kaj sankteco. Longante en Li vi povas prosperi. Tirante vian vivon de Li, vi nek velkiĝos nek estos senfrukta. Vi estos kiel arbo plantita apud la riveroj de akvo.

Multaj havas ideon ke ili devas fari iun parton de la laboro sole. Ili fidis al Kristo por la pardono de peko, sed nun ili serĉas per siaj propraj penoj vivi juste. Sed ĉiu tia peno devas malsukcesi. Jesuo diras, “Sen Mi vi nenion povas fari.” Nia kresko en difavoro, nia ĝojo, nia utileco — ĉiuj dependas sur nia kunigo kun Kristo. Estas per komuniko kun Li tage, hore — loĝante en Li — ke ni kreskas en difavoro. Li estas ne nur la aŭtoro sed la rafinanto de nia fido. Estas Kristo unue kaj laste kaj ĉiam. Li devas esti kun ni, ne nur ĉe la komenco kaj la fino de nia vojo, sed ĉe ĉiu paŝo de la vojo. Davido diras: “Ĉiam mi vidas la Eternulon antaŭ mi; ĉar Li estas ĉe mia dekstra mano, mi ne falos.” La Psalmaro 16:8.

Ĉu vi demandas, “Kiel mi povas loĝi en Kristo?” — Tiel same kiel vi ricevis Lin la unuan fojon. “Kiel do vi ricevis Kriston Jesuon, la Sinjoro, tiel vi iradu en Li.” “Virtulo vivos per sia fideleco.” Koloseanoj 2:6 Hebreoj 10:38. Vi donis vin al Dio, esti la Lia tute, servi kaj obei Lin, kaj vi prenis Kriston kiel vian Savanton. Vi ne

povis memstare kompensi viajn pekojn aŭ ŝanĝi vian koron; sed jam doninte vin al Dio, vi kredis ke Li pro Kristo faris ĉion ĉi por vi. Per fido vi apartenis al Kristo kaj per fido vi kreskados en Li — donante kaj prenante. Vi devas doni ĉion — vian koron, vian volon, vian servon — donu vin al Li obei ĉiujn Liajn postulojn: kaj vi devas preni ĉion — Kriston, la pleneco de ĉiu beno, loĝi en via koro, esti via forto, via justeco, via eterna helpanto — doni al vi forton obei. [46]

Konsekru vin al Dio en la mateno; faru ĉi tion kiel vian unuan laboron. Via preĝo estu: “Prenu min, Ho la Sinjoro, kiel tute la Vian. Mi kuŝigos ĉiujn miajn planojn ĉe Viaj piedoj. Uzu min hodiaŭ por Via servo. Loĝu en mi, kaj miaj laboroj estu faritaj en Vi.” “Ĉi tiu estas ĉiutaga afero. Ĉiu-matene konsekru vin al Dio por tiu tago. Cedu ĉiujn viajn planojn al Li, esti plenumitaj aŭ ceditaj kiel Lia providenco indikos. Tial tagope vi povas doni vian vivon en la manojn de Dio, kaj tial via vivo estos formigita pli kaj pli laŭ la vivo de Kristo.

Vivo en Kristo estas vivo de ripozeco. Eble ne estas ekstazo de sento sed devas esti loĝanta, ripoza konfido. Via espero ne estas en vi mem; ĝi estas en Kristo. Via malforteco kuniĝas al Lia forto, via nescio al Lia saĝo, via emo erari kuniĝas al Lia daŭranta potenco. Tial vi devas ne fidi al vi, la menso ne tenu la atenton sur memo, sed fidu al Kristo. La menso tenu la atenton sur Lia amo, sur la beleco, la perfekteco de Lia karaktero. Kristo en Sia abnegacio, Kristo en Sia humileco, Kristo en Siaj pureco kaj sankteco, Kristo en Sia senkompara amo — jen la temo de la medito de la animo. Estas amante Lin, imitante Lin, dependante tute sur Li, ke vi estas aliigita en Lian similecon.

Jesuo diras “Restadu en Mi.” (Johano 15:4) Ĉi tiuj vortoj komunikas la ideon de ripozo, stabileco, konfido. Li reinvitas, “Venu al Mi, ... kaj Mi vin ripozigos.” Mateo 11:28. La vortoj de la Psalmisto esprimas la saman penson: “Silentu antaŭ la Eternulo kaj esperu al La. “La Psalmaro 37:7 (“Ripozu en la Eternulo kaj atendu pacience por Li.” King James Version Ps 37:7) Kaj Jesaja donas la certigon “En kvieteco kaj fido” estos “via forto.” Jesaja 30:15. Ĉi tiu ripozo ne estas trovita en neago; ĉar en la invito de la Savanto la promeso de ripozo kunigas kun la voko al laboro: “Metu sur vin mian jugon ... kaj vi trovas ripozon.” Mateo 11:29. La koro kiu ripozas pli plene sur Kristo estas la pli fervora kaj aktiva en laboro por Li. [47]

Kiam la menso tenas la atenton sur memo, ĝi estas fortunita de Kristo, la fonto de forto kaj vivo. Tial estas la konstanta peno de Satano konservi la atenton for de la Savanto, kaj tiel malhelpi la kunigon kaj komunikon de la animo kun Kristo. La plezuroj de la mondo, la zorgoj kaj konsterniĝoj kaj malĝojoj de la vivo, la eraroj de aliaj, aŭ niaj propraj eraroj kaj neperfektaĵoj — al iun aŭ ĉiujn el ĉi tiuj li serĉos disigi la menson. Ne estu miskondukita per liaj elpenaĵoj. Multajn kiuj estas vere konsciencaj, kaj kiuj deziras vivi por Dio, li tro ofte kondukas por teni ilian atenton sur iliaj neperfektaĵoj kaj malfortaĵoj, kaj tiel disigante ilin de Kristo, li esperas gajni la venkon. Ni devas ne farigi memon la centron, kaj indulgi maltrankvilon kaj timon pri ĉu ni estos savitaj. Ĉiuj el tiuj fortunigas la animon de la Fonto de nia forto. Fordonu la konservadon de via animo al Dio, kaj konfidu al Li. Parolu kaj pensu pri Jesuo. Perdu memon en Li. Formetu ĉiun dubon; forpelu viajn timojn. Diru kun la Apostolo Paŭlo: “Mi vivas; jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi; kaj tiun vivon, kiun mi vivas en karno, mi vivas en fido al la Filo de Dio, kiu min amis kaj Sin donis pro mi.” Galatoj 2:20. Restadu en Dio, Li povas konservi tion kion vi fordonis al Li. Se vi lasos vin en Liaj manoj Li kondukos vin al sukceso pli ol venkanto per Li kiu amis vin.

Kiam Kristo prenis la homan naturon sur Si, Li kunligis la homaron al Li per ligo de amo kiu povas neniam esti rompita per iu ajn potenco krom la elekto de la homo mem. Satano konstante sugestas allogaĵojn persvadi nin rompi ĉi tiun ligon — elekti ke ni apartigu nin de Kristo. Ĉi tie estas kie ni bezonas gardi, strebi, preĝi, ke nenio povas allogi nin elekti alian estron; ĉar ni estas ĉiam liberaj fari ĉi tion. Sed ni tenu niajn okulojn fiksitajn sur Kristo, kaj Li konservos nin. Fidante al Jesuo, ni estas sekuraj. Nenio povas ektiri nin el Lia mano. Konstante vidante Lin, ni “transformiĝas en la saman bildon, de gloro al gloro, kiel el la Sinjoro la Spirito.” 2 Korintanoj 3:18.

[48] Estas tiel ke la fruaj disĉiploj akiris sian similecon al la kara Savanto. Kiam tiuj disĉiploj aŭdis la vortojn de Jesuo, ili sentis sian bezonon de Li. Ili serĉis, ili trovis, ili sekvis Lin. Ili estis kun Li en la domo, ĉe la tablo, en la kamero, en la kampo. Ili estis kun Li kiel lernantoj kun instruisto, tage ricevante de Liaj lipoj lecionojn de sankta vero. Ili rigardis Lin, kiel servantoj sian estron, lerni sian devon. Tiuj disĉiploj estis viroj “samnaturaj, kiel ni.” Jakobo 5:17. Ili

havis la saman batalon kontraŭ peko por batali. Ili bezonis la saman difavoron, por vivi sanktan vivon.

Eĉ Johano, la amata disĉiplo, tiu, kiu plej plene reflektis la similecon de la Savanto, ne nature posedis tiun belecon de karaktero. Li estis ne nur sintrudema kaj ambicia por honoro, sed impulsema kaj ofendiĝema post malprava ago kontraŭ si. Sed dum la karaktero de la Diulo elmontriĝis al li, li vidis sian propran mankon, kaj humiliĝis per la scio. La forto kaj pacienco, la potenco kaj dolĉeco, la majesto kaj humileco, kiujn li vidis en la ĉiutaga vivo de la Filo de Dio, plenigis lian animon per admiro kaj amo. Tago post tago lia koro ektiriĝis al Kristo, ĝis li perdis vidon de memo en amo por sia Estro. Lia ofendiĝa, ambicia temperamento cedis al la formiga potenco de Kristo. La renoviganta influo de la Sankta Spirito renovigis lian koron. La potenco de la amo de Kristo faris aliigon de karaktero. Ĉi tiu estas la certa rezulto de kunigo kun Jesuo. Kiam Kristo loĝas en la koro, la tuta naturo aliiĝas. La Spirito de Kristo, Lia amo, moligas la koron, subigas la animon kaj levigas la pensojn kaj dezirojn al Dio kaj la Ĉielo.

Kiam Kristo suprenleviĝis al la Ĉielo, la sento de Lia ĉeesto estis ankoraŭ kun Liaj sekvantoj. Estis persona ĉeesto, plena de amo kaj lumo. Jesuo, la Savanto, kiu marŝis kaj parolis kaj preĝis kun ili, kiu parolis esperon kaj komforton al iliaj koroj estis, dum la komunikaĵo de paco estis ankoraŭ sur Liaj lipoj, suprenpreniĝinta de ili en la Ĉielon, kaj la tonoj de Lia voĉo revenis al ili, kiel la nubo de anĝeloj ricevis Lin, “Jen Mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.” Mateo 28:20. Li suprenleviĝis al la Ĉielo en la formo de la homo. Ili sciis ke Li estis antaŭ la trono de Dio, ilia Amiko kaj Savanto ankoraŭ; ke Liaj simpatioj estis neŝanĝitaj; ke Li estis ankoraŭ identigita kun suferanta homaro. Li estis prezentanta antaŭ Dio la meritojn de Lia propra karega sango, montranta Liajn vunditajn manojn kaj piedojn, rememoranta la prezon kiun Li pagis por Siaj reaĉetitoj. Ili sciis ke Li suprenleviĝis al la Ĉielo por prepari lokojn por ili, kaj ke Li revenos, kaj prenos ilin al Li.

[49]

Dum ili renkontis kune, post la suprenlevo, ili estis fervoraj prezenti siajn petojn al la Patro en la nomo de Jesuo. En solena timo ili kliniĝis en preĝo, ripetante la certigon, “Se vi petos ion de la Patro, Li donos ĝin al vi en mia nomo. Ĝis nun vi petis nenion en mia nomo; petu, kaj vi ricevos, por ke via ĝojo estu plena.” Johano 16:23,24.

Ili etendis la manon de fido pli alten kaj pli alten, per la potenco argumento, “Kristo estas tiu, kiu mortis, sed leviĝis el la mortintoj, kiu estas dekstre de Dio, kaj ankaŭ propetas por ni.” Romanoj 8:34 Kaj Pentekosto venigis al ili la ĉeeston de la Komfortanto pri kiu Kristo diris, Li “estos en vi.” Kaj Li aldone diris: “Estas bone por vi, ke Mi foriros; ĉar se Mi ne foriros, la Parakleto ne venos al vi; sed se mi foriros, mi sendos Lin al vi.” Johano 14:17; 16:7. De nun per la Spirito, Kristo estis loĝi daŭre en la koroj de Siaj infanoj. Ilia kunigo kun Li estis pli proksima ol kiam Li estis persone kun ili. La lumo, kaj amo, kaj potenco de la enloĝanta Kristo elbrilis tra ili, tiel ke la homoj, vidante, “miris, kaj rekonis ilin, ke ili estis kun Jesuo.” La Agoj 4:13.

[50] Ĉio kio Kristo estis al la unuaj disĉiploj, Li deziras esti al Siaj infanoj hodiaŭ; ĉar en tiu lasta preĝo, kun la malgranda aro de disĉiploj kunigitaj ĉirkaŭ Li, Li diris, “Mi preĝas ne nur por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al Mi pro ilia vorto.” Johano 17:20.

Jesuo preĝis por ni, kaj Li petis ke ni povos esti unuigataj kun Li, eĉ kiel Li estas unuigata kun la Patro. Kia kunigo estas ĉi tiu! La Savanto diris pri Si, “La Filo ne povas per Si mem fari ion;” “la Patro, restanta en Mi, faras Siajn farojn.” Johano 5:19; 14:10. Tiam se Kristo loĝas en niaj koroj, Li elfaras en ni “la volon kaj la energion laŭ Sia bonvolo.” Filipianoj 2:13. Ni laboros kiel Li laboris; ni elmontros la saman spiriton. Kaj tiel, amante Lin kaj restadante en Li, “ni ĉiel kreskadu en tiun, kiu estas la kapo, Kristo!” Efesanoj 4:15.

LA LABORO KAJ LA VIVO

DIO estas la fonto de vivo kaj lumo kaj ĝojo al la universo. Kiel radioj de lumo de la suno, kiel la riveretoj de akvo ŝpruĉante de vivanta fonto, benoj elfluas de Li al ĉiuj Liaj kreaĵoj. Kaj kie ajn la vivo de Dio estas en la koroj de la homoj, ĝi elfluas al aliaj en amo kaj beno.

La ĝojo de nia Savanto estis en la suprenleviĝo kaj reaĉeto de falinta homaro. Por ĉi tio Li kalkulis Sian vivon ne kara al Si, sed suferis la krucon, malestimante la honton. Tiel anĝeloj ĉiam okupiĝas laborante por la feliĉo de aliaj. Ĉi tiu estas ilia ĝojo. Tio kion egoismaj koroj konsiderus kiel hontiganta servo, servante al tiuj kiuj estas malfeliĉaj kaj en ĉiu maniero malsuperaj en karaktero kaj grado, estas la laboro de senpekaj anĝeloj. La spirito de la abnegacio de Kristo estas la spirito kiu plenigas la Ĉielon, kaj estas la esenco mem de ĝia feliĉego. Ĉi tiu estas la spirito kion la sekvantoj de Kristo posedos, la laboro kion ili faros.

[51]

Kiam la amo de Kristo ensanktiĝas en la koro kiel dolĉa aromo, ĝi ne povas esti kaŝita. Ĝia sankta influo sentiĝas per ĉiuj kiujn ni kontaktas. La spirito de Kristo en la koro, kiel fonto en la dezerto, fluas refreŝigi ĉiujn kaj farigas tiujn kiuj estas pretaj perei, avidaj por trinki de la akvo de vivo.

Amo al Jesuo elmontras en deziro labori kiel Li laboris, por la beno kaj suprenlevo de la homo. Ĝi kondukas al amo, sentemo kaj simpatio al ĉiuj el la kreitaĵoj de la zorgo de nia ĉiela Patro.

La vivo de la Savanto sur la tero ne estis vivo de facilaj kaj sindediĉo al Li mem, sed Li laboregis kun persistema, fervora, senlaca peno por la savo de perdita homaro. De la staltrogo ĝis Kalvario Li sekvis la vojon de abnegacio kaj ne serĉis liberiĝi de penigaj taskoj, doloraj vojaĝoj, kaj ellacigaj zorgo kaj laboro. Li diris “La Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni Sian vivon kiel elaçeton por multaj.” Mateo 20:28. Jen la unu granda celo de Lia vivo. Ĉio alia estis duagrada kaj subserva. Estis Lia nutraĵo kaj trinko

fari la volon de Dio kaj fini Ties laboron. Memo kaj memintereso havis nenian parton en Lia laboro.

Do tiuj kiuj estas partoprenantoj de la korfavoro de Kristo estos pretaj fari iun oferon, por ke aliaj pro kiuj Li mortis povas partopreni la ĉielan donacon. Ili faros ĉion kion ili povas fari por plibonigi la mondon per sia restado en ĝi. Ĉi tiu spirito estas la certa elkresko de animo vere konvertita. Tuj oni venas al Kristo tiam estas naskita en la koro deziro sciigi al aliaj tian karegan amikon, kian oni trovis en Jesuo; la savanta kaj sanktiganta vero ne povas esti malfermita en ties koro. Se ni vestiĝas per la virto de Kristo, kaj pleniĝas per la ĝojo de Lia enloĝanta Spirito, ni ne povas teni nian silenton. Se ni jam provis kaj vidis kiel bona estas la Eternulo, ni havos ion diri. Kiel Filipino [52] kiam li trovis la Savanton, ni invitos aliajn en Lian ĉeeston. Ni serĉos prezenti al ili la allogojn de Kristo, kaj la nevidatajn realaĵojn de la mondo kiu estas veni. Estos intenseco de deziro sekvi laŭ la vojo kiun Jesuo surpaŝis. Estos fervora sopiro ke tiuj ĉirkaŭ ni povas vidi “la Ŝafidon de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo!” (Johano 1:29).

Kaj la peno beni aliajn reflektos benojn sur ni. Ĉi tiu estis la celo de Dio donante al ni parton por fari en la plano de reaĉeto. Li donis al la homoj la privilegion de partoprenante la dian naturon, kaj, laŭ ilia vico, difuzante benojn al iliaj kunaj homoj. Tio estas la plej alta honoro, la plej granda ĝojo, kiu estas en la povo de Dio fari al la homoj. Tiuj kiuj tiel iĝas partoprenantoj en laboroj de amo veniĝas la plej proksimaj al sia Kreinto.

Dio povus doni la komunikaĵon de la evangelio, kaj ĉio el la laboro de amanta servo, al la ĉielaj anĝeloj. Li povus uzi aliajn rimedojn por efektiviĝi Sian celon. Sed en Sia senlima amo Li elektis farigi nin kunlaborantoj kun Li, kun Kristo kaj la anĝeloj, ke ni povas partopreni la benon, la ĝojon, la spiritan suprenlevon, kiu rezultas de ĉi tiu malegoisma servo.

Ni veniĝas en simpation kun Kristo per la kuneco de Liaj suferoj. Ĉiu ago de abnegacio por la bono de aliaj fortigas la spiriton de bonfarado en la koro de la donanto, kunligante lin pli proksima al la Reaĉetanto de la mondo, kiu “estis riĉa, tamen pro vi Li fariĝis malriĉa, por ke vi per Lia malriĉeco fariĝu riĉaj.” 2 Korintanoj 8:9. Estas nur dum ni tiel plenumas la dian celon en nia kreo, ke vivo povas esti beno al ni.

Se vi laboras laŭ la plano de Kristo por Liaj disĉiploj, kaj gajnas animojn por Li, vi sentos la bezonon de pli profunda travivo kaj pli granda scio de diaj aferoj, kaj malsatos kaj soifos por virto. Vi petegos al Dio, kaj via fido fortiĝos, kaj via animo trinkos pli profundajn trinkojn el la putro de savo. Renkontante kontraŭstaron kaj afliktojn pelos vin al la Biblio kaj al preĝo. Vi kreskos en difavoro kaj la scio de Kristo, kaj evoluigos riĉan travivon. [53]

La spirito de neegoisma laboro por aliaj donas profundecon, stabilecon kaj Kristosimilan belecon de la karaktero, kaj venigas trankvilon kaj feliĉon al ĝia posedanto. La aspiroj leviĝas. Estas nenia spaco por maldiligento aŭ egoismo. Tiuj kiuj tiel, ekzercadas la Kristajn graciajn kreskos kaj fortiĝos por labori por Dio. Ili havos klarajn spiritajn perceptojn, firman, kreskantan fidon, kaj pliigitan potencon en preĝo. La Spirito de Dio, laborante sur ilia spirito, elvokas la sanktajn harmoniojn de tiu animo, kiu respondas al la dia tuŝo. Tiuj, kiuj tiel sindediĉas sin al neegoisma peno por la bono de aliaj, plej certe ellaboras sian propran savon.

La sola maniero per kiu kreski en difavoro estas neprofiteine fari la laboron kiun Kristo ordonis por ni — okupiĝi ĝis la tuta amplekso de nia kapablo, helpante kaj benante tiujn kiuj bezonas la helpon kiun ni povas doni al ili. Forto venas per ekzerco; aktiveco estas la kondiĉo mem de vivo. Tiuj kiuj penas konservi Kristan vivon per pasive akceptante la benojn kiuj venas per difavoro, kaj faras nenion por Kristo, simple penas vivi manĝante sen laborante. Kaj en la spirita kiel en la natura mondo, ĉi tiu ĉiam kaŭzas degeneron kaj kadukiĝon. Viro kiu rifuzas ekzerci siajn membrojn baldaŭ perdas ĉiun povon uzi ilin. Tiel la Kristano kiu ne ekzercas siajn didonatajn kapablojn, ne nur malsukcesas kreskadi en Kriston, sed perdas la forton li jam havis.

La eklezio de Kristo estas la nomita perilo de Dio por la savo de la homoj. Ĝia misio estas porti la evangelion al la mondo. Kaj la devo estas por ĉiuj Kristanoj. Ĉiu ĝis la limo de siaj talento kaj ŝanco, devas plenumi la komisionon de la Savanto. La amo de Kristo, malkaŝita al ni, faras nin suldantoj al ĉiuj kiuj ne konas Lin. Dio donis al ni lumon, ne por ni solaj, sed por doni al ili. [54]

Se la sekvantoj de Kristo vekiĝus al devo, estus miloj kie estas unu hodiaŭ, proklamante la evangelion en pagonaj landoj. Kaj ĉiuj kiuj ne povus persone okupiĝi en la laboro, tamen konservus ĝin per

siaj rimedoj, sia simpatio, kaj siaj preĝoj. Kaj estus multe pli fervora laboro por animoj en Kristanaj landoj.

Ni ne devas iri al pagonaj landoj, aŭ eĉ forlasi la mallarĝan cirklon de la hejmo, se estas tie ke nia devo kuŝas, por labori por Kristo. Ni povas fari ĉi tion en la hejma cirklo, en la eklezio, inter tiuj kun kiuj ni kunligas, kaj kun kiuj ni komercas.

La plej granda parto de la vivo de nia Savanto sur la tero estis pasigita en pacienca laborego en la ĉarpentista fako ĉe Nazeret. Servantaj anĝeloj servis la Sinjoron de vivo dum Li marŝis flanke de kamparanoj kaj laboristoj, nerekonita kaj nehonorita. Li estis tiel fidela en plenumado de Sia misio dum laborante ĉe Sia humila metio kiel kiam Li sanigis la malsanulojn aŭ marŝis sur la ventege ĵetitaj ondoj de Galileo. Tiel, en la plej humilaj devoj kaj plej malaltaj oficoj de vivo, ni povas marŝi kaj labori kun Jesuo.

La apostolo diras, “Ĉiu kie li estas vokita, tie restadu kun Dio.” 1 Korintanoj 7:24. La komerca viro povas administri sian komercon per maniero kio glorigos lian Estron pro lia fideleco. Se li estas vera sekvanto de Kristo, li portos sian religion en ĉion, kion li faras kaj malkaŝos al la homoj la spiriton de Kristo. La maŝinmetiisto povas esti diligenta kaj fidela reprezentanto de Tiu kiu laboregis en la humilaj promenejoj de vivo meze de la montetoj de Galileo. Ĉiu kiu vokas la nomon de Kristo devas tiel labori ke aliaj, vidante liajn bonajn agojn, estos kondukitaj glorigi sian Kreinton kaj Reaĉetanton.

Multaj senkulpigas sin de donante siajn talentojn al la servo de Kristo ĉar aliaj posedis superajn benojn kaj oportunojn. La opinio regis ke nur tiuj, kiuj estas aparte talentaj estas postulitaj dediĉi siajn kapablojn al la servo de Dio. Multaj kompreniĝis ke talentoj estas donitaj al nur iu favorita klaso, ĝis la elbarado de aliaj, kiuj, kompreneble, ne estas vokitaj partopreni la laboregojn aŭ rekompencojn. Sed ne estas tiel reprezentita en la parabolo. Kiam la estro de la domo vokis siajn servantojn, li donis al ĉiu homo tiel laboron.

Per amanta spirito ni povas elfari la plei humilajn devojn de vivo “kiel por la Sinjoro.” Koleseanoj 3:23. Se la amo de Dio estas en la koro, ĝi elmontras en la vivo. La dolĉa gusto de Kristo ĉirkaŭos nin, kaj nia influo suprenlevos kaj benos.

Vi devas ne atendi por grandaj oportunoj aŭ esperi por eksterordinaraj kapabloj antaŭ ol vi laboras por Dio. Vi ne bezonas havi penson de kio la mondo opinias pri vi. Se via ĉiutaga vivo estas

atesto de la pureco kaj sincero de via fido kaj aliaj estas konvinkitaj ke vi deziras utili al ili, viaj penoj estos ne tute perditaj.

La plej humila kaj plej malriĉa el la disĉiploj de Jesuo povas esti beno al aliaj. Ili eble ne elkomprenas ke ili faras iun apartan bonon, sed per ilia senkonscia influo ili eble komencos ondojn de beno kiuj larĝiĝos kaj profundiĝos kaj la benitajn rezultojn ili eble neniam scios ĝis la tago de fina rekompenco. Ili ne sentas aŭ scias ke ili faras ion grandan. Ili estas ne postulitan lacigi sin per zorgo pri sukceso. Ili devas nur antaŭeniri trankvile, fidele farantaj la laboron kiun la providenco de Dio difinas, kaj ilia vivo ne estos vana. Iliaj propraj animoj kreskados pli kaj pli en la similecon de Kristo; ili estas laborantoj kune kun Dio en ĉi tiu vivo, kaj estas tiel preparitaj por la pli alta laboro kaj neombrita ĝojo de la vivo veni.

[56]

Dio, pli apud vin,
Pli apud vin!
Eĉ se per kruca voj'
Vi levos min;
Ĉio nur tiros min,
Dio, pli apud vin—
Pli apud vin!

Se voje kovros min
Nokta kurten'
Sur tera lito, kun
Ŝtona kusen';
Songoj venigu min,
Dio, pli apud vin—
Pli apud vin!

Tiam laŭdkantos mi
En frua hor';
Kreos Betelon el
Ŝtona dolor';
Kaj per sufero pli

Alproksimiĝos mi,
Dio, al vi.

Mozaiko

[57]

SCIO DE DIO

MULTAJ estas la vojoj en kiuj Dio serĉas konigi Sin al ni kaj venigi nin en komunikon kun Li. La naturo atestas al niaj sentumoj sencese. La malferma koro estos impresita per la amo kaj gloro de Dio kiel malkaŝitaj per la faraĵoj de Liaj manoj . La aŭskultanta orelo povas audi kaj kompreni la komunikojn de Dio per la objektoj de la naturo. La verdaj kampoj, la altaj arboj, la burĝonoj kaj floroj, la pasanta nubo, la falanta pluvo, la babilanta rivereto, la gloroj de la Ĉieloj, atestas al niaj koroj, kaj invitas al ni konatiĝi kun Tiu kiu kreis ĉiujn el ili.

Nia Savanto envolvis Siajn karegajn lecionojn per la aferoj de la naturo. La arboj, la birdoj, la floroj de la valoj, la montetoj, la lagoj, kaj la belaj ĉieloj, kaj ankaŭ la okazaĵoj kaj ĉirkaŭaĵoj de ĉiutaga vivo, estis ĉiuj ligitaj kun la vortoj de vero, ke ili povas tiel ofte revoki Liajn lecionojn al la menso eĉ meze de la okupiĝantaj zorgoj de la vivo de laborego de la homoj.

Dio deziras ke Liaj infanoj ŝatos Liajn faraĵojn, kaj plezuriĝos en la simpla, trankvila beleco per kiu Li adornis nian teran hejmon. Li estas amanto de la beleco, kaj pli ol ĉio kio estas ekstere alloga, Li amas belecon de karaktero; Li deziras ke ni kulturos purecon kaj simplecon, la trankvilajn graciojn de la floroj.

Se ni nur aŭskultos, la kreitaj faraĵoj de Dio instruos al ni karegajn lecionojn de oboe kaj fideleco. De la steloj kiuj en sia senspura vojo tra spaco sekvas de epoko al epoko sian difinitan vojon, ĝis la plej etega atomo, la objektoj de la naturo obeas la volon de la Kreinto. Kaj Dio prizorgas ĉion kaj konservas ĉion kion Li kreis. Tiu, kiu subtenas la sennombrajn mondojn tute tra vasteco, je la sama tempo zorgas por la bezonoj de la malgranda bruna pasero kiu kantas sian humilan kanton sen timo. Kiam la viroj eliras al sia ĉiutaga laborego, same kiam ili okupiĝas en preĝo; kiam ili malsupren kuŝiĝas je nokto, kaj kiam ili leviĝas en la mateno; kiam la riĉa viro festas en sia palaco, aŭ kiam la malriĉulo kunigas siajn infanojn ĉirkaŭ malabunda manĝotablo, ĉiuj estas senteme rigarditaj per la ĉiela

[58]

Patro. Neniuj ĝemoj fluas kiujn Dio ne rimarkas. Estas neniu rideto kiun Li ne notas.

Se ni tute kredus ĉi tion, ĉiuj troaj zorgoj forpeliĝus. Niaj vivoj ne tiel pleniĝus kun malkontentigoj kiel nun; ĉar ĉio, ĉu granda ĉu malgranda, estus lasita en la manoj de Dio, de Tiu kiu ne estas konfuzita per multeco de zorgoj, aŭ subigita per ilia pezo. Ni tiam povas ĝui ripozon por la animo, al kio multaj estis longdaŭre fremduloj.

Dum viaj sentoj plezuras ĉe la alloga beleco de la tero, pensu pri la mondo veni; kio neniam konos la peston de peko kaj morto; kie la vizaĝo de la naturo ne plu portos la ombron de la malbeno. Via imago bildigu la hejmon de la savitoj, kaj memoru ke estos pli glora ol via plej hela imago povas pentri. En la variaj donacoj de Dio en la naturo ni vidas nur la plej malfortan brileton de Lia gloro. Estas skribite: “Tion, kion okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis, Kaj kio en la koron de homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas.” 1 Korintanoj 2:9.

La poeto kaj la naturisto havas multajn aferojn por diri pri la naturo, sed estas la Kristano kiu ĝuas la belecon de la tero kun la plej alta ŝato, ĉar li rekonas la faraĵon de sia Patro kaj perceptas Lian amon en floro kaj arbeto kaj arbo. Neniu povas tute ŝati la signifon de monteto kaj valo, rivero kaj maro, kiu ne rigardas ilin kiel esprimo de la amo de Dio al la homaro.

[59] Dio parolas al ni per Siaj providencaj faraĵoj kaj per la influo de Sia Spirito sur la koron. En niaj cirkonstancoj kaj ĉirkaŭaĵoj; en la ŝanĝoj tage okazantaj ĉirkaŭ ni, ni povas trovi karegajn lecionojn se niaj koroj estas nur alfermaj por percepti ilin. La psalmisto, sekvanta la laboron de la providenco de Dio, diras, “La tero estas plena de la boneco de la Eternulo.” “Kiu estas saĝa, tiu tion observi, kaj oni komprenu la favoraĵojn de la Eternulo.” La Psalmaro 33:5; 107:43.

Dio parolas al ni en Sia vorto. Ĉi tie ni havas en pli klaraj frazoj la revelacion de Lia karaktero, de Liaj traktadoj kun la homoj, kaj la granda laboro de regajno. Ĉi tie estas malferma antaŭ ni historio de patriarkoj kaj profetoj kaj sanktaj homoj de antikvo. Ili estis homoj “samnaturaj, kiel ni.” Jakobo 5:17. Ni vidas kiel ili baraktis tra senkuraĝigoj simile al niaj propraj, kiel ili falis sub tento simile kiel ni falis, kaj tamen rekuraĝiĝis kaj venkis per la korfavoro de Dio; kaj, vidante, ni kuraĝiĝas en nia barakto por virto. Dum ni legas pri la karegaj spertoj donitaj al ili, pri la lumo kaj amo kaj beno kio estis

la ilia ĝui, kaj pri la laboro kiun ili faris per la difavoro donita al ili, la spirito kiu inspiris ilin eklumigas flamon de sankta imitado en niaj koroj kaj deziro esti similaj al ili en karaktero — simile al ili, marŝi kun Dio.

Jesuo diris pri la Malnova Testamenta Skribaĵo, — kaj kiel multe pli ĝi estas vera pri la Nova — “Ili estas tio, kio atestas pri Mi,” la Regajnanto, Tiu en kiu niaj esperoj de eterna vivo centriĝas. Johano 5:39. Jes la tuta Biblio parolas pri Kristo. De la unua registraĵo de kreo — ĉar “aparte de Li estiĝis nenio, kio estiĝis” — al la fermanta promeso, “Jen mi rapide venos;” ni legas pri Liaj faroj kaj aŭskultas Lian voĉon. Johano 1:3; Apokalipso 22:12. Se vi deziras konatiĝi kun la Savanto, studu la Sanktan Skribaĵon.

Plenigu la tutan koron kun la vortoj de Dio. Ili estas vivanta akvo, estinganta vian brulantan soifon. Ili estas la vivanta pano de la Ĉielo. Jesuo deklaras, “Se vi ne manĝas la karnon de la Filo de homo kaj ne trinkas Lian sangon, vi ne havas en vi vivon.” Kaj Li klarigas sin [60] dirante, “La vortoj, kiujn Mi diris al vi, estas spirito kaj estas vivo.” Johano 6:53, 63. Niaj korpoj estas konstruitaj de tio kion ni manĝas kaj trinkas; kaj kiel en la natura organizo, tiel en la spirita organizo: estas tio pri kio ni meditas kio donos tonon kaj forton al nia spirita naturo.

La temo de regajno estas tio kion la anĝeloj deziras esplori; ĝi estos la scienco kaj la kanto de la regajnitaj tute tra la senlimaj epokoj de eterno. Ĉu ne ĝi estas inda por zorga penso kaj studo nun? La senlimaj indulgemo kaj amo de Jesuo, la ofero farita por ni, postulas la plej gravan kaj seriozan mediton. Ni devas mediti pri la karaktero de nia kara Regajninto kaj Pledanto. Ni devas mediti pri la misio de Tiu kiu venis por savi Sian popolon el iliaj pekoj. Dum ni tiel meditas ĉielajn temojn, niaj fido kaj amo kreskos pli fortaj, kaj niaj preĝoj estos pli kaj pli akcepteblaj al Dio, ĉar ili estos pli kaj pli miksitaj kun fido kaj amo. Ili estos inteligentaj kaj fervoraj. Estos pli konstanta konfido en Jesuo, kaj ĉiutaga, vivanta sperto de Lia povo savi ĝis la plej multo ĉiujn kiuj venas al Dio per Li.

Dum ni meditas pri la perfektaĵoj de la Savanto, ni deziros esti tute transformitaj kaj renovigitaj en la bildo la Lia pureco. Estos malsatado kaj soifado de animo fariĝi simila al Tiu kiun ni adoras. Des pli niaj pensoj estas sur Kristo, ju pli ni parolas de Li al aliaj kaj reprezentos Lin al la mondo.

[61] La Biblio ne estis skribita por la klerulo sola; kontraŭe, ĝi estas designita por la ordinaraj personoj. La grandaj veraĵoj, kiuj estas necesaj por savo, estas faritaj tiel klaraj kiel tagmezo; kaj neniu miskomprenos kaj perdos sian vojon krom tiuj kiuj sekvas sian propran juĝon anstataŭ la klare malkaŝitan volon de Dio.

Ni devas ne preni la ateston de ia homo koncerne tion kion la Skribaĵoj instruas sed devas studi la vortojn de Dio ni mem. Se ni lasas ke aliaj faru nian pensadon, ni havos lamigitajn energiojn kaj malstreĉitajn kapablojn. La noblaj potencoj de la menso eble tiel pigmeiĝos per manko de ekzerco pri temoj indaj je ilia sinkoncentrado kiel perdi ilian kapablon kompreni la profundan signifon de la vorto de Dio. La menso pligrandiĝos se ĝi okupiĝas elsekvante la rilatojn de la temoj de la Biblio, komparante skribaĵoj kun skribaĵo kaj spiritajn aferojn kun spiritaj.

Estas nenio pli ellaborita por fortigi la intelekton ol la studo de la Skribaĵoj. Nenia alia libro estas tiel potenca por levigi la pensojn, por doni fortecon al la kapabloj, kiel la larĝaj nobligantaj veroj de la Biblio. Se la vorto de Dio estis tiel studita kiel ĝi devus esti, homoj havus larĝon de menso, noblecon de karaktero kaj ekvilibron de celo malofte vidataj en ĉi tiuj tempoj.

Sed estas nur malgranda profito akirita de senpripensita legado de la Skribaĵoj. Oni povas legi la tutan Biblion de komenco ĝis fino kaj tiu ankoraŭ malsukcesas vidi ĝian belecon aŭ kompreni ĝian profundan kaj malkaŝitan signifon. Unu elcerpaĵo studita ĝis ĝia signifo estas klara al la menso kaj ĝia rilato al la plano de savo estas evidenta, estas de pli valoro ol la tralego de multaj ĉapitroj kun nenia difinita celo tenita kaj positiva instruo akirita. Tenu la Biblion kun vi. Kiam vi havas okazon, legu ĝin; fiksi la tekstojn en via memoro. Eĉ dum vi promenas laŭ la stratoj vi povas legi elĉerpaĵon kaj mediti pri ĝi, tiel fiksante ĝin en la menso.

[62] Ni ne povas akiri saĝon sen fervora atento kaj preĝema studo. Iuj partoj de la Skribaĵo estas ja tro klaraj por miskompreni, sed estas aliaj kies signifo ne kuŝas sur la surfaco por esti vidata per ekrigardo. Skribaĵo devas esti komparata kun skribaĵo. Devas esti zorgema serĉado kaj preĝema konsidero. Kaj tia studo estos riĉe repagita. Same kiel la ministro trovas vejnojn de valora metalo kaŝitan sub la surfaco de la tero, tiel tiu, kiu persiste serĉas la vorton de Dio kiel por kaŝita trezoro, trovos verojn de la plej granda valoro, kiuj

estas kaŝitaj de la vido de la senzorga serĉanto. La vortoj de inspiro, pripensitaj en la koro, estos kiel riveretoj fluantaj de la fonto de vivo.

Neniam devus la Biblio esti studita sen preĝo. Antaŭ malfermante ĝiajn paĝojn ni devus peti por la klareco de la Sankta Spirito, kaj ĝi estos donita. Kiam Natanaelo venis al Jesuo, la Savanto ekkriis, “Jen vera Izraelido, en kiu ne estas ruzeco!” Natanael diris, “Per kio Vi min konas?” Jesuo respondis, “Antaŭ ol Filipo vin vokis, kiam vi estis sub la figarbo, Mi vin vidis.” Johano 1:47,48. Kaj Jesuo vidis nin ankaŭ en la sekretaj lokoj de preĝo se ni serĉas Lin por lumo ke ni povas scii kio estas vero. Anĝeloj de la mondo de lumo estos kun tiuj kiuj en humileco de koro serĉas por dia gvido.

La Sankta Spirito ekzaltas kaj glorigas la Savanton. Estas Lia ofico prezenti Kriston, la purecon de Lia virto, kaj la grandan savon kion ni havas per Li. Jesuo diras, “Li ricevos el Miaj kaj anoncos al vi.” Johano 16:14. La Spirito de vero estas la sola efika instruanto de dia vero. Kiel multe Dio devas estimi la homan nacion, ĉar Li donis Sian Filon morti por ili kaj nomas Sian Spiriton esti la instruanto de la homo kaj daŭranta gvidanto!

LA PRIVILEGIO DE PREĜO

PER NATURO kaj revelacio, per Sia providenco, kaj per la influo de Sia Spirito, Dio parolas al ni. Sed ĉi tiuj ne estas sufiĉaj; ni bezonas ankaŭ elverŝi niajn korojn al Li. Por havi spiritan vivon kaj energion, ni devas havi efektivan interrilaton kun nia ĉiela Patro. Niaj mensoj povas esti eltiritaj al Li; ni povas mediti pri Liaj elfaroj, Liaj favoroj, Liaj benoj; sed ĉi tio ne estas, en la plej plena senco, komunikante kun Li. Por komuniki kun Dio, ni devas havi ion diri al Li pri nia efektiva vivo.

Preĝo estas la malfermado de la koro al Dio kiel al amiko. Ne ke tio estas necesa por sciigi al Dio kiaj ni estas, sed por ebligi ke ni ricevu Lin. Preĝo ne venigas Dion malsupren al ni, sed venigas nin supren al Li.

Kiam Jesuo estis sur la tero, Li instruis Siajn disĉiplojn kiel preĝi. Li ordonis al ili prezenti iliajn ĉiutagajn bezonojn antaŭ Dio, kaj surĵeti ĉian ilian zorgon sur Lin. Kaj la certigo kiun Li donis al ili ke iliaj petoj estos aŭditaj, estas certigo ankaŭ al ni.

Jesuo Mem, dum Li loĝis inter homoj, estis ofte en preĝo. Nia Savanto identigis Sin kun niaj bezonoj kaj malfortoj, en tio ke Li fariĝis petanto serĉante de Sia Patro freŝajn provizojn de forto, ke Li povas forveni fortikita por devo kaj aflikto. Li estas nia ekzemplo en ĉio. Li estas frato en niaj malfortaĵoj, “tentita en ĉio tiel same,” sed kiel la senpekulo Lia naturo resaltis de malbono; Li suferis strebojn kaj torturon de animo en mondo de peko. Lia homeco faris preĝon neceso kaj privilegio. Li trovis komforton kaj ĝojon en komuniko kun Sia Patro. Kaj se la Savanto de homoj, la Filo de Dio, sentis la bezonon de preĝo, kiel multe pli devus malfortaj pekaj mortemuloj senti la neceson de fervora, konstanta preĝo.

Nia ĉiela Patro atendas donaci sur nin la plenecon de Lia beno. Estas nia privilegio trinki profunde ĉe la fonto de senlima amo. Kia mirinda, ke ni preĝas tiel malmulte! Dio estas preta kaj volonta aŭdi la sinceran preĝon de la plej humila de Siaj infanoj, kaj tamen estas elmontrita malvolonteco sur nia parto sciigi niajn dezirojn al Dio.

Kion povas la anĝeloj de la Ĉielo pensi pri malfeliĉaj senhelpaj homoj, kiuj havas emon al tento, kiam la koro de Dio de senlima amo sopiras al ili, preta doni al ili pli ol ili povas peti aŭ pensi, kaj tamen ili preĝas tiel malmulte kaj havas tiel malgrandan fidon? La anĝeloj amas adorklini antaŭ Dio; ili amas esti apud Li. Ili konsideras komunikon kun Dio kiel sia plej alta ĝojo; kaj tamen la infanoj de la tero, kiuj bezonas tiel multe la helpon kiun nur Dio povas doni, ŝajnas kontentaj iradu sen la lumo de Lia Spirito, la kuneco de Lia ĉeesto.

La mallumo de la malbonulo enfermas tiujn kiuj malzorgas preĝi. La flustritaj tentoj de la malamiko logas ilin peki; kaj estas tute ĉar ili ne utiligas la privilegiojn kiujn Dio donis al ili en la dia aranĝo de preĝo. Kial devus la gefiloj de Dio esti malvolontaj preĝi, kiam preĝo estas la ŝlosilo en la mano de fido malŝlosi la provizejon de la Ĉielo, kie estas zorge garditaj la senlimajn provizojn de Ĉiopovo? Sen neĉesanta preĝo kaj diligenta viglo, ni estas en danĝero de kreskante malatentaj kaj de devojaĝante de la prava vojo. La kontraŭulo serĉas daŭre malhelpi la vojon al la seĝo de kompatato, ke ni ne povas per fervora petegado kaj fido akiri korfavoron kaj potencon rezisti tenton.

Estas iuj kondiĉoj sur kiuj ni povas atendi ke Dio aŭdos kaj respondos al niaj preĝoj. Unu el la unuaj de ĉi tiuj estas ke ni sentas nian bezonon de helpo de Li. Li promesis, “Mi verŝos akvon sur la soifantaĵon kaj torentojn sur la sekan teron.” Jesaja 44:3. Tiuj kiuj malsatas kaj soifas por virto, kiuj sopiras al Dio, povas esti certaj ke ili estos plenitaj. La koro devas esti malfermita al la influo de la Spirito, aŭ la beno de Dio ne povas esti ricevita.

[65]

Nia granda bezono mem estas argumento kaj petas plej elokvente pro ni. Sed la Sinjoro devas esti alturnita por fari ĉi tiujn aĵojn por ni. Li diras, “Petu, kaj estos donite al vi.” Kaj “Ĉu Tiu, kiu ne indulgis Sian propran Filon, sed fordonis Lin por ni ĉiuj, ne donas al ni libere ĉion kun Li.” Mateo 7:7; Romanoj 8:32.

Se ni vidas maljustaĵon en niaj koroj, se ni sin alkroĉas al iu konata peko, la Sinjoro ne aŭdos nin; sed la preĝo de la penta animo estas ĉiam akceptita. Kiam ĉiuj konataj malpravaĵoj estas korektitaj, ni povas kredi ke Dio respondos al niaj petoj. Nia propra merito neniam rekomendos nin al la favoro de Dio; estas la indeco de Jesuo kio savos nin, Lia sango kio purigas nin; tamen ni havas taskon fari konsentante kun la kondiĉoj de akceptado.

Alia elemento de plejofa preĝo estas fido. “Tiu, kiu alvenas al Dio, kredu, ke Li ekzistas, kaj ke Li fariĝas rekompencanto al tiuj, kiuj Lin diligente serĉas.” Hebreoj 11:6. Jesuo diris al Siaj disĉiploj, “Kion ajn vi petos, preĝante, kredu, ke vi tion jam ricevis, kaj vi ĝin havos.” Marko 11:24. Ĉu vi agas supozante ke Li intencas agi laŭ kio Li diras?

[66] La certigo estas larĝa kaj senlima, kaj Li kiu promesis, estas fidela. Kiam ni ne ricevas la aĵojn mem por kiuj ni petis, je la tempo kiam ni petas, ni ankoraŭ devas kredi ke la Sinjoro aŭdas kaj ke Li respondos al niaj preĝoj. Ni estas tiel eraremaj kaj miopaj ke ni iam petas por aĵoj kiuj ne estos beno al ni, kaj nia Ĉiela Patro en amo respondos al niaj preĝoj donante al ni tion kio estos por nia plej alta bono — tio kion ni mem dezirus se kun vido die informita ni povus vidi ĉion kiel ĝi vere estas. Kiam niaj preĝoj ŝajnas esti ne responditaj, ni devas alkroĉi al la promeso; ĉar la tempo de respondado certe venos, kaj ni ricevos la benon kiun ni plej multe bezonas. Sed pretendi ke preĝo ĉiam estos respondita ĉiel kaj por la preciza aĵo kion ni deziras, estas supozo aŭ aroganteco. Dio estas tro saĝa erari, kaj tro bona deteni iun bonaĵon de tiuj kiuj iradas virte. Tial ne timu fidi Lin, eĉ se vi ne vidas la tujan respondon al viaj preĝoj. Fidu al Lia certa promeso, “Petu kaj estos donite al vi.”

Se ni konsiliĝas kun niaj duboj kaj timoj, aŭ penas solvi ĉion kion ni ne povas vidi klare, antaŭ ol ni havas fidon, konfuziĝoj nur pliiĝos kaj profundiĝos. Sed se ni venas al Dio, sentante nin tiel senhelpaj kaj dependaj, kiel ni vere estas, kaj en humila, fidanta fido sciigas niajn dezirojn al Li kies sciigo estas senlima, kiu vidas ĉion en la kreitaro, kaj kiu regas ĉion per Siaj volo kaj vorto, Li povas atenti al nia krio kaj tion Li ja faros, kaj lumigos niajn korojn. Per sincera preĝo ni kuniĝas kun la menso de la Senlimulo. Ni eble ne havas rimarkindan atestaĵon je tiu tempo ke la vizaĝo de nia Regajninto kliniĝas super ni en kompatato kaj amo, sed tio estas ja vera. Ni eble ne sentas Lian videblan tuŝon, sed Lia mano estas sur ni en amo kaj kompatata sentemo.

Kiam ni venas peti korfavoron kaj benon de Dio ni devus havi spiriton de amo kaj pardonemo en niaj propraj koroj. Kiel ni povas preĝi, “pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj,” kaj tamen indulgi nepardoneman spiriton? Mateo 6:12. Se ni atendas ke niaj propraj preĝoj estos aŭdataj ni devas pardoni

aliajn en la sama maniero kaj al la sama grado kiel ni esperas esti pardonitaj.

Persisto en preĝo estis farita kondiĉo de ricevo. Ni devas preĝi ĉiam se ni volas kreski en fido kaj sperto. Ni devas esti “en preĝado persistaj.” “En preĝado persistu, viglante en ĝi kun danko.” Romanoj 12:12; Koloseanoj 4:2. Petro admonas kredantojn “prudentiĝu do, kaj sobriĝu por preĝoj.” 1 Petro 4:7. Paŭlo ordonas, “Pri ĉio, per preĝo kaj peto kun dankesprimo, viaj deziroj sciiĝu al Dio.” Filipianoj 4:6. “Sed vi, amatoj,” diras Judas, “preĝante en la Sankta Spirito, konservu vin en la amo al Dio.” Judas 20,21. Senĉesanta preĝo estas la nerompita kunigo de la animo kun Dio, tiel ke de Dio vivo fluas en nian vivon; kaj de nia vivo, pureco kaj sankteco refluas al Dio.

[67]

Estas neceso por diligento en preĝo; nenio malhelpu vin. Faru ĉiun penon teni malferma la komunikon inter Jesuo kaj via propra animo. Serĉu ĉiun ŝancon iri kie preĝo estas volita esti farita. Tiuj kiuj vere serĉas por komuniko kun Dio estos vidataj en la preĝanta kunveno, fidelaj fari sian devon kaj estos fervoraj kaj deziraj rikolti ĉiujn el la benoj kiujn ili povas gajni. Ili plibonigos ĉiun ŝancon de metante sin kie ili povas ricevi la radiojn de lumo de la Ĉielo.

Ni devus preĝi en la familia rondo, kaj super ĉio ni devas ne malzorgi sekretan preĝon, ĉar ĉi tiu estas la vivo de la animo. Estas neeble por la animo prosperi dum preĝo estas malzorgita. Familia aŭ publika preĝo mem ne estas sufiĉa. En soleco la animo estu malkaŝita al la ekzamenanta okulo de Dio. Sekreta preĝo devas esti aŭdita nur per la preĝaŭdanta Dio. Nenia scivola orelo estas ricevi la ŝarĝon de tiaj petoj. En sekreta preĝo la animo estas libera de ĉirkaŭantaj influoj, libera de ekscito. Trankvile, tamen fervore, ĝi eletendas al Dio. Dolĉa kaj restanta estos la influo elvenanta de Tiu, kiu vidas en sekreto, kies orelo estas malferma aŭdi la preĝon eliĝanta de la koro. Per trankvila, simpla fido la animo komunikas kun Dio kaj kunigas al si radiojn de dia lumo fortigi kaj subteni ĝin en la konflikto kontraŭ Satano. Dio estas nia turo de forto.

Preĝu en via ĉambreto, kaj dum vi iradas farante vian ĉiutagan laboron via koro estu ofte levigita al Dio. Estas tiel ke Ĥanoĥ iradis kun Dio. Ĉi tiuj silentaj preĝoj leviĝas kiel karega incenso antaŭ la trono de korfavoro. Satano ne povas supervenki tiun kiel koro tiel loĝas en Dio.

[68]

Estas nenia tempo aŭ loko en kiu estas netaŭga suprenoferi peton al Dio. Estas nenio kio povas malebligi ke ni ne povas suprenlevi niajn korojn en la spirito de fervora preĝo. En la amasoj de la strato, en la mezo de komerca aranĝo, ni povas suprensendi peton al Dio kaj peti por dia gvido, kiel faris Neĥemja kiam li faris sian peton antaŭ Reĝo Artahŝast. Kamero de komuniko povas esti trovita kie ajn ni estas. Ni devus teni la pordon de la koro malferma daŭre kaj nia invito supreniranta ke Jesuo povas veni kaj loĝi kiel ĉiela gasto en la animo.

Kvankam eble estas putreta, malpurigita atmosfero ĉirkaŭ ni, ni ne bezonas spiri ĝian miasmon, sed povas vivi en la pura aero de la Ĉielo. Ni povas fermi ĉiun pordon al malpuraj imagadoj kaj malsanktaj pensoj levigante la animon en la ĉeeston de Dio per sincera preĝo. Tiuj kies koroj estas malfermaj ricevi la subtenon kaj benon de Dio irados en pli sankta atmosfero ol tiuj de la Tero kaj havos konstantan komunikon kun la Ĉielo.

Ni bezonas havi pli klarajn vidojn de Jesuo kaj pli plenan komprenon de la valoro de eternaj veraĵoj. La beleco de sankteco estas plenigi la korojn de la infanoj de Dio, kaj ke ĉi tiu povas esti efektiva, ni devus serĉi por diaj malkaŝaĵoj de ĉielaĵoj.

La animo estu tirata elen kaj supren, ke Dio povas doni al ni spiron de la ĉiela atmosfero. Ni povas resti tiel apuda al Dio ke en ĉiu neatendita aflikto niaj pensoj turnos al Li tiel nature kiel la floro turnas al la suno.

[69] Tenu viajn dezirojn, viajn ĝojojn, viajn malĝojojn, viajn zorgojn, kaj viajn timojn antaŭ Dio. Vi ne povas ŝarĝi Lin; vi ne povas lacigi Lin. Tiu kiu kalkulas la harojn de via kapo ne estas indiferanta pri la deziroj de Siaj infanoj. “La Sinjoro estas kompatema kaj indulgema.” Jakobo 5:11. Lian koron de amo tuŝas niaj malfeliĉoj kaj eĉ niaj eldiroj de ili. Portu al Li ĉion kio konfuzigas la menson. Estas nenio kio estas tro granda por Li porti, ĉar Li subtenas mondojn, Li regas super ĉiuj el la aferoj de la universo. Nenio kio iel koncernas nian pacon estas tro malgranda por Li rimarki. Estas nenia ĉapitro en nia vivsperto tro malluma por Li legi; estas nenia konfuziĝo tro malfacila por Li malplekti. Nenia katastrofo povas okazi al la malplejo de Liaj infanoj, nenia maltrankviligo turmenti la animon, nenia ĝojo gajigi, nenia sincera preĝo eliĝi de la lipoj, de kiu nia ĉiela Patro estas nerimarkata, aŭ en kiu Li tenas nenian tujan intereson. “Li sanigas

la korpematojn kaj bandaĝas iliajn vundojn.” La Psalmaro 147:3. La rilatoj inter Dio kaj ĉiu animo estas tiel apartaj kaj plenaj kiel se ne estus alia animo sur la tero partopreni Lian viglazorgon, ne estus alia animo por kiu Li donis Sian amatan Filon.

Jesuo diris, “Vi petos en mia nomo; kaj mi ne diras ke mi petos de la Patro pro vi: ĉar la Patro mem vin amas.” “Mi elektis vin,... por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en Mia nomo.” Johano 16:26,27 15:16. Sed preĝi en la nomo de Jesuo estas ion pli ol nur mencio de tiu nomo ĉe la komenco kaj la fino de preĝo. Estas preĝi en la menso kaj spirito de Jesuo dum ni kredas Liajn promesojn, fidas al Lia korfavoro kaj faras Liajn farojn.

Dio ne intencas ke iu el ni devus fariĝi ermitoj aŭ monaĥoj kaj ekŝiĝi de la mondo por dediĉi sin al agoj de adoro. La vivo devas esti kiel la vivo de Kristo — inter la monto kaj la popolamaso. Tiu kiu faras nenion sed preĝi baldaŭ ĉesos preĝi, aŭ liaj preĝoj fariĝos formala rutino. Kiam homoj prenas sin el socia vivo for de la sfero de krista devo kaj krucportado; kiam ili ĉesas fervore labori por la Estro, kiu fervore laboris por ili, ili perdas la temaĵon de preĝo kaj havas nenian stimulon por dediĉo. Iliaj preĝoj fariĝas personaj kaj egoismaj. Ili ne povas preĝi rilate al la deziroj de homaro aŭ la pligrandigo de la regno de Kristo, petante por forto kun kiu labori.

[70]

Ni suferas mankon kiam ni malzorgas la privilegion de kunuligante kune por fortigi kaj kuraĝigi unu la alian en la servo de Dio. La veroj de Lia vorto perdas siajn vivecon kaj gravecon en niaj mensoj. Niaj koroj ĉesas esti informitaj kaj incititaj per ilia sanktiganta influo, kaj ni malpliiĝas en spiriteco. En nia kunuliĝo kiel Kristanoj ni perdas multon pro manko de simpatio kun unu la alia. Tiu kiu fermas sin al si ne plenumas la oficon kiun Dio planis ke li devus. La prava kultivado de la sociaj elementoj en nia naturo venigas nin en simpatian kun aliaj kaj estas rimedo de evoluo kaj forto al ni en la servo de Dio.

Se Kristanoj kunuliĝas kune, parolantaj al ĉiu la alia pri la amo de Dio kaj pri la karegaj veroj de regajnado, iliaj propraj koroj refreŝiĝas kaj ili refreŝigus unu la alian. Ni povas esti ĉiutage lernantaj pli pri nia ĉiela Patro, gajnantaj freŝan vivsperton de Lia korfavoro; tiam ni deziras paroli pri Lia amo; kaj dum ni faras ĉi tion, niaj propraj koroj varmiĝas kaj kuraĝiĝas. Se ni pensus kaj parolus pli pri Jesuo kaj malpli pri memo, ni havus multe pli de Lia ĉeesto.

Se ni nur pensus pri Dio tiel ofte kiel ni havas atestaĵon de Lia prizorgo por ni ni tenus Lin ĉiam en niaj pensoj kaj plezuriĝus paroli pri Li kaj laŭdi Lin. Ni parolas pri portempaĵoj pro la fakto ke ni havas intereson en ili. Ni parolas pri niaj amikoj pro la fakto ke ni amas ilin; niaj ĝojoj kaj niaj malfeliĉoj estas ligitaj kun ili. Tamen ni havas senliman pli grandan kialon ami Dion ol ami niajn terajn amikojn, devus esti la plej natura afero en la mondo fari Lin unua en ĉiuj niaj pensoj, paroli pri Lia boneco kaj diri de Lia potenco. La riĉaj donacoj kiujn Li donis al ni ne estis intencitaj absorbi niajn pensojn kaj amon tiel multe ke ni havus nenion doni al Dio; ili estas konstante memorigi nin de Li kaj ligi nin en ligaĵoj de amo kaj dankeco al nia ĉiela Benanto. Ni loĝas tro proksime al la malaltejoj de la Tero. Ni levigu niajn okulojn al la malfermita pordo de la sanktejo supre, kie la lumo de la gloro de Dio brilas en la vizaĝo de Kristo, kiu “povas savi ĝis la ekstremaĵo tiujn, kiuj alproksimiĝas per Li al Dio.” Hebreoj 7:25.

Ni bezonas laŭdi Dion pli “por Lia boneco, kaj por Liaj mirakloj antaŭ la homidoj. La Psalmaro 107:8. Niaj dediĉaj ekzercoj devus ne enhavigi tute de petado kaj ricevado. Ni ne ĉiam pensu pri niaj deziroj kaj neniam pri la benoj kiujn ni ricevas. Ni ne preĝas iu ajn tro multe, sed ni estas tro ŝparemaj de donante dankon. Ni estas konstantaj ricevantoj de la korfavoroj de Dio, kaj tamen kiel malmultan dankecon ni esprimas, kiel malmulte ni laŭdas Lin por tio kion Li faris por ni.

Antikve la Sinjoro ordonis al Israel, kiam ili renkontis kune por Lia servo, “Kaj manĝu tie antaŭ la Eternulo, via Dio, kaj estu gajaj, vi kaj viaj familioj, en ĉiu entrepreno de viaj manoj, per kiu benis vin la Eternulo, via Dio.” Readmono 12:7. Tio kio estas farita por la gloro de Dio devus esti farita kun gajeco, kun kantoj de laŭdo kaj dankemo, ne kun malĝojo kaj melankolio.

Nia Dio estas sentema, kompata Patro, Lia servo devus ne esti rigardata kiel koro-malgajiganta, ĉagrena ekzerco. Devus esti plezuro adori la Sinjoron kaj preni parton en Lia laboro. Dio ne havus ke Liaj infanoj, por kiuj tiel granda savo estis provizita, agos kiel se Li estis severa, postulema taskestro. Li estas ilia pli bona amiko; kaj kiam ili adoras Lin, Li atendas esti kun ili, beni kaj komforti ilin, plenigante iliajn korojn kun ĝojo kaj amo. La Sinjoro deziras ke Liaj infanoj prenos komforton en Lia servo kaj trovos pli plezuron ol suferon

en Lia laboro. Li deziras ke tiuj kiuj venas adori Lin forportos kun si karegajn pensojn de Lia prizorgo kaj amo, ke ili povos gajiĝi en ciuj el la okupoj de ĉiutaga vivo, ke ili povos havi korfavoron trakti honeste kaj fidele en ĉio. [72]

Ni devas kuniĝi ĉirkaŭ la kruco. Kristo kaj Tiu krucita devus esti la temo de medito, de konversacio, kaj de nia plej ĝoja emocio. Ni devus teni en niaj pensoj ĉiun benon kiun ni ricevas de Dio, kaj kiam ni komprenas Lian grandan amon ni devus esti volontaj fidi ĉion al la mano kiu najliĝis al la kruco por ni.

La animo povas suprenleviĝi pli proksima al la Ĉielo per la flugiloj de laŭdo. Dio adoriĝas kun kanto kaj muziko en la kortegoj supraj, kaj dum ni esprimas nian dankecon ni proksimiĝas al la adoro de la ĉielaj aregoj. “Kiu oferdonas dankon, tiu honoras” Dion. La Psalmaro 50:23. Ni venu kun respekta ĝojo antaŭ nia Kreinto, kun “dankado kaj laŭta kantado.” Jesaja 51:3. [73]

KION FARI KUN DUBO

MULTAJ, speciale tiuj kiuj estas junaj en la krista vivo, iam konfuziĝas pri la sugestoj de skeptikeco. Estas en la Biblio multaj aferoj kiujn ili ne povas klarigi, aŭ eĉ kompreni, kaj Satano okupigas ĉi tiujn por skui ilian fidon ke la Skribaĵoj estas revelacio de Dio. Ili demandas, “Kiel mi scios la pravan vojon? Se la Biblio ja estas la vorto de Dio, kiel mi povas esti liberigata de ĉi tiuj duboj kaj konfuziĝoj?”

Dio neniam demandas ke ni kredu, sen donante sufiĉan atestaĵon sur kiu bazi nian fidon. Lia ekzisto, Lia karaktero, la vereco de Lia vorto, estas ĉiuj konstatitaj per atesto kio alvokas nian rezonon; kaj ĉi tiu atesto estas abunda. Tamen Dio neniam removis la eblecon de dubo. Nia fido devas apogi sur atesto ne demonstro. Tiuj kiuj deziras dubi havos la ŝancon; samtempe tiuj kiuj vere deziras scii la veron trovos abundan ateston sur kiu apogi sian fidon.

Estas neeble por limitaj mensoj plene kompreni la karakteron aŭ la elfaroj de la Senlimulo. Al la plej lerta intelekto, la plej alte klerita menso, tiu Sanktulo devas ĉiam resti vestita en mistero.

“Ĉu vi povas eltrovi la esencon de Dio?

Ĉu vi povas plene kompreni la perfektecon de la Plejpotenculo?

Tio estas pli alta ol la ĉielo; Kion vi povas fari?

Tio estas pli profunda ol Ŝeol; Kion vi povas ekscii?”

Ijob 11:7,8.

[74]

La apostolo Paŭlo ekkrias, “Ho, profundo de riĉeco kaj saĝeco kaj scio de Dio! kiel neesplorable estas Liaj juĝoj, kaj nesekveblaj Liaj vojoj.” Romanoj 11:33. Sed kvankam “nubo kaj mallumo estas ĉirkaŭ Li” “vero kaj justeco estas la fundamento de Lia trono.” La Psalmaro 97:2. Ni povas ĝis tio kompreni Liajn traktojn kun ni, kaj la motivojn kiuj instigas Lin, ke ni povas percepti senlimajn amon kaj kompaton unuigitaj al senlima potenco. Ni povas kompreni tiel

multon de Liaj celoj kiel estas por nia bono scii, kaj krom ĉi tiu ni devas ankoraŭ fidi al la mano kiu estas ĉiopova, la koro kiu estas plena de amo.

La vorto de Dio, kiel la karaktero de ĝia dia aŭtoro, prezentas misterojn kiujn povas neniam plene esti komprenataj per limituloj. La eniro de peko en la mondon, la enkarniĝo de Kristo, regenerado, la reviviĝo, kaj multaj aliaj temoj prezentitaj en la Biblio, estas misteroj tro profundaj por la homa menso klarigi, aŭ eĉ plene kompreni. Sed ni havas nenian kialon dubi la vorton de Dio ĉar ni ne povas kompreni la misterojn de Lia providenco. En la natura mondo ni konstante estas ĉirkaŭitaj per misteroj kiujn ni ne povas sondi. La plej humilaj formoj mem de vivo prezentas problemon kiu eĉ la plej saĝa el la filozofoj estas senpova klarigi. Ĉie estas mirindaĵoj super nia kono. Devus ni do esti surprizitaj trovi ke en la spirita mondo ankaŭ estas misteroj kiujn ni ne povas sondi? La malfacilo kuŝas sole en la malforteco kaj mallarĝo de la homa menso. Dio donis al ni en la Skribaĵoj sufiĉan ateston de ilia dia naturo, kaj ni devas ne dubi Lian vorton ĉar ni ne povas kompreni ĉiujn el la misteroj de Lia providenco.

La apostolo Petro diras ke estas en Skribaĵo “iuj aferoj malfacile komprenablaj, kiujn la malkleruloj kaj malkonstantuloj tordas ... al sia propra pereco” 2 Petro 3:16, Estas la malfacilaĵoj de Skribaĵo kiuj skeptikuloj asertas estas argumento kontraŭ la Biblio; sed tiel malproksimaj de ĉi tio, ili formas fortan ateston de ĝia dia inspiro. Se estus enhavita nenian rakonton de Dio krom tiu kiun ni povus facile kompreni; se Lia grandeco kaj majesto povus esti komprenitaj per limitaj mensoj, tiam la Biblio ne portus la neerareblan legitiinilon de Dia aŭtoritato. La grandeco kaj mistero mem de la temoj prezentitaj devus inspiri fidon en ĝi. kiel la vorto de Dio.

[75]

La Biblio malvolvigas veron kun tia simpleco kaj tia perfekta adapto al la bezonoj kaj sopiroj de la homa koro, kia mirigis kaj ĉarmis la plej alte kulturitajn mensojn, dum ĝi ebligas ke la plej humila kaj nekulturita perceptos la vojon de savo. Kaj ankoraŭ ĉi tiuj simple diritaj veroj ektenas temojn tiel levigitaj, tiel foratingantaj tiel senlime ekster la kapablo de homa kompreno, ke ni povas akcepti ilin nur pro la fakto ke Dio deklaris ilin. Tial la plano de regajno estas malfermita al ni, tiel ke ĉiu animo povas vidi la paŝojn li devas preni kun penton al Dio kaj kun fido al nia Sinjoro Jesuo Kristo, por esti savata en la aranĝita maniero de Dio; tamen sub ĉi tiuj veroj,

tiel facile komprenataj, kuŝas misteroj kiuj estas la malkaŝo de Lia gloro — misteroj kiuj supervenkas la menson en ĝia esplorado, tamen inspiras la sinceran serĉanton de vero, kun respekto kaj fido. Ju pli li serĉas la Bibliion, des pli profunda estas lia konvinko ke ĝi estas la vorto de la vivanta Dio, kaj homa rezonado kliniĝas antaŭ la majesto de dia revelacio.

Konfesi ke ni ne povas plene kompreni la grandajn verojn de la Biblio estas nur akcepti ke la limita menso estas nesufiĉa kompreni la senliman; ke la homo, kun sia limita, homa scio, ne povas kompreni la celojn de la Ĉiopovulo.

[76] Pro la fakto ke ili ne povas sondi ĉiujn el ĝiaj misteroj, la skeptikulo kaj la malkredulo reĵetas la vortojn de Dio; kaj ne ĉiuj kiuj pretendas kredi la Bibliion estas liberaj de danĝero sur ĉi tiu punkto. La apostolo diras, “Gardu vin, fratoj, ke ne estu en iu el vi koro malbona de nekredemo, en defalo de la vivanta Dio.” Hebreoj 3:12. Estas prave detale studi la instruojn de la Biblio kaj serĉi en “la profundaĵojn de Dio” tiel profunde kiel ili estas malkaŝitaj en Skribaĵo. 1 Korintanoj 2:10 Kvankam “la kaŝitaĵo apartenas al la Eternulo, nia Dio,” “la nekaŝitaj (apartenas) al ni.” Readmono 29:29. Sed estas la laboro de Satano perverti la esplorajn kapablojn de la menso. Iu fiereco miksiĝas kun la konsidero de biblia vero, tiel ke homoj sentas sin malpaciencaj kaj malvenkitaj se ili ne povas klarigi ĉiun porcion de Skribaĵo al sia satigo. Estas tro humiligante al ili konfesi ke ili ne komprenas la inspiratajn vortojn. Ili estas nevolontaj atendi pacience ĝis Dio vidas ke estas taŭge malkaŝi la veron al ili. Ili sentas ke ilia senhelpa homa saĝo estas sufiĉa ebligi ke ili komprenos la Skribaĵon, kaj malsukcesante fari ĉi tion, ili virtuale neas ĝian aŭtoritaton. Estas vere ke multaj teorioj kaj doktrinoj populare supozitaj deveni de la Biblio havas nenan bazon en ĝia instruo, kaj efektive estas kontraŭaj al la tuta direkto de inspiro. Ĉi tiuj aferoj estis kaŭzo de dubo kaj perplekso al multaj mensoj. Ili ne estas tamen debetablaj al la vorto de Dio, sed al la misapliko de ĝi per la homo.

Se estus eble por kreituloj atingi plenan komprenon de Dio kaj Liaj elfaroj, tiam, atingitaj ĉi tiun punkton, estus por ili nenia plua trovo de vero, nenia kresko en scio, nenia plua evoluo de menso aŭ koro, Dio ne plu estus suprega; kaj la homo, atinginte la limon de scio kaj atingo, ĉesus antaŭenigi. Ni danku Dion ke tio ne estas tiel. Dio estas senlima; en Li estas “ĉiuj trezoroj de saĝeco kaj de

scio.” Koloseanoj 2:3. Kaj dum la tuta eterno homoj povas esti ĉiam serĉantaj, ĉiam lernantaj, kaj ankoraŭ neniam malplenigi la trezorojn de Lia saĝo, Lia bono, kaj Lia potenco.

Dio intencas, eĉ en ĉi tiu vivo ke la veroj de Lia vorto estos ĉiam malvolvantaj al Lia popolo. Estas nur unu vojo en kiu ĉi tiu scio povas esti akirata. Ni povas atingi komprenon de la vorto de Dio nur per la lumigo de tiu Spirito per kiu la vorto estis donita. [77] “La aferojn de Dio scias neni, krom la Spirito de Dio,” “ĉar la Spirito esploras ĉion, eĉ la profundaĵojn de Dio.” 1 Korintanoj 2:11,10. Kaj la promeso de la Savanto al Liaj sekvantoj estis, “Kiam venos Li, la Spirito de la vero, Li gvidos vin en ĉian veron ... Ĉar Li ricevos el Miaj kaj anoncos al vi.” Johano 16:13,14.

Dio deziras ke la homo ekzercos siajn rezonajn kapablojn; kaj la studo de la Biblio fortigos kaj levigos la menson kiel nenia alia studo povas. Tamen ni estas sin gardi kontraŭ diigado de rezono, kio havas emon al homa malforto. Se ni ne deziras ke la Skribaĵoj nebuligos al nia kompreno, tiel ke la plej klaraj veroj estos nekomprenataj, ni devas havi la simplecon kaj fidon de malgranda infano, pretaj lerni, kaj petegante la helpon de la Sankta Spirito. Sento de la potenco kaj saĝo de Dio, kaj de nia nekapablo kompreni Lian grandecon, devus inspiri nin kun humilecon, kaj ni devus malfermi Lian vorton, kiel ni enirus Lian ĉeeston, kun sankta timo. Kiam ni venas al la Biblio, rezono devas konfesi aŭtoritaton superega al si, kaj koro kaj intelekto devas kliniĝi al la granda MI ESTAS.

Estas multaj aferoj ŝajne malfacilaj aŭ neklaraj kiujn Dio klarigos kaj simpligos al tiuj kiuj tiel serĉas komprenon de ili. Sed sen la gvido de la Sankta Spirito ni daŭre emas tordi la Skribaĵojn aŭ erare interpreti ilin. Estas multa legado de la Biblio kiu estas senutila kaj en multaj okazoj certa difekto. Kiam la vorto de Dio malfermiĝas sen respekto kaj sen preĝo; kiam la pensoj kaj afekcioj ne estas fiksitaj sur Dio, aŭ en harmonio kun Lia volo, la menso nebuliĝas kun duboj; kaj en la studo mem de la Biblio, skeptikeco fortiĝas. La malamiko prenas regadon de la pensoj, kaj li sugestas interpretojn kiuj ne estas ĝustaj. Kiam ajn homoj ne en vorto kaj ago serĉas esti en harmonio kun Dio, tiam, kiel ajn kleraj ili eble estas, ili emas erari en sia kompreno de Skribaĵo, kaj ne estas sendanĝere fidi al iliaj klarigoj. Tiuj kiuj rigardas la Skribaĵojn trovi malakordon, ne [78]

havas spiritan envidon. Kun distordita vido ili vidos multajn kialojn por dubo kaj malkredo en aferoj kiuj estas vere klaraj kaj simplaj.

Maskumu ĝin kiel ili povas, la vera kialo de dubo kaj skeptiko en plej multaj okazoj, estas la amo de peko. La instruoj kaj limigoj de la vorto de Dio ne estas bonvenaj al la fiera, pekamanta koro, kaj tiuj kiuj estas nevolontaj obei ĝiajn postulojn estas pretaj dubi ĝian aŭtoritaton. Por alveni al vero, ni devas havi sinceran deziron scii la veron kaj volontecon de koro obei ĝin. Kaj ĉiuj kiuj venas en ĉi tiu spirito al la studo de la Biblio trovos abundan ateston, ke ĝi estas la vorto de Dio, kaj ili povas akiri komprenon de ĝiaj veroj kiuj saĝigos ilin al savo.

Kristo diris, “Se iu volas plenumi Lian volon, tiu scios pri la instruado.” Johano 7:17. Anstataŭ demandante kaj ĉikanante pri tio kion vi ne komprenas, donu atenton al la lumo kiu jam brilas sur vin, kaj vi ricevos pli grandan lumon. Per la graco de Kristo, plenumi ĉiun devon kiu estis klarigita al via kompreno, kaj vi estos ebligita kompreni kaj plenumi tiujn el kiuj vi nun estas en dubo.

Estas atesto malferma al ĉiuj, — la plej kleraj, kaj la plej analfabetaj, — la atesto de vivsperto. Dio invitas ke ni pruvu por ni la verecon de Lia vorto, la veron de Liaj promesoj. Li invitas ke ni “pruvu kaj vidu, kiel bona estas la Eternulo.” La Psalmaro 34:8. Anstataŭ dependantaj sur la vorto de alia, ni estas pruvi por ni. Li deklaras, “Petu, kaj vi ricevos.” Johano 16:24. Liaj promesoj plenumiĝos. Ili neniam malsukcesis; neniam povas malsukcesi. Kaj dum ni proksimiĝas al Jesuo, kaj ĝojigas en la pleno de Lia amo, nia dubo kaj mallumo malaperos en la lumo de Lia ĉeesto.

[79] La apostolo Paŭlo diras ke Dio “liberigis nin el la potenco de mallumo, kaj transportis nin en la regnon de la Filo de Sia amo.” Koloseanoj 1:13. Kaj ĉiu kiu pasis de morto al vivo, “tiu jam sigelis, ke Dio estas vera.” Johano 3:33. Li povas atesti, “Mi bezonis helpon, kaj mi trovis ĝin en Jesuo. Ĉiu deziro proviziĝis, la malsato de mia animo estas satita; kaj nun la Biblio estas al mi la revelacio de Jesuo Kristo. Ĉu vi demandas kial mi kredas en Jesuo? Ĉar Li estas al mi dia Savanto. Kial mi kredas la Bibliion? Ĉar mi trovis ĝin esti la voĉo de Dio al mia animo.” Ni povas havi la ateston en ni ke la Biblio estas vera, ke Kristo estas la Filo de Dio. Ni scias ke ni ne sekvas fabelojn sofismajn.

Petro admonas siajn fratojn ke ili “kresku en graco kaj scio de nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo.” 2 Petro 3:18. Kiam la popolo de Dio kreskas en graco, ili konstante akiros pli klaran komprenon de Lia vorto. Ili perceptos novajn lumon kaj belecon en ĝiaj sanktaj veroj. Ĉi tio estis vera en la historio de la eklezio en ĉiuj epokoj, kaj tiel daŭros ĝis la fino. “La vojo de piuloj estas kiel lumo leviĝanta, kiu ĉiam pli lumas ĝis plena tagiĝo.” La Sentencoj de Salomono 4:18.

Per fido ni povas rigardi la estontecon kaj teni la garantion de Dio por kresko de intelekto, la homaj kapabloj unuiĝantaj kun la diaj, kaj ĉiu kapablo de la animo veniganta en direkta kuniĝo kun la Fonto de lumo. Ni povas ĝojiĝi ke ĉio kio perpleksis nin en la providencoj de Dio estos tiam klarigita, aferoj malfacile komprenataj tiam trovos klarigon; kaj kie niaj limitaj mensoj trovis nur konfuzon kaj rompitaĵoj celoj, ni vidos la plej perfektan kaj veran harmonion. “Nun ni vidas per spegulo, malhele; sed tiam okulon ĉe okulo; nun mi konas laŭparte; sed tiam mi konos tiel same, kiel ankaŭ mi estas konita.” 1 Korintanoj 13:12.

ĜOJANTE EN LA SINJORO

LA INFANOJ de Dio estas vokitaj esti reprezentantoj de Kristo, elmontrantaj la bonecon kaj kompaton de la Sinjoro. Kiel Jesuo malkaŝis al ni la veran karakteron de la Patro, tiel ni estas malkaŝi Kriston al mondo kiu ne konas Lian kompatan, indulgan amon, “Kiel Vi Min sendis en la mondon,” diris Jesuo, “tiel ankaŭ Mi ilin sendis en la mondon.” “Mi en ili, kaj Vi en Mi; ... por ke la mondo sciu, ke Vi Min sendis.” Johano 17:18,23. La apostolo Paŭlo diras al la disĉiploj de Jesuo, “Vi montriĝis, ke vi estas letero de Kristo,” “konata kaj legata de ĉiuj.” Korintanoj 3:3,2. En ĉiuj el Siaj infanoj, Jesuo sendas leteron al la mondo. Se vi estas sekvanto de Kristo, Li sendas en vi leteron al la familio, la vilaĝo, la strato, kie vi loĝas. Jesuo, loĝanta en vi, deziras paroli al la koroj de tiuj kiuj ne konas Lin. Eble ili ne legas la Bibliion, aŭ ne aŭdas la voĉon kiu parolas al ili en ĝiaj paĝoj; ili ne vidas la amon de Dio per Liaj elfaroj. Sed se vi estas vera reprezentanto de Jesuo, povas esti ke, per vi, ili estos kondukitaj kompreni ion el Lia boneco kaj esti allogitaj ami kaj servi Lin.

Kristanoj estas metitaj kiel lumportantoj sur la vojo al la Ĉielo. Ili estas reflekti al la mondo la lumon brilanta sur ili de Kristo. Ilia vivo kaj karaktero devus esti tiel ke per ili aliaj gajnos pravan koncepton de Kristo kaj de Lia servo.

Se ni ja reprezentas Kriston, ni faros Lian servon aperi alloga, kiel ĝi vere estas. Kristanoj kiuj kolektas melankolion kaj malĝojon al siaj animoj, kaj murmuris kaj plendas, donas al aliaj malveran reprezenton de Dio kaj la krista vivo. Ili donas la impreson ke ne plaĉas al Dio havi Liajn infanojn ĝojaj, kaj en ĉi tiu ili portas malveran ateston kontraŭ nia ĉiela Patro. Satano ĝojegas kiam li povas konduki la infanojn de Dio en malkredon kaj malesperon. Li plezuriĝas vidi nin malfidantaj Dion, dubantaj Liajn volontecon kaj kapablon savi nin. Li amas havi nin senti ke la Sinjoro faros al ni malutilon per Siaj providencoj. Estas la laboro de Satano reprezenti la Sinjoron kiel mankanta kompaton kaj indulgon. Li misdiras la veron rilate al Li. Li plenigas la imagon kun malveraj ideoj pri Dio; kaj anstataŭ

fiksante la atenton sur la vero rilate al nia ĉiela Patro, ni ankaŭ ofte fiksas niajn mensojn sur la misreprezentoj de Satano kaj malhonoras Dion malfidante Lin kaj murmurante kontraŭ Li. Satano ĉiam serĉas fari la religian vivon unu de melankolio. Li deziras ke ĝi aperu laciga kaj malfacila; kaj kiam la Kristano prezentas en sia propra vivo ĉi tiun vidon de religio, li per sia malkredo, subtenas la malveron de Satano.

Multaj, iradante laŭ la vojo de vivo, daŭre emfazigas siajn erarojn kaj malsukcesojn kaj malkontentiĝojn kaj iliaj koroj pleniĝas kun malĝojo kaj malkuraĝigo. Dum mi estis en Eŭropo, fratino kiu estis farinta ĉi tion, kaj estis en profunda ĉagreno, skribis al mi, petante por iu vorto de kuraĝigo. Je la nokto, post mi legis ŝian leteron, mi songis ke mi estis en ĝardeno, kaj unu kiu ŝajnis esti la posedanto de la ĝardeno kondukis min laŭ ĝiaj vojoj. Mi estis kuniganta la florojn kaj ĝuanta ties aromon, kiam ĉi tiu fratino, kiu estis promenanta laŭ mia flanko, vokis mian atenton al iuj malbelaj sovaĝaj rozoj kiuj estis malhelpantaj ŝian vojon. Tie ŝi estis funebrante kaj malĝojante. Ŝi promenis ne laŭ la piedvojo sekvante la gvidanton, sed promenis inter la sovaĝaj rozoj kaj dornoj. “Ho ve,” ŝi funebriis, “Ĉu ne estas domaĝe ke ĉi tiu ĝardeno estas malbonigita per dornoj?” Tiam la gvidanto diris, “lasu la dornojn solaj, ĉar ili nur vundos vin. Kunigu la rozojn, la liliojn, kaj la diantetojn.”

[82]

Ĉu ne estis iuj helaj punktoj en via vivsperto? Ĉu vi ne havis iujn karegajn periodojn kiam via koro batis kun ĝojo en respondo al la Spirito de Dio? Kiam vi reregardas en la ĉapitrojn de via vivsperto ĉu vi ne trovas iujn plezurigajn paĝojn? Ĉu ne la promesoj de Dio estas, kiel la aromaj floroj, kreskantaj apud via vojo sur ĉiu flanko? Ĉu vi ne permesos ilian belecon kaj dolĉon pleniĝi vian koron kun ĝojo?

La sovaĝaj rozoj kaj dornoj nur vundos kaj malĝojigos vin; kaj se vi kunigos nur tiujn aĵojn, kaj prezentas ilin al aliaj, ĉu vi ne, krom mem malrespektanta la bonon de Dio, estas malhelpanta tiujn ĉirkaŭ vi de iradantaj en la vojo de vivo?

Ne estas saĝe kunigi kune ĉiujn el la malplezurigaj memoroj de estinta vivo, — ĝiaj malbonoj kaj malkontentigoj, — priparoli ilin kaj funebri pri ili ĝis ni estas supervenkitaj per malespero. Malespera animo estas plena kun mallumo, elfermigata la lumon de Dio de sia propra animo kaj ĵetas ombron sur la vojo de aliaj.

Danku Dion por la belaj bildoj kiujn Li prezentis al ni. Ni kunigu kune la benitajn certigojn de Lia amo, ke ni povas rigardi ilin daŭre. Estas la Filo de Dio forlasante la tronon de Sia patro, restante Sian diecon kun homeco, ke Li povis savi la homon de la potenco de Satano; estas Lia triumfo por ni, malfermante la Ĉielon al homoj, malkaŝante al homa vido la ĉeestan ĉambreton kie la Dieco malvualas Sian gloron; estas la falanta raso suprenlevita de la truo de ruinigo en kiun peko plonĝigis ĝin, kaj revenigita en kunigon kun la senlima Dio, kaj elportinta la dian provon per fido en nia Regajnanto, vestita en la virto de Kristo, kaj ekzaltita al Lia trono — ĉi tiuj estas la bildoj kiujn Dio deziras ke ni primeditu.

[83] Kiam ni ŝajnas dubi la amon de Dio kaj malfidi Liajn promesojn ni malhonoras Lin kaj ĉagrenas Lian Sanktan Spiriton. Kiel sentus patrino se ŝiaj infanoj konstante plendis pri ŝi, precize kiel se ŝi ne intencis bonon al ili, kiam la peno de ŝia tuta vivo estis antaŭenigi iliajn interesojn kaj doni al ili komforton? Supozu ke ili dubus ŝian amon; tio rompūs ŝian koron. Kiel iu ajn gepatro sentus esti tiel traktata per siaj infanoj? Kaj kiel povas nia ĉiela Patro rigardi nin kiam ni malfidas Lian amon, kio kondukis Lin doni Lian sole-naskitan Filon ke ni povas havi vivon? La apostolo skribas, “Ĉu Tiu, kiu ne indulgis Sian propran Filon, sed fordonis Lin por ni ĉiuj, ne donos al ni libere ĉion kun Li?” Romanoj 8:32. Kaj tamen multaj, per siaj agoj, se ne en vorto, diras “La Sinjoro ne intencas ĉi tiun por mi. Eble Li amas aliajn, sed Li ne amas min.”

Ĉio de ĉi tio malutilas al via propra animo; ĉar ĉiu vorto de dubo kion vi eligas invitas la tentojn de Satano; fortigas en vi la emon dubi, kaj forĉagrenas de vi la servantajn anĝelojn. Kiam Satano tentas vin, spiru nenian vorton de dubo aŭ mallumo. Se vi elektas malfermi la pordon al liaj sugestoj, via menso estos plenigita kun malfido kaj ribelaj demandoj. Se vi ekparolas viajn sentojn, ĉiun dubon vi esprimas ne nur reagis sur vi mem, sed estas semo kiu ĝermos kaj portos frukton en la vivo de aliaj, kaj povas esti neeble nuligi la influon de viaj vortoj. Vi mem eble povas restatiĝi de la periodo de tento kaj de la kaptilo de Satano, sed aliaj kiuj estis turnitaj per via influo eble ne povas liberiĝi de la malkredo kiun vi sugestis. Kiel grave ke ni parolas nur tiujn aferojn kiuj donos spiritajn forton kaj vivon!

Anĝeloj aŭskultas aŭdi kian raporton vi portas al la mondo pri via ĉiela Estro. Via konversacio estu de Tiu, kiu vivas fari pledadon por vi antaŭ la Patro. Kiam vi prenas la manon de amiko laŭdo al Dio estu sur viaj lipoj kaj en via koro. Ĉi tiu al logos liajn pensojn al Jesuo.

Ĉiuj havas afliktojn; ĉagrenojn malfacilaj porti, tentojn malfacilaj rezisti. Ne diru viajn problemojn al viaj kunaj mortuloj sed portu ĉion al Dio en preĝo. Farigu ĝin regulo neniam eligi unu vorton de dubo aŭ malkuraĝigo. Vi povas fari multon heligi la vivon de aliaj kaj fortiĝi iliajn penojn, per vortoj de espero kaj sankta gajiĝo.

[84]

Estas multaj bravaj animoj grave premataj per tento, preskaŭ pretaj sveni en la konflikto kun memo kaj la potencoj de malbono. Ne malkuraĝigu tian personon en lia malfacila strebo. Ĝojigu lin per bravaj, esperaj vortoj kiuj urĝigos lin sur lia vojo. Tial la lumo de Kristo brilas de vi. “Neniu el ni vivas al si mem.” Romanoj 14:7. Per nia senkonscia influo aliaj povas kuraĝiĝi kaj fortiĝi, aŭ ili povas malkuraĝiĝi, kaj esti forpelitaj de Kristo kaj la vero.

Estas multaj kiuj havas eraran ideon pri la vivo kaj karaktero de Kristo. Ili pensas ke Li estis sen varmo kaj suneco, ke Li estis senindulga, severa kaj senĝoja. En multaj okazoj la tuta religia vivsperto estas kolorigata per ĉi tiuj melankoliaj vidoj.

Estas ofte dirate ke Jesuo ĝemis, sed ke Li estis neniam konata rideti. Nia Savanto ja estis Viro Suferanta, kaj konis malĝojon, ĉar Li malfermis Sian koron al la veoj de la homoj. Sed kvankam Lia vivo estis abnegacia kaj ombrita per doloro kaj zorgo, Lia spirito ne estis dispremita, Lia vizaĝo ne portis esprimon de malĝojo kaj plendo, sed ĉiam de trankvila sereneco. Lia koro estis fonto de vivo, kaj kie ajn Li iris Li portis ripozon kaj pacon, ĝojon kaj gajon.

Nia Savanto estas profunde serioza kaj intense fervora, sed neniam melankolia aŭ malafabla. La vivo de tiuj kiuj imitas Lin estos plena de fervora celo; ili havos profundan senton de persona respondec. Frivoleco estos subpremita; estos nenia tumulto gajeco, nenia kruda serĉado; sed la religio de Jesuo donas trankvilon kiel rivero. Ĝi ne estingas la lumon de ĝojo; ĝi nek detenas gajigon nek nebuligas la sunan, ridetan vizaĝon. Kristo venis ne esti servata sed servi; kaj kiam Lia amo regas en la koro, ni sekvos Lian ekzempleron.

[85]

Se ni tenas plej alte en niaj pensoj la malbonkorajn kaj maljustajn agojn de aliaj ni trovos ke estas neeble ami ilin kiel Kristo amis nin;

sed se niaj pensoj daŭre emfazas la mirindajn amon kaj kompaton de Kristo por ni, la sama spirito elfluos al aliaj. Ni devus ami kaj respekti unu la alian, malgraŭ la difektoj kaj neperfektaĵoj kiujn ni ne povas eviti vidantaj. Humilecon kaj memmalfidon devus esti kulturitaj, kaj paciencan kompaton kun la difektoj de aliaj. Ĉi tio elmortigos ĉian mallarĝigantan egoismon kaj farigos nin grandkora kaj malavara.

La psalmisto diras, “Fidu la Eternulon kaj faru bonon; loĝu sur la tero kaj konservu honestecon.” La Psalmaro 37:3. “Fidu la Eternulon.” Ĉiu tago havas siajn ŝarĝojn, siajn zorgojn kaj perpleksojn; kaj kiam ni renkontas, kiel pretaj ni estas paroli pri niaj malfacilaĵoj kaj afliktoj. Tiel multaj prunteprenataj ĝenoj interrompas, tiel multaj timoj indulgiĝas, tia pezo de ĝeno esprimiĝas, ke oni eble supozas ke ni ne havas kompateman, amantan Savanton preta aŭdi ĉiujn el niaj petoj kaj esti al ni nuntempa helpo en ĉiu tempo de bezono.

Iuj estas ĉiam timantaj, kaj prunteprenantaj ĝenojn. Ĉiun tagon ili ĉirkaŭiĝas kun la signoj de la amo de Dio, ĉiun tagon ili ĝuas la gratifikojn de Lia providenco; sed ili ne rimarkas ĉi tiujn nuntempajn benojn. Iliaj mensoj daŭre emfazigas ion malagrablan kiun ili timas eble venos; aŭ iun malfacilaĵon eble vere ekzistas, kiu, kvankam malgranda, blindigas iliajn okulojn al la multaj aferoj kiuj postulas dankecon. La malfacilaĵoj kiujn ili renkontas, anstataŭ forpelante ilin al Dio, la sola fonto de ilia helpo, apartigas ilin de Li ĉar ili vekigas maltrankvilon kaj plendadon.

[86]

Ĉu ni faras bone esti tiel malkredemaj? Kial ni devus esti maldankemaj kaj malfidemaj? Jesuo estas nia amiko. La tuta Ĉielo interesiĝas en nia bonfaro. Ni devus ne permesi ke la perpleksoj kaj ĝenoj de ĉiutaga vivo ĉagrenu la menson kaj nebuligu la brovon. Se ne tion faras tiam ni ĉiam havos ion ĉagreni kaj ĝeni. Ni devus ne indulgi solecon kiu nur ĉagrenas kaj lacigas nin, sed ne helpas nin porti afliktojn.

Vi eble estas perpleksita en komerco; viaj estontaj esperoj eble kreskas pli kaj pli malhelaj, kaj vi eble minaciĝas per perdo; sed ne malkuraĝiĝu; ĵetu vian zorgon sur Dion, kaj restu trankvila kaj gajiĝa. Preĝu por saĝo administri viajn aferojn kun diskreteco, kaj tiel malhelpi perdon kaj ruiniĝon. Faru ĉion kion vi povas sur via parto okazigi favorajn rezultojn. Jesuo promesis Sian helpon sed ne

aparte de nia peno. Kiam, dependante sur nia Helpanto, vi jam faris ĉion kion vi povas, akceptu la rezultojn senplende.

Ne estas la volo de Dio ke Lia popolo estos depremita kun zorgo. Sed nia Sinjoro ne trompas nin. Li ne diras al ni. “Ne timu. Ne estas danĝeroj en via vojo.” Li scias ke estas afliktoj kaj danĝeroj, kaj Li traktas kun ni klare. Li ne proponas preni Sian popolon el mondo de peko kaj malbono sed Li elmontras neniam- malsukcesantan rifuĝejon. Lia preĝo por Liaj disĉiploj estis, “Mi petas, ne ke Vi forigu ilin el la mondo, sed ke Vi gardu ilin kontraŭ la malbono.” “En la mondo,” Li diras, “vi havos suferadon; sed kuraĝu; Mi venkis la mondon.” Johano 17:15; 16:33.

En Sia Prelego sur la Monto, Kristo instruis al Siaj disĉiploj kar- egajn lecionojn rilate al la neceso de fidante en Dio. Ĉi tiuj lecionoj estas desegnitaj kuraĝigi la infanojn de Dio tra ĉiuj epokoj, kaj ili ven- nis ĝis nia tempo plenaj de instruo kaj komforto. La Savanto montris al Siaj sekvantoj la birdojn de la aero kiel ili kantetis siajn ĝojkantojn neĝenataj pro pensoj de zorgo, ĉar, “ili ne semas, nek rikoltas.” Kaj tamen la granda Patro provizas iliajn bezonojn. La Savanto diras, [87] “Ĉu vi ne multe pli valoras ol ili?” Mateo 6:26. La granda Provizanto por la homo kaj la besto malfermas Sian manon kaj provizas ĉiujn Siajn kreitaĵojn. La birdoj de la aero ne estas neindaj je Lia rimarko. Li ne faligas manĝojn ne iliajn bekojn, sed Li faras provizon por iliaj bezonoj. Ili devas kunigi la grajnoj kiujn Li disigis por ili. Ili devas pretigi la materialon por siaj malgrandaj nestoj. Ili devas nutri siajn junulojn. Ili eliras kantantaj al sia laboro, ĉar “via Patro ĉiela ilin nutras.” Kaj “ĉu vi ne multe pli valoras ol ili?” Ĉu ne vi, kiel intelegantaj, spiritaj adorantoj, estas de pli valoro ol la birdoj de la aero? Ĉu ne la Aŭtoro de nia ekzisto, la Konservanto de nia vivo, Tiu, kiu formis nin en Sia propra dia bildo, provizos por niaj necesoj se ni nur fidas al Li?

Kristo montris al Siaj disĉiploj la florojn de la kampo, kreskantaj en riĉa abundo kaj lumantaj en la simpla beleco kiun la ĉiela Patro donis al ili, kiel esprimo de Sia amo al la homo. Li diris, “Pripensu la liliojn de la kampo, kiel ili kreskas.” La belo kaj simpleco de ĉi tiuj naturaj floroj multe superrivalas la brilegecon de Salomono. La plej grandiosa vesto produktigita per la sperto de arto ne povas elporti komparon kun la natura gracio kaj radianta belo de la floroj de la kreo de Dio. Jesuo demandas, “Se Dio tiel vestas la kampan herbaĵon, kiu

ekzistas hodiaŭ, kaj morgaŭ estos ĵetata en fornon, kiom pli certe Li vestos vin, ho malgrandfiduloj?” Mateo 6:28,30. Se Dio la dia Artisto donas al la simplaj floroj kiuj pereas en tago, iliajn delikatajn kaj variajn kolorojn, kiel pli grandan zorgon Li havos por tiuj kiuj kreiĝis en Lia propra bildo? Ĉi tiu leciono kiun Kristo donis estas riproĉo al la ĝena penso, la perplekso kaj dubo, de la senfida koro.

[88] La Sinjoro deziras ke ĉiuj Liaj gefiloj estos feliĉaj, trankvilaj kaj obeantaj. Jesuo diras, “Pacon Mi lasas al vi; Mian pacon Mi donas al vi; ne kiel la mondo donas, Mi donas al vi. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu.” “Tion Mi parolis al vi, por ke Mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena.” Johano 14:27; 15:11.

Feliĉo kiu estas serĉata de egoismaj motivoj, ekster la vojo de devo, estas malbone ekvilibrigita, intermita, kaj maldaŭra; ĝi forpasa, kaj la animo pleniĝas kun soleco kaj malĝojo; sed estas ĝojo kaj kontentiĝo en la servo de Dio; la Kristano ne estas lasita iradi en necertaj vojoj; li ne estas lasita al vanaj bedaŭroj kaj mal- kontentiĝoj. Se ni ne havas plezuron en ĉi tiu vivo ni povas ankoraŭ esti ĝojaj rigardante al la vivo preter.

Sed eĉ ĉi tie Kristanoj povas havi la ĝojon de komuniko kun Kristo; ili povas havi la lumon de Lia amo, la senĉesan komforton de Lia ĉeesto. Ĉiu paŝo en vivo povas venigi nin pli proksime al Jesuo, povas doni al ni pli profundan vivsperton de Lia amo, kaj povas venigi nin unu paŝon pli proksime al la benita hejmo de paco. Do ni ne forĵetu nian konfidon, sed havu firman certigon, pli firma ol iam antaŭe. “Ĝis ĉi tiu loko helpis nin la Eternulo,” kaj Li helpos nin ĝis la fino. 1 Samuel 7:12. Ni rigardu al la monuinentaj kolonoj, memorigoj de kio la Sinjoro faris komforti nin kaj savi nin de la mano de la detruanto. Ni konservu freŝajn en nia memoro ĉiujn el la kompataj indulgoj kiujn Dio montris al ni, — la ĝemoj kiujn Li forviŝis, la doloroj kiujn Li kvietigis, la ĝenoj removitaj, la timoj dispelitaj, la deziroj provizitaj, la benoj donacitaj, — tiel fortigante nin por ĉio kio estas antaŭ ni tra la cetero de nia pligrimo.

Ni ne povas sed rigardi antaŭen al novaj perpleksoj en la venonta konflikto, sed ni povas rigardi krom tio kio estas estinta ankaŭ tion kio estas veni, kaj diri, “Ĝis ĉi tiu loko helpis nin la Eternulo.” “Dum via tuta vivo daŭru via bonstato.” Readmono 33:25. La provo ne superas la forton kio doniĝos al ni elporti ĝin. Do ni suprenprenu

nian laboron precize kie ni trovas ĝin, kredante ke kia ajn venos, forto proporcia al la aflikto estos donita.

[89]

Kaj iam post iam la pordegoj de la Ĉielo estos ĵetitaj malfermaj envenigu la infanojn de Dio, kaj de la lipoj de la Reĝo de gloro la benaĵon falos sur iliaj oreloj kiel plej riĉa muziko, “Venu, vi benataj de mia Patro, heredu la regnon preparitan por vi de post la komenco de la mondo.” Mateo 25:34.

Tiam la regajntoj estos bonvenataj al la hejmo kiun Jesuo pretigas por ili. Tie iliaj kunuloj ne estos abomenaj de la tero, mensogantoj, idolanoj, la malpuruloj, kaj malkreduloj; sed ili kunigos kun tiuj kiuj supervenkis Satanon kaj per dia korfavoro formis perfektajn karakterojn. Ĉiu pekemo, ĉiu neperfekteco, kiu afliktas ilin ĉi tie estas removitaj per la sango de Kristo, kaj la bonego kaj heleco de Lia gloro, multe superante la helecon de la suno, partodoniĝas al ili. Kaj la morala belo, la perfekteco de Lia karaktero, brilas tra ili, en indo multe superante ĉi tiun belegecon. Ili estas sen difekto antaŭ la granda blanka trono, partoprenante la dignon kaj privilegiojn de anĝeloj.

Konsiderante la gloran heredon kio povas esti la lian, “kion homo donu interŝanĝe por sia animo?” Mateo 16:26. Li eble estas malriĉa, tamen li posedas en si riĉon kaj dignon kiun la mondo ne povas donaci. La animo regajnita kaj purigita de peko, kun ĉiuj ĝiaj noblaj potencoj dediĉataj al la servo de Dio, estas de supereganta indo; kaj estas ĝojo en la Ĉielo en la ĉeesto de Dio kaj la sanktaj anĝeloj pri unu animo regajnita, ĝojo kiu estas esprimata en kantoj de sankta triumfo.